

Werner Gitt

Demandoj pri la kredo

de homoj ĉiam denove starigitaj

Esperantigis el la germana Vinko Ošlak

Origina eldono:

Gitt, Werner: *Fragen – die immer wieder gestellt werden.*

©1989 by CLV – Christliche Literatur-Verbreitung

Postfach 11 01 35 – 33661 Bielefeld

Internet: www.clv.de

ISBN: 3-89397-127-0

Pri la aŭtoro: Prof. d-ro inĝ. *Werner Gitt*, naskita en la jaro 1937 en Reneko (Raineck) en Orienta Prusujo (nuntempe parto de Ruslando). Li finis inĝenieran studadon en la teknika alta lernejo en Hanovro. Li laboris kiel asistanto en la Instituto por reguliga tekniko en la teknika altlernejo en Aĥeno (Aachen). Post du jaroj da esplorlaboro li diplomiĝis per doktoriĝo el la temoj de inĝeniera teknologio. Li gvidis fakan kampon de informa teknologio en la fizika teknika ŝtata instituto (PTB) en Braunschweig. En la jaro 1978 li estis nomumita direktoro kaj profesoro de tiu instituto. Li okupiĝis pri sciencaj demandoj sur la kampo de informadiko, numerala matematiko kaj reguliga tekniko. Li publicis la rezultojn en multaj sciencaj originalaj verkoj. Ek de la jaro 1966 li estas edziĝinta kaj kun sia edzino Marion li havas filon Carsten kaj filinon Rona. Profesoro Gitt jam dum jaroj estas unu el la plej entuziasmaj kaj pro la scienca ekzakto de sia argumentado efika predikanto de la evangelio de Jesuo ĉie en la mondo, kien oni lin invitas kiel prelegiston kaj predikanton. Li aperigis vicon da libroj kun kristana enhavo, sed aparte li okupiĝas pri la demandoj de la rilato inter la instruo de la Biblio kaj la mito de la evolucio, kiu niatempe ĉie en la mondo estas parto de la oficiala kaj deviga ŝtata religio. Al esperantlingvaj verserĉantoj prof. Gitt jam donacis tri siajn kristanajn traktaĵojn, kiujn li permesis sen honoraria kompenso traduki kaj libere disponigi ĉu interrete ĉu surpapere. Kaj li mem eĉ metis la esperantigitajn tekstojn en sian interretan paĝon kaj aranĝis senpagan presadon de ili.

Tiu ĉi libro aperis en multaj lingvoj, en la origina germana lingvo ĝi ek de la unua eldono en la jaro 1989 ĝis la jaro 2003 aperis en 19 reeldonoj!

Enhavolisto

Antaŭparolo

Antaŭparolo al la 15a reeldono

1. Demando pri Dio (DD)

- DD1: Kiamaniere mi povas scii, ĉu Dio tute ekzistas?
- DD2: Kie Dio estas?
- DD3: Kion la vorto Dio signifas?
- DD4: Kial oni Dion ne povas vidi?
- DD5: Ĉu tio estas Dio de la amo, se Li permesas la plagojn en la mondo?
Kial Dio permesas okazi sufero?
- DD6: Ĉu ne ĝuste Dio kulpas pri ĉio?
- DD7: Dio de malnova Testamento igis per militado pereigi la tutan popolon, dum en la Prediko sur la monto staras: Amu viajn malamikojn! Ĉu Dio de MT estas iu alia dio ol Dio de NT ?
- DD8: Ĉu Dio kreis la malbonon?
- DD9: Ĉu Dio kapablas lerni?
- DD10: Ĉu Jesuo vere vivis? Ĉu li estas la Filo de Dio?
- DD11: En kia rilato troviĝas Dio kaj Jesuo? Ĉu temas pri unu kaj sama persono aŭ kiu el ili estas pli alta? Al kiu ni preĝu?

2. Demandoj pri la Biblio (DB)

- DB1: Biblion tamen verkis homoj, do oni rigardu ĉion-ĉi pli malpli relative.
Kiel vi povas diri, ke ĝi venas de Dio kaj ke ĉio en ĝi estas vera?
- DB2: Kiamaniere mi povas enketi, ĉu la Biblio diras la veron?
- DB3: Kio estas en la Biblio alie ol ĉe ĉiuj aliaj libroj de la mondliteraturo?
- DB4: Ĉu niatempe ni disponas pri novaj mesaĝoj komplemente al la Biblio? Ĉu Dio ne estas pli granda ol la Skribaĵo, por ke Li senpere parolu al iu homo?
- DB5: Kiamaniere vi aprecus la verkon „La Biblia kodo“ de M. Drosnin?

3. Demandoj, kiuj koncernas la kreadon, la sciencon kaj la fidon (DK)

- DK1: Ĉu troviĝas transiro de la neviva materio ĝis la vivantaj organismoj?
- DK2: Kiom aĝa estas la tero, kiom la universo? Ĉu ekzistas scienca metodo por konstati la aĝon de la tero? Kio pri la metodo C14?
- DK3: Kiamaniere estas eble, ke okaze de juna universo la lumo de la objekto, kiu distancas de ni je milionoj da lumjaroj, jam atingis la teron? Ĉu oni ĉikaze prefere akceptu la aĝon, kiu korespondus kun la tempo, kiun la lima radio bezonas por atingi nin?
- DK4: Kian starpunkton Darvino (*Darwin*) havis koncerne Dion?
- DK5: Enkadre de pinta sporto oni atingas pli kaj pli bonajn rezultojn, kiuj antaŭe ne estis eblaj. Ĉu tio ne estas vinko favore al la evolucio?
- DK6: Ĉu oni la Biblion povas preni por serioza libro science, se ĝi uzas antikvajn imagojn pri la mondo, jam delonge superigitaj?
- DK7: Kion vi povus diri pri la strukturo de nia universo?
- DK8: Kiom longa estis la tago de la kreado?
- DK9: Ĉu troviĝas du kontraŭdiraj kreadraportoj?
- DK10: Ĉu oni povis venigi saŭrojn en la barkon de Noaĥo?
- DK11: Kun kiu edziniĝis du filoj de Adamo?
- DK12: Kiu scienca argumento el via vidpunkto plej klare parolas favore al la kreado

kaj plej forte malfavore al la evolucia hipotezo?

4. Demandoj pri la savo (DS)

- DS1: Per kio la homo povas esti savita – per la fido aŭ per la faroj?
- DS2: Kial Dio elpensis por nin savi ĝuste la metodon de la kruco? Ĉu oni povus imagi ankaŭ alian metodon?
- DS3: Kiel Jesuo povis antaŭ 2000 jaroj morti por niaj pekoj, kiujn ni faris nur niatempe?
- DS4: Ĉu ne estus pli ekonomie, se Jesuo suferus nur por la pekoj, por kiuj ni homoj petas pardonon, anstataŭ por la pekoj de la tuta mondo?
- DS5: Surbaze de primica morto de Jesuo Kristo Dio al ĉiuj homoj proponas pardonon de iliaj pekoj. Kial do Dio ne proklamas ĝeneralan amnestion por ĉiuj pekoj de ĉiuj homoj?
- DS6: Mia opinio ankaŭ post la morto troviĝas la ŝanco de la saviĝo. La Dia graco finfine devas esti pli granda ol tio, pri kio vi parolas?
- DS7: Kio okazas al la infanoj, kiuj tro frue mortis, por povi akcepti decidon de fido? Kio pri abortitaj fetusoj aŭ pri mense handikapitaj? Ĉu ili ĉiuj estas pereigitaj?
- DS8: Ĉu Judaso ne estis devigita perfidi Jesuon, por ke tiel la savo estu ebla?
- DS9: Ĉu mi rajtas naski ankoraŭ unu infanon, se la ebleco, ke ĝi pereos, estas 50 %? (Demando de juna virino, kiu ĵus alprenis la fidon.)
- DS10: En la Biblio legiĝas pri la elektiteco fare de Dio. Ĉu do oni ne havas liberan volon, se la decido pri la pereco aŭ saviĝo jam estas donita?
- DS11: Ĉu vi povas al mi per naturscienco pruvi, ke la infero ekzistas? (Demando de gimnaziano.)

5. Demandoj pri diversaj religioj (DR)

- DR1: Troviĝas multaj religioj. Ili ĉiuj do ne povas esti falsaj. Ĉu ne sonas aŭdace, se la kristana instruo asertas, ke ĝi estas la nura vojo al la eterna vivo?
- DR2: Ĉu kristanoj kaj islamanoj ne preĝas al la sama Dio? (Demando de islamano.)
- DR3: Helpe de kio mi povas rekoni, ke la evangelio ne estas unu el la religioj, sed havas Dian originon?

6. Demandoj pri la vivo kaj la fido (DV)

- DV1: Pro kio oni vivas sur la tero?
- DV2: Kio estas la senco de la vivo?
- DV3: Kiamaniere mi povas en mia ĉiutaga vivo atingi klarecon en la kredo?
- DV4: Mi senĉese sonĝas pri la sama afero, kiu min turmentas. Kion mi pensu pri tiuj ĉi sonĝoj?
- DV5: Kio estas la peko?
- DV6: Ĉu la needziniĝintaj paroj laŭ la Biblia instruo rajtas vivi kune?
- DV7: Fidi tamen ne signifas „scii“; kiel vi do povas paroli pri la fido kiel pri io certa?
- DV8: Ĉu por la naskiĝo denove oni bezonas ian eksteran signon?
- DV9: Vi parolas, kvazaŭ Dio mem vin sendus ĉi tien. Kiel vi pri tio pensas? (Okaze de iu prelego.)
- DV10: Kion vi opinias pri la genteknologio?
- DV11: Kion Jesuo faris kun kuljoj kaj tabanoj? Ĉu li mortfrapis ilin?

7. Demandoj pri la morto kaj pri la eterno (DM)

- DM1: Ĉu troviĝas la vivo post la morto?

DM2: Kio estas la eterna vivo? Kiel oni ĝin imagu?
DM3: Kiam la eterna vivo komenciĝas?
DM4: Kiamaniere oni povas imagi la ĉielon?

ALDONO

Rimarkoj pri la Biblio

I. Bazaj principoj pri la Biblio

- I.1. Pri la origino de la Biblio
- I.2. Pri la vereco de la Biblio
- I.3. Pri la enketado de la biblia vero
- I.4. Pri la bibliaj temoj
- I.5. Pri la eldiroj en la Biblio
- I.6. Pri la valoro de la bibliaj eldiroj
- I.7. Pri la komprenebleco kaj kompreno de la Biblio
- I.8. Pri la precizeco de la bibliaj eldiroj
- I.9. Pri la tempa kadro de la bibliaj eldiroj
- I.10. Pri la alpaŝo al la Biblio: konvertiĝo al Jesuo Kristo
- I.11. La fina rimarko

II. La bazaj principoj por ekspliki la Biblion

III. Kial legi la Biblion?

IV. Kiamaniere legi la Biblion?

V. Dek promesoj por la bibliaj legantoj (legantoj kaj farantoj de la Vorto)

Nereduktita letero de leganto

Persone el la vivo de la aŭtoro

La listo de la propra uzita literaturo

Ekspliko de la uzitaj mallongigoj por citi el la Biblio

Antaŭparolo

La ideo por tiu ĉi libro: La ideo por tiu ĉi libro naskiĝis en la tempo de iu evangeliza serio da prelegoj, kiujn la aŭtoro havis en la origina medio de la munkena modmagazeno Mühlhäuser. La moddesegnisto Harro Mühlhäuser disponigis al nia uzo la unuan etaĝon de sia negoca domo ĉiuvespere por la unusemajna serio da prelegoj. Tio signifis: ĉiun vesperon depreni vestojn de la vestoteniĵoj, forigi la stativojn, aranĝi 250 seĝojn, realigi la prelegon, denove kunmeti la seĝojn, starigi la stativojn por la vestoj, por ke la personaro sekvamatene povis denove aranĝi la vestojn. Da seĝoj eĉ proksimume ne estis sufiĉe, sed molaj tapiŝoj surplanke kaj la ŝtupoj aldone disponigis sufiĉan lokon, por ke povis ĉeesti 350 personoj. Pro la centra pozicio de la negoca domo en la munkena piedira cono (nur kelkajn metrojn for de la placo kun la urbodomo kaj de la „virina preĝejo“ (Frauenkirche) venis granda parto el la nekristana homgrupo. Post la aranĝo estis donita ebleco, ke homoj ĉe diversaj temoj starigis siajn demandojn. Tiun eblecon ili riĉe ekspluatis. Ĉe tio montriĝis la demandoj, kiuj antaŭ la decido por la fido nur bezonis klarigon.

La maniero demandi: Tiel tiu ĉi libro enhavas aron da tiuj demandoj el Munkeno. Apud ili estas aranĝitaj la respondoj ankaŭ al aliaj demandoj, kiuj estis starigitaj al la aŭtoro okaze de similaj prelegoj aliloke. Jam dum jaroj aranĝas „Ahldener Jugendtag“ (junularkonferenco de Ahlend) demandohoron „Krelinger Fragestunde“ (demandohoro de Kreling), kie samtiel okazas interparolo pri similaj demandoj. Ĉiuj-ĉi en la libro pritrakitaj demandoj havas ion komunan: ke ili estis reale starigitaj. Tiel tiu ĉi libro ne proponas iun de „insider“ (el propra rondo) atenditan tratanĉon de demandoj tra la Biblio, sed ĝi provas serioze pritrakti tiujn problemojn, kiuj maltrankviligas dubantojn, demandantojn kaj serĉantojn. Tiel ĉi tie ne temas pri kolekto da pedantaj teologiaj demandoj aŭ pri listo da teoriaj demandoj, kompilita malantaŭ la verda tablo, sed pri la bazaj demandoj de la serĉantaj personoj, kiuj naskiĝas el la prelega praktiko. Foje ni alpaŝis ankaŭ kelkajn detalajn demandojn.

Antaŭparolo al la 15a reeldono

Kiel aŭtoro mi nature ĝojas, ke tiu ĉi libro dumtempe jam 15-an fojon povis esti reeldonita. Nun mi faris kelkajn esencajn plibonigojn kaj aldonojn. Intertempe la libro estis tradukita en 14 lingvojn. La unueca titolpaĝa bildo, uzita en fremdlingvaj eldonoj, nun estas uzata ankaŭ en la germana versio. La libro evidente trovis multajn amikojn en hejm- kaj eksterlando. En pasintaj jaroj atingis min multaj alskriboj, kiuj min tre stimulis kaj plenigis min per dankemo rilate al la Sinjoro, pri kiu ĉi tie mi skribis. Multaj trovis fidon helpe de tiu ĉi libro aŭ ili faris pliajn paŝojn en ilia kredovivo. El multaj ricevitaj leteroj estu ĉi tie elektita la traviva raporto de iu leganto, kiun mi (per permeso de la korespondanto) citas en la libro. Donacu Dio al ni, ke tiu ĉi teksto ankaŭ estonte estu por multaj aliaj la beno.

Werner Gitt
en marto 1998

I. Demando pri Dio (DD)

DemandoD1: *Kiamaniere mi povas scii, ĉu Dio tute ekzistas?*

RespondoD1: Ne troviĝas nacio aŭ gento aŭ klano sur la tero, ĉe kiu la homoj ne kredus en iu ajn formo en Dion, spiriton aŭ estaĵon, kiu troviĝas super ili. Tio validas ankaŭ por la plene izolitaj praarbaraj triboj, kiuj neniam havis kontakton kun iu alia kulturo kaj speciale ne kun la evangelio. Kiamaniere tio eblas? Ni ĉiuj disponas pri kapablo pensi, kaj el mirindaj faroj de la observita kreitaro konkludi je ekzisto de la nevidebla Kreinto. Neniu kredas, ke aŭtomobilo, horloĝo aŭ nur butono aŭ paperkrampo estiĝis de si mem. Tial apostolo Paŭlo skribas en la Nova testamento: „*Ĉar Liaj nevideblaj ecoj de post la kreado de la mondo fariĝas videblaj, sentate per Liaj faritaĵoj, nome, Lia eterna potenco kaj dieco; tial al ili mankas defenda pledo*“ (Rom 1,20). Sed ĉiukaze el la kreitaro oni povas ekscii nur, ke iu dio ekzistas, oni povas konkludi pri ties povo kaj ideoriĉeco, sed ne pri ties estaĵa specifo (ekz. amo, vivo, mizerikordo, boneco). Tial la Biblio estas donita al ni.

DD2: *Kie Dio estas?*

RD2: Laŭ niaj homaj imagoj ni provas Dion lokigi space. Tial oni trovas ĉe idolanaj imagoj pri dio en la antikvo kaj same ĉe la novidolanismo tiaspecajn menciojn. Grekoj kredis, ke iliaj dioj loĝas sur la monto Olimpo, kaj germanoj lokigis siajn diojn en Valhalo (Walhall). La franca matematikisto kaj astronomo Pierre S. M. Laplace (1749-1827) opiniis: „Mi traesploris la tutan universon, sed dion mi trovis nenie.“ Similon konstatis ankaŭ la kosmonaŭtoj de Sovetunio: „Dum mia flugo mi ne renkontis dion“ (Nikolajev, 1962 per Vostok III). Ĉiuj-ĉi eldiroj estas el la vidpunkto de la Biblio fundamente falsaj, ja Dio estas superspaca. Li, kiu kreis la spacon, ne povas mem esti parto de la spaco. Kontraŭe, Li trapenetras ĉian pozicion de la spaco; Li estas ĉie-ĉeesta. Tion klarigis Paŭlo al la idolanaj atenanaj en Areopago: „*Ĉar en Li ni vivas kaj moviĝas kaj ekzistas*“ (Ago 17,28). La psalmisto samtiel konas tiun ĉi realon, kiam li agnoskas: „*Kiam mi iras kaj kiam mi ripozas, Vi estas ĉirkaŭ mi, kaj metis sur min Vian manon*“ (Psa 139,3.5). Ankaŭ ĉiloke estas indikita la plena ĉirkaŭtroviĝo kaj trapenetreco de Dio. La matematika imago pri la pli alte dimensiaj spacoj (nia spaco havas tri dimensiojn) povas nin helpi ĉe la demando, kie Dio povus esti. La n -dimensia spaco estas nur la subaro de la $(n+1)$ dimensiita spaco. Tiel ekzemple la kvardimensia spaco ne povas esti registrita de la tridimensia spaco, tamen ĝi tiun komplete trapenetras. Tiun staton priskribas la Biblio, kie en la 1-a libro de Reĝoj estas dirite: „*Ĉu efektive Dio loĝus sur la tero? ja la ĉielo kaj la ĉielo de ĉielo ne povas Vin ampleksi; des pli tion ne povas ĉi tiu domo, kiun mi konstruis!*“ (1 Reĝ 8,27).

DD3: *Kion la vorto Dio signifas?*

RD3: La vorto „Dio“ ne estas akronimo, do el la komencliteroj de pluraj vortoj kombinita mallongiga vorto, kiel ekzemple NFO (Nekonata flugobjekto). Dio revelaciis sin al la homoj ĉiam denove per novaj nomoj, kiuj per sia signifo malkovras la esencon de Dio. La sekvaj bibliaj lokoj markas la unuajn aperojn en la Biblio:

Elohim (1 Mos 1,1; Dio – plurala formo por esprimi la Triunuon de la Patro, de la Filo kaj de la Sankta Spirito).

Eloah (41-foje en la libro Ijobo, cetere nur sporade; Dio, la singulara formo de Elohim).

El (1 Mos 33,20; Dio, la Ĉiopova).

El-Olam (1 Mos 21,33; la eterna Dio).
El-Ŝadaj (1 Mos 17,1; la ĉiopova Dio).
El-Roi (1 Mos 16,13; Dio, kiu min vidas).
Jahve (1 Mos 2,4; laŭ 2 Mos 3,14-15 „Mi estas, kiu mi estas“).
Jahve-Rapheka (2 Mos 15,26; Jahve, via kuracisto).
Jahve-Nissi (2 Mos 17,15; Jahve, mia standardo).
Jahve-Jireh (1 Mos 22,13.14; Jahve envidas).
Jahve-Ŝalom (Juĝ 6,24; Jahve estas la paco).
Jahve-Cidkenu (Jer 23,6; Jahve, nia justeco).
Jahve-Ŝammah (Hez 48,35; Jahve estas mem ĉi-tie).
Jahve-Roi (Psa 23,1; Jahve, mia paŝtisto).
Jahve-Cebaot (Dio de ĉieltaĉmentoj)-
Adonai (1 Mo 15,2; mia Sinjoro, 134-foje en la MT).
(Prenita el: *Abraham Maister: Biblisches Namenlexikon, Pfäflexikon, 1970*)

DD4: Kial oni Dion ne povas vidi?

RD4: La unuaj du de Dio kreitaj homoj Adamo kaj Evaŭ vivis en komuneco kun Dio, tiel ke ili povis Lin vidi de vizaĝo al vizaĝo. Per la peka kazo la homo estis disigita de Dio. Li estas sankta Dio, malamanta ĉiun pekon, tial la origina komuneco finiĝis. „*Dio estas loĝanta en lumo neatingebla, kaj kiun neniu vidis nek povas vidi, al kiu estu honoro kaj potenco eterna*“ (1 Tim 6,16), tial ni vidos Lin denove nur, se ni post nia morto venos en Lian domon. La vojo al Li estas ebla nur per la Sinjoro Jesuo: „*Neniu venas al la Patro krom per mi*“ (Joh 14,6).

DD5: Ĉu tio estas Dio de la amo, se Li permesas la plagojn en la mondo? Kial Dio permesas okazi sufero?

RD5: Antaŭ la peka kazo troviĝis nek la morto nek la sufero, nek la doloro nek io ajn de tio, kio nin niatempe turmentas. Dio aranĝis ĉion tiel, ke la homo povis vivi sub idealaj kondiĉoj. Sed en libera decido la homo iris propran vojon, kiu kondukis for de Dio. Kial Dio regalas nin per tiom vasta liberradiuso, oni ne povas klarigi. Sed ni konstatas: Tiu, kiu foriras de Dio, trovas finon en mizero. Tiun maldolĉan sperton ni faras ĝis niaj tagoj. Kelkaj homoj tendencas al tio, ke ili aljuĝas kulpon al Dio. Rilate tion ni devus pripensi, ke ne Dio sed la homo estas la kaŭzanto. Se ni dumnokte sur aŭtoŝoseo elŝaltas lumojn kaj tiamaniere okazas akcidento, ni ne povas aljuĝi la kulpon al la aŭtofabrikisto. Tiu antaŭvidis utilajn rimedojn por prilumi la vojon; sed se ni propravole ilin elkomutas, tio estas pure nia afero. „*Dio estas la lumo*“ (1 Joh 1,5); kaj se ni perdiĝas en la mallumo pro distanco de Dio, ni ne rajtas plendi ĉe la Kreinto, kiu tamen nin kreis por esti proksime al Li. Dio estas kaj restas Dio de la amo, ja Li faris neimageblan aferon: Li donis sian propran Filon je dispono, por deaĉeti nin el nia memkulpa situacio. Jesuo diras pri si mem en la evangelio laŭ Johano: „*Neniu havas amon pli grandan ol tio, ke iu demetus sian vivon por siaj amikoj*“ (Joh 15,13). Ĉu troviĝas amo pli granda? Nenie estis io pli granda plenumita por la homo ol pere de la faro sur Golgota: la kruco tiel estas la pinta punkto de la Dia amo.

Ni ĉiuj vivas – ĉu kredantaj aŭ nekredantaj – ene de la falinta kreitaro, en kiu la sufero per ĉiuj al ni konataj variantoj estas ĝia ĝenerala konsistoparto. Neklarigebla restas por ni la individua sufero. Kial iu fartas bone kaj la alia suferas plagojn kaj pezajn malsanojn? Ofte la kredanta homo devas eĉ pli suferi ol la sendia homo, kiel la Psalmisto konstatas:

„*Ĉar mi ĉagreniĝis pro la fanfaronuloj, Vidante la bonstaton de la malvirtuloj.*

Ĉar ili ne havas suferojn de morto, Kaj iliaj fortoj estas fortikaj.

Ili ne partoprenas en la zorgoj de homoj, Kaj ili ne suferas kun aliaj homoj“ (Psa 73,3-5).

Sed la kredanta homo tamen trovas ankaŭ la ĝustan enordiĝon de sia individua plago, kiun li ne perceptas kiel punon por propraj pekoj. Li ne konflikta kun Dio, sed forte sin kroĉas al Li: „*Sed mi ĉiam estas apud Vi; Vi tenas min je la dekstra mano.*
Per Via konsilo Vi min kondukas, Kaj poste Vi akceptas min kun honoro.
Konsumiĝas mia karno kaj mia koro; Sed la fortikaĵo de mia koro kaj mia parto estas Dio por eterne“ (Psa 73,23-24.26).

DD6: Ĉu ne ĝuste Dio kulpas pri ĉio?

RD6: Kiam Dio post la unua peko vokis Adamon je responso, tiu referencis per Eva: „*La edzino, kiun Vi donis al mi kiel kunulinon, ŝi donis al mi de la arbo, kaj mi manĝis*“ (1 Mos 3,12). Kiam poste Dio alparolis la virinon, ankaŭ Eva referencis for de si: „*La serpento tromplogis min, kaj mi manĝis*“ (1 Mos 3,13). Koncerne nian kulpon ni havas kuriozan kondutmanieron: Ni konsekvence referencas je io ekster de ni, ĝis kiam ni Dion mem proklamas kulpa. Kaj nun okazas io neimagebla: En la persono de Jesuo prenas Dio la tutan kulpon sur sin: „*Tiun (= Jesuo), kiu ne konis pekon, Li faris peko pro ni*“ (2 Kor 5,21). La kortumo de Dio pri la peko de la mondo deŝarĝiĝas sur la Filon de Dio. Lin trafas la radio de la malbeno per plena akro; la tuta lando malheliĝas dum kelkaj horoj, li estas vere forlasita de Dio. „*Li, kiu sin donis pro niaj pekoj*“ (Gal 1,4), por ke ni povus eliri liberaj. Tio jen estas la manifesto de Dia amo. Ne troviĝas pli bona mesaĝo ol la evangelio.

DD7: Dio de malnova Testamento igis per militado pereigi la tutan popolon, dum en la Prediko sur la monto staras: Amu viajn malamikojn! Ĉu Dio de MT estas iu alia dio ol Dio de NT ?

RD7: Kelkaj homoj opinias, ke en MT Dio estis Dio de kolerego kaj venĝo, kaj en NT Dio de la amo. Tiun ĉi percepton oni povas helpe de ambaŭ sekvaj eldiroj el MT kaj NT facile refuti: En la libro de la profeto Jeremio 31,3 Dio diras: „*Mi ekamis vin per amo eterna, tial Mi altiris vin favorkore*“ kaj en la NT ni legas en la epistolo al Hebreoj 10,31: „*Terure estas fali en la manojn de la vivanta Dio.*“ Dio estas same la kolerega Dio kontraŭ la peko kiel ankaŭ la amanta Dio al tiu, kiu pretas penti. Tiun ĉi ateston ni trovas tiel en la MT, kiel ankaŭ en la NT, ja Dio estas ĉiam la sama. Ĉe Li „*ne povas ekzisti ŝanĝo, nek ombro de sinturnado*“ (Jak 1,17). Samtiel ankaŭ la Filo de Dio en sia esenco neniam ŝanĝiĝis: „*Jesuo Kristo estas la sama hieraŭ, hodiaŭ, kaj ĝis eterneco*“ (Heb 13,8).

La Biblio estas plena da okazoj, kiamaniere Dio juĝas la pekon ĉe homo kaj kiamaniere Li aliloke gardas siajn homojn. Dum la diluvo dronis la tuta homaro pro sia malbono kaj nur ok homoj estis savitaj. Samtiel post la fina juĝo la pli granda parto de la homaro pereos, ĉar ili iras sur la larĝa vojo de la pereco (Mat 7,13-14). Dio donis al sia popolo Izraelo la promesitan landon, sed okaze de la eliro el Egipto amalekitoj atakis la malfruintojn. En 5 Mos 25,17-19 al amalekitoj estas aljuĝita la ekstermo, kiun Saŭlo en pli malfrua tempo laŭ la ordono de Dio devis ekzekuti (1 Sam 15,3). En la novtestamenta tempo Ananio kaj Safirao estas mortigitaj de Dio, ĉar ili ne diris plenan veron (Ago 5,1-11). Per tiuj ĉi ekzemploj ni povas lerni, ke Dio prenas ĉiun pekon pli serioze ol ni opinias. Ankaŭ en tio ĉi Dio neniam ŝanĝiĝis. Li malamas ĉiun pekon kaj Li juĝos ĉiun misfaron. Li povus ankaŭ niatempe pereigi tutajn naciojn. Ni germanoj pekis kontraŭ Dio aparte krude, ja ene de nia nacio dum la tria regno (de Hitlero – rim. de trad.) estis preparita radikala programo de ekstermo de Lia popolo Izraelo. La 40-jara divido de Germanio kaj perdo de orientaj regionoj estas klare videbla Dia juĝo pro tio. Dio povus pereigi ankaŭ nian tutan nacion, sed Lia mizerikordo estis tiom granda, ke Li tion ne faris; probable ankaŭ pro daŭre troviĝantaj fidantoj. Sodomo kaj Gomoro ne pereus, se troviĝus tie almenaŭ dek justaj homoj (1 Mos 18,32). Se la juĝo ne okazas ĉiam tuj, tio estas

granda graco de Dio. Sed iam devos ĉiu respondi pri praveco de sia vivo, eĉ la kredantoj (2 Kor 5,10) kiel ankaŭ la nekredantoj (Heb 9,27; Apo 20,11-15).

DD8: Ĉu Dio kreis la malbonon?

RD8: En la 1-a epistolo de Johano oni povas legi: „*ke Dio estas lumo, kaj da mallumo estas en Li neniam*“ (1 Joh 1,5). Dio estas la absolute pura kaj perfekta esto (Mat 5,48) kaj la anĝeloj anoncas: „*Sankta, sankta, sankta estas la Eternulo Cebaot, la tuta tero estas plena de Lia gloro*“ (Jes 6,3). Li estas la Patro de la lumo (Jak 1,17) kaj tiel la malbono neniam povas veni de Li. La origino de la malbono estas en la Biblio ligita per la falo de Satano, kiu dekomence estis la kerubo, la lumanĝelo, sed li volis ke „*mi similiĝos al la Plejaltulo*“ (Jes 14,14). En la libro de Ezekielo estas priskribita ties fierego kaj falo:

„*Vi estis perfekta en via konduto de post la tago de via kreigo, ĝis troviĝis en vi malbonago. Pro la grandeco de via komercado via interno pleniĝis de maljusteco, kaj vi pekis; tial Mi deĵetos vin de la monto de Dio, kaj malaperigos vin, ho kerubo protektanto, el inter la fajraj ŝtonoj. De via beleco fieriĝis via koro, pro via majesteco vi perdis vian saĝon; tial Mi ĵetos vin sur la teron kaj faros vin mokataĵo antaŭ la reĝoj*“ (Jeh 28,15-17).

Tiel, ke la unua homparo eniris la tenton, ili du mem falis en sklavecon de la peko. La malbono tiel trovis enirejon en la kreitaron. Evidente Satano sukcesis tra la peko akiri la povon en tiu ĉi mondo: „*Ĉar nia luktado estas ne kontraŭ sango kaj karno, sed kontraŭ regantoj, kontraŭ aŭtoritatoj, kontraŭ mondpotenculoj de la nuna mallumo, kontraŭ la spiritaroj de malbono en la ĉielejoj*“ (Efe 6,12).

DD9: Ĉu Dio kapablas lerni?

RD9: Lernado estas laŭdifine akirado de nekonata scio. Sed ĉar Dio scias pri ĉio ĉion (Psa 139,2; Joh 16,30), troviĝas por Li nenio nova, kion Li povus ankoraŭ lerni. Kiel la Sinjoro super spaco kaj tempo li same bone konas la pasinton kiel ankaŭ la estonton. Sed ni restas lernantaj. En la Biblio Dio donas al ni en sia ĉioscicio informojn pri la estontaj okazaĵoj en profeta vido.

DD10: Ĉu Jesuo vere vivis? Ĉu li estas la Filo de Dio?

RD10: La anonco pri la alveno de Jesuo en tiun ĉi mondon apartenas al la plej elstaraj profetaj eldiroj. En detala maniero antaŭdiras al ni la MT pri lia naskiĝloko Betlehemo (Miĥ 5,1 → Luk 2,4), pri lia origina naskiĝlinio (2 Sam 7,16 → Mat 1,1-17), pri la samtempa fileco al Dio (Psa 2,7; 2 Sam 7,14 → Heb 1,5) kaj al la homo (Dan 7,13 → Luk 21,27), pri lia agado (Jes 42,7 → Joh 9), pri la kaŭzo de lia senditeco (Jes 53,4-5 → Mar 10,45), pri la perfido de li je 30 arĝentmoneroj (Saĥ 11,12 → Mat 26,15), pri lia sufero kaj morto sur la kruco (Psa 22 → Luk 24,26), kiel ankaŭ pri lia resurekto (Hos 6,2 → Luk 24,46). Pro la sentebla distanco de 400 jaroj inter la lasta libro de MT kaj la novtestamenta epoko ricevas la plenumitaj profetaĵoj en la kazo de Kristo sian aparte impresivan valoron koncerne la supre starigitan demandon. Ankaŭ la eksterbibliaj fontoj atestas la vivon de Jesuo, kiel ekzemple la roma historiisto Tacito (*Tacitus*), la roma altoficisto Svetono (*Sueton*) sub la imperiestro Hadriano (*Hadrian*), la roma prokuratoro de Bitinio kaj Etazio Taluso (*Thallus*) kaj aliaj. Kiel ekzemplon mi citas ĉi tie la vortojn de konata juda historiisto Jozefo Flavio (Josephus Flavius), nask. 37 post Kristo:

„*Tiutempe vivis Jesuo, saĝa homo, se oni lin tute rajtas nomi homo. Li estis, nome, la farinto de tute nekredblaj faroj kaj la instruisto de ĉiuj homoj, kiuj per ĝojo alprenis la veron. Tiel li altiris multajn judojn kaj ankaŭ multajn idolanojn. Li estis Kristo. Kaj spite al tio, ke lin Pilato pro la stimulo de la plej eminentaj anoj de nia popolo kondamnis je morto sur la kruco, liaj*

antaŭaj adeptoj tamen ne fariĝis pri li malfidelaj. Li, nome, aperis al ili la trian tagon denove viva, kiel la diaj profetoj tion kaj mil aliajn miraklajn farojn pri li antaŭanoncis.“

(Analoj pri judaj antikvaĵoj VVIII.33)

Dio mem konfirmas Jesuon sia Filo (okaze de la bapto: Mat 3,17); sur la monto de transformiĝo: Mar 9,7) kaj la anĝelo anoncas lian naskiĝon kiel *Filon de la Plejalta* (Luk 1,32). La Sinjoro Jesuo agnoskas sin dum la enketado antaŭ la alta konsilantaro, la plej alta registara kaj juĝista kolegio de Izraelo (= la ĉefpastroj, la estroj kaj la skribaĵkleruloj) sub la prezideco de la ĉefpastro Kajfo (Mat 26,63-64; Mar 14,61-62); Luk 22,70) kiel la Filo de Dio. Samtiel tre diversaj viroj kaj virinoj en la Biblio atestis Jesuon la Filo de Dio:

Petro: „*Vi estas la Kristo, la Filo de la vivanta Dio*“ (Mat 16,16).

Johano: „*En ĉiu ajn, kiu konfesas, ke Jesuo estas la Filo de Dio, Dio restas, kaj li en Dio*“ (1 Joh 4,15).

Paŭlo: „*Mi vivas en fido al la Filo de Dio*“ (Gal 2,20).

Martao el Betanio: „*Jes, Sinjoro, mi jam kredas, ke vi estas la Kristo, la Filo de Dio, la venanta en la mondon*“ (Joh 11,27).

Natanaelo: „*Rabeno, vi estas la Filo de Dio*“ (Joh 1,49).

La roma centuriono dum la krucumado: „*Vere ĉi tiu estis Filo de Dio*“ (Mat 27,54).

La etiopia ministro pri financoj: „*Mi kredas, ke Jesuo Kristo estas la Filo de Dio*“ (Ago 8,37).

Ankaŭ la diablo scias pri la dia fileco de Jesuo (Mat 4,3.6) kaj la demonoj devas lin agnoski la Filo de Dio (Mat 8,29).

Ke Jesuo estas la Filo de Dio, estis tiutempe por la fariseoj kaj la ĉefpastroj (Mar 14,53-65) kaj ankaŭ por la incitita popolamaso (Joh 19,7) la skandalo kaj tio eĉ ĝis niaj tagoj estas la dorno en la okuloj de judoj kaj islamanoj. Sed li na povus esti nia savanto kaj sanktiganto, se li estus nur nia „frato“ (*ŝalom ben ĥorin*), „la Filo inter la filoj“ (Heinz Zahrnt), bona homo aŭ socia reformisto, sed nur tiel, ke li vere estas la Filo de la vivanta Dio (Mat 16,16).

DD11: En kia rilato troviĝas Dio kaj Jesuo? Ĉu temas pri unu kaj sama persono aŭ kiu el ili estas pli alta? Al kiu ni preĝu?

RD11: Dio ne estas perceptebla per nia pensado. Li estas superspaca, supertempa kaj neesplorebla, tial ĉiuj bildaj imagoj pri Li estas por ni malpermesitaj jam en la 1-a ordono. Tamen Dio ne restis por ni „netestita“ (Ago 14,17); Li revelaciis sin al ni. Li estas *La Unuo* kaj samtempe *La Triunuo*.

1. *Dio estas La Unuo*: Ne ekzistas alia Dio krom Dio de Abrahamo, Isaako kaj Jakobo (2 Mos 3,6): „*Mi estas la unua, kaj Mi estas la lasta, kaj ne ekzistas Dio krom Mi*“ (Jes 44,6). „*Antaŭ Mi estis kreita nenia Dio, kaj post Mi ne ekzistos. Mi, Mi estas la Eternulo; kaj krom Mi ekzistas nenia savanto*“ (Jes 43,10-11). Tial tekstas la ordono: „*Ne ekzistu ĉe vi aliaj dioj antaŭ Mi*“ (2 Mos 20,3). La imagoj pri dio en ĉiuj religioj estas senvaloraj: „*Ĉar ĉiuj dioj de la popoloj estas nur idoloj*“ (Psa 96,5); ili estas „*vantaĵo, neniaĵo estas ilia faro, vento kaj senenhavaĵo estas iliaj fanditaj idoloj*“ (Jes 41,29).

2. *Dio estas La Triunuo*: Samtempe Dio nin renkontas kiel la unueco kaj en tri personoj. Ĉi tie ne temas pri tri diversaj dioj, sed – kiel dokumentas multaj bibliaj lokoj (ekz. 1 Kor 12,4-6; Efe 1,17; Heb 9,14) – pri trisoneco de la volo, faro kaj dia esto. Pri tiu ĉi triunua Dio oni parolas en tri aspektoj de persona diferenciĝo: Dio la Patro – Jesuo Kristo, la Filo de Dio – la Sankta Spirito. En la baptoordono laŭ Mateo 28,19 tio ĉi plej impresive esprimiĝas. La esprimo „La Triunuo“ (lat: *trinitas*), kiu cetere en la Biblio nenie aperas, estas la homa provo, esprimi la dian misteron per unu vorto.

En Jesuo Dio fariĝis homo: „*Kaj la Vorto fariĝis karno*“ (Joh 1,14). Dio fariĝis videbla, aŭdebla, tuŝebla (1 Joh 1,1) kaj en la fido perceptebla (Joh 6,69). Dio sendis al ni Sinjoron Jesuon kaj lin „*Dio antaŭdifinis kiel repacigilon per fido*“ (Rom 3,25). Tiel troviĝas Jesuo rilate al ni en aparta funkcia komisiono. Ni havas la savantan kredon nur, se ni kredas en Jesuon. Li iris por ni sur la krucon, li rekompencis pro niaj pekoj, li deaĉetis nin multekoste (1 Pet 1,18), kaj tial ni devas alvoki lin por esti savitaj (Rom 10,13). Per Jesuo ni havas aliron al la Patro (Joh 14,6) kaj ni rajtas kiel infanoj diri „*Abba, kara Patro*“ (Rom 8,15). Jesuo estas la Filo de Dio, li estas kun la Patro esence egala: „*Mi kaj la Patro estas unu*“ (Joh 10,30), tial li povis diri: „*Tiu, kiu vidis min, vidis ankaŭ la Patron*“ (Joh 14,9). Tomaso agnoskas al la Resurektinto: „*Mia Sinjoro kaj mia Dio*“ (Joh 20,28). La dieco de Jesuo kaj la esencegalo al la Patro esprimiĝas aldone per sekvaj egalaj titoloj kaj agadoj: Kreinto (Jes 40,28 → Joh 1,3), Lumo (Jes 60,19-20 → Joh 8,12), Paŝtisto (Psa 23,1 → Joh 10,11), La Unua kaj La Lasta (Jes 41,4 → Apo 1,17), Pardonanto de la pekoj (Jer 31,34 → Mar 2,5), Kreinto de la anĝeloj (Psa 148,5 → Kol 1,16), Adorado per anĝeloj (Psa 148,2 → Heb 1,6). La egalecon de Jesuo kun la Patro emfazas ankaŭ Paŭlo en epistolo al Filipanoj 2,6. Dum sia homfariĝo li transprenis la sklavimagon de homo. Ĉi tie li staris en plena dependeco kaj obeeco rilate al sia Patro. En la kunteksto de la homfariĝo Jesuo tiel montriĝas klara rangeco inter la Patro kaj la Filo: Samkiel la viro estas la kapo de la virino, tiel Dio estas la kapo de Kristo (1 Kor 11,3). Sed nun sidas Sinjoro Jesuo dekstraflanke de Dio kaj estas la imago de Lia esenco (Heb 1,3). La Patro donis al la Filo la tutan povon en la ĉielo kaj sur la tero (Mat 28,18), ankaŭ la juĝon Li transdonis al li (Joh 15,27). Finfine tekstas: „*Kaj kiam ĉio estos submetita al li (= Jesuo), tiam la Filo ankaŭ mem estos submetita al Tiu, kiu submetis ĉion al li, por ke Dio estu ĉio en ĉio*“ (1 Kor 15,28).

La **Sankta Spirito** renkontas nin samtiel kiel la Dia persono, tamen en aliaj funkcioj ol kiel la Filo de Dio. Li estas nia konsolanto (Joh 14,26) kaj advokato, li malfermas al ni la veron en la Biblio (Joh 14,17), li reprezentas nin antaŭ Dio per ĝusta preĝo (Rom 8,26), kaj sen li ni tute ne povus rekoni Jesuon nia savanto kaj Sinjoro (1 Kor 12,3b).

La **preĝo**: Jesuo lernis siajn disĉiplojn kaj tiel ankaŭ nin preĝi al la Patro (Mat 6,9-13); kaj kiam la apostolo Johano falis ŝokita pro la povo de la anĝelo teren kaj volis lin alpreĝi, la sendito de Dio decide refutis tion: „*Mi estas kunservisto kun vi kaj kun viaj fratoj, la profetoj, kaj kun la observantoj de la vortoj de ĉi tiu libro; adorkliniĝu al Dio!*“ (Apo 22,9). Samtiel la preĝo al Jesuo Kristo ne nur estas ebla, sed post lia alveno en tiun ĉi mondon eĉ ordonita. Li mem diris al siaj disĉiploj: „*Ĝis nun vi petis nenion en mia nomo; petu, kaj vi ricevos, por ke via ĝojo estu plena*“ (Joh 16,24). Kaj: „*Se vi petos ion de mi en mia nomo, tion mi faros*“ (Joh 14,14). En la epistolo al Tesalonikanoj Paŭlo resumas nian tutan parolon kaj faron – kaj samtiel ankaŭ la preĝon al Kristo: „*Kaj kion ajn vi faras per vorto aŭ ago, faru ĉion en la nomo de la Sinjoro Jesuo, dankante Dion, la Patron, per li*“ (Kol 3,17). Jesuo estas la nura peranto inter Dio kaj la homo (1 Tim 2,5) kaj tial ni rajtas adresi nian preĝon al li. La unua martiro Stefano estas por ni la modelo, estante la viro „*plena de la Sankta Spirito*“ (Ago 7,55). Lia preĝo al Jesuo estas tradiciita al ni: „*Jesuo, Sinjoro, akceptu mian spiriton*“ (Ago 7,59). Ankaŭ dum la surtera tempo la Sinjoro Jesuo estis alpreĝita kiel Dio, kaj li tion akceptis: la elpelito (Mat 8,2), la kuracita blinde naskita viro (Joh 9,38) kaj la disĉiploj (Mat 14,33) falis antaŭ lin. Tio laŭ la Biblio estas la plej alta esprimo de alpreĝo kaj adorado. Por preĝo al la Sankta Spirito (ekzemple en kelkaj katolikaj ekleziaj kantoj) en la Biblio tamen ne troviĝas indiko aŭ ekzemplo.

La preĝo do, laŭ la Biblio, konas nur du adresojn: Dio la Patro kaj Jesuo Kristo, la Filo de Dio.

2. Demandoj pri la Biblio (DB)

La sekva demandogrupo, ĉe kiu temas pri la valido kaj devoligo de la Biblio, estas tre bazeca. Tial ni respondos en tiu ĉi ĉapitro nur kvin demandojn kaj – konsiderante la gravecon de tiu ĉi temo – ni kontinuos per tre elĉerpa aldono.

DB1: *Biblion tamen verkis homoj, do oni rigardu ĉion-ĉi pli malpli relative.
Kiel vi povas diri, ke ĝi venas de Dio kaj ke ĉio en ĝi estas vera?*

RB1: Ni volas montri la esencon de la demando surfone de la biblia vero en elektita ekzemplo, kiu havas avantaĝon, ke oni ĝin povas matematike kompreni. La Biblio entute enhavas 6408 versiklojn kun profetaj donitaĵoj; el ili ĝis nia tempo jam efektiviĝis 3268 da ili, dum la restintaj profetaĵoj koncernas la eventojn en la estonto. Neniu el tiuj antaŭdiroj efektiviĝis en ŝanĝita maniero aŭ formo. Io simila troviĝas en neniu alia libro de la mondhistorio. Ni havas ĉi tie ankaŭ matematike esprimeblan staton de la aferoj, kiu ne havas paralelon ie alie. Nin ni demandos, ĉu estus eble, ke tiom da profetaĵoj hazarde plenumiĝus, tio diras, ĉu ilia efektiviĝo estus klarigebla sen la efektivigo fare de Dio. Tiucele ni utiligos la verŝajnkalkulon. En la sekva kalkulmodelo ni ne konsideros, ke foje pluraj bibliaj versikloj servas por priskribi unu nuran profetaĵon kaj aliflanke unu versiklo povas enhavi ankaŭ plurajn profetaĵojn. Samtiel ni ne observos la fakton, ke kelkaj profeteldiroj estas menciitaj plurfoje. Tiun ĉi simpligon ni tamen kontraŭpesos per sekva aldono por matematike esprimi la bazan verŝajnon.

Se ni prenas tre altan bazan verŝajnon $p = 0,5$ por *hazarda* plenumiĝo de unuopa profetaĵo, tio donas por la komuna verŝajno w por 3268 da ĝis nun plenumiĝintaj profetaĵoj matematike eksaktan rezulton. Ĝi estas: $w = 2^{-3268} = 1,714 \cdot 10^{-984}$. La profetaj eldiroj estas tiaspecaj, ke oni devus la aperon de ĉiam denove priskribita evento matematike prezenti en rilato 1 : 1000 ĝis 1 : pluraj milionoj. Per la supozo 1 : 2 (= 0,5) ni troviĝas sur la absolute sekura flanko. Por kompari la nombrojn koncerne la unuon de verŝajno w ni observu kelkajn elpensitajn loteriajn sistemojn. Se la verŝajno por plena loteria trafo ĉe la komerca cifera loterio „6 el 49^{cc} – do 49 kampoj kun avanca nombraro estas proksimume 1 : 14 milionoj, do ni starigu la demandon: Je kiomaj kampoj devus esti plilarĝigita la dua loteria bileto, ke per ĝi samtiel estus atingita la plena trafo, por ke ni atingu tiun gradon de verŝajno, kiu korespondas kun 3268 profetaĵoj? Kia estu nia supozo?

a) la surfaco de tenistabula plato?

Sur la surfaco de $A = 1,525 \cdot 2,74 \text{ m}^2 = 4,1785 \text{ m}^2$ estas $L = 167\ 140$ da unuopaj kampoj en la grandeco de kutima loteria bileto ebla.

b) la surfaco de futbala ludkampoj?

Supoze ke $A = 7350 \text{ m}^2$ estas $L = 459\ 375\ 000$ da unuopaj kampoj eblaj.

c) aŭ rekte la surfaco de la tuta terglobo?

Supoze ke $A = 510$ milionoj da m^2 estas $L = 31,3653 \cdot 10^{18}$ unuopaj kampoj eblaj. Estu klare, ke 10^{18} signifas unu trilionon, kio estas unu miliono da biliardoj.

Se oni kalkulas la verŝajnecojn por eltiri ses ĝustajn kampojn supoze de L numeritaj kampoj, rezultas el tio laŭ supre donitaj surfacoj sekvaj valoroj:

a) $w = 1 : 0,4 \cdot 10^{30}$ (resp. $2,5 \cdot 10^{-30}$)

b) $w = 1 : 1,3 \cdot 10^{49}$ (resp. $7,69 \cdot 10^{-50}$)

$$c) w = 1 : 1,3 \cdot 10^{114} \text{ (resp. } 7,69 \cdot 10^{115}\text{)}$$

Ni vidas surbaze de la nombroj por w , ke la komparoj a) ĝis c) estas komplete nesufiĉaj. La matematika rezulto por la kampnombro estas rekte spirhaltiga! Por ĉi-dimensia komparo ni devas preni la sumon de ĉiuj atomoj en la universo, kaj tiun oni per la nombro 10^{80} vere ne povas imagi. Estas unu 1 kun 80 nuloj aŭ alimaniere dirite, la nombro de 10 miliardoj okoble multiplikigita per si mem. Al la elkalkulita transastronomia nombro de $2,74 \cdot 10^{164}$ kampoj de tiu imagita loteria superbileto oni venas nur per plia komparo, kiu transiras nian imagokapablon ankoraŭfoje: Ni imagu tiom da samdimensiaj universoj, kiom da atomoj unu el ili havas, tiam la sum-sumo da atomoj en ĉiuj tiel imagitaj universoj ankoraŭ estas je la faktoro 27 400 malpli granda ol la bezonata nombro de loteribiletaj kampoj. [G1, 139].

Post supraj konsideroj ni povas eltiri unu nuran akcepteblan konsekvencon: la profetaĵoj havas diecan naturon, ili povas veni de neniu homo. Tiel la kalkuloj nin kondukas al rezulto, ke Jesuo en sia konata preĝo al la Patro (ofte false prezentita „ĉefsacerdota preĝo“, kvankam ĉi tie ne temas pri la ĉefsacerdota servo, t.e. pento por la pekoj de la popolo) donas al ni skizitan formulon: „*Via vorto estas la vero!*“ (Joh 17,17). La Biblio tiel ne povas origini ĉe la homoj, sed validas, ke „*Ĉiu skribaĵo inspirita de Dio estas*“ (2 Tim 3,16). Dio utiligis elektitajn homojn, al kiuj Li donis por ni gravajn informojn, por ke ili tiujn por ni notu – sen ke ili ĉe tio ekskludu sian personecon, sian naturon kaj siajn sentojn. Pli pri tiu ĉi demando estas trovebla en tri subĉapitroj en la aldono „Bazaj frazoj pri la Biblio“: I.1 Pri ĝia origino; I.2 Pri ĝia vero; I.3 Pri la enketado de la biblia vero.

DB2: *Kiamaniere mi povas enketi, ĉu la Biblio diras la veron?*

RB2: Ĉu iu matematike formulita fizika proceso aŭ iu priskribita kemia reagado sub difinitaj kondiĉoj okazas aŭ ne, tio ne povas esti decidita dum diskuto, sed per pruvebla eksperimento. Kontraŭe al ĉiuj aliaj tekstoj, ideologioj kaj religioj la Biblio mencias metodojn, kiamaniere ĝia vero povas esti eksperimente pruvita. Kiu ne demandas nur filozofiece, sed volas veni al vera konvinko, estas invitita al la eksperimento, pri kiu Dio mem garantias:

„*Ĉi tiu libro de la instruo ne foriĝu de via buŝo, sed meditu pri ĝi tage kaj nokte, por ke vi zorge plenumu ĉion, kio estas skribita en ĝi; ĉar tiam vi havos feliĉon sur viaj vojoj, kaj tiam vi havos sukceson*“ (Jos 1,8).

Tiu ĉi eksperimento konsistas do el tri paŝoj:

- 1. Konatiĝi kun la priskribo de la eksperimento:** Unue temas pri tio, per intensa legado konatiĝi kun la biblia enhavo.
- 2. Procedigo de la eksperimento:** En la dua paŝo oni praktiku ĉiujn rekonitajn instrukciojn en sia vivo.
- 3. Kontrolo de la eksperimentaj informeroj:** Ĉiuj homoj deziras por si sukcesohavan vivon en geedzeco kaj familio, profesio kaj libertempo. La senditaj demandoj al la konsilistoj de la flava gazetaro atestas pri tio abunde. Tamen neniu psikologia konsilisto, neniu industria manaĝero kaj neniu politika konsilanto disponas pri absoluta recepto por sukceso. Nur la Biblio promesas sub la supre menciitaj kondiĉoj sukceson kaj saĝan konduton en la vivo.

Persono, kiu faras tiun ĉi eksperimenton, ĉiam atingas pozitivan bilancon. Troviĝas nek perdo nek risko, do nenia perdita investo kiel okaze de loteria ludo aŭ se temas pri interezperdo ĉe

kreditoj. Tiu, kiu kuraĝas praktiki sian vivon helpe de la Biblio, havas rilaton al Dio kaj havos grandan profiton. (Pliaj enketoblecoj estas menciitaj en la aldono „Rimarkoj al la Biblio“, parto I.2 „Kiamaniere enketi la verecon de la Biblio?“).

DB3: *Kio estas en la Biblio alie ol ĉe ĉiuj aliaj libroj de la mondliteraturo?*

RB3: La Biblio diferencas disde ĉiuj ceteraj libroj de la mondhistorio baze en pluraj aspektoj tiel, ke ĝi estas la unueca, unika kaj nekomparebla verko:

1. *Spite al pli ol 1000-jara daŭro de estiĝo demonstras la Biblio unikan kontinuecon:* La Biblio estis skribita en la tempa kadro de pli ol 1500 jaroj de proksimume 45 skribistoj de tre diferenca provenienco kaj profesio. Al ili apartenas akademiano Moseo, militista estro Josuo, la kanceliero Danielo, la reĝa trinkaĵservisto Nehemio, la reĝo Davido, la paŝtisto Amoso, la fiŝkaptisto Petro, la doganisto Mateo, la kuracisto Luko aŭ la ekzilanto Johano – sub ĉiuj eblaj etosoj de la skribistoj, kiel ĝojo kaj amo, angoro kaj zorgo, plago kaj malespero. Sed spite al tiu nenie cetere troviĝinta gamo da 60 generacioj koncerne la tempan dimension de la estiĝo kaj spite al socitavolaj diferencoj inter la skribistoj, la Biblio estas karakterizita de unueca, fajne harmoniziita temaro. La skribistoj pritraktas centojn da temoj kun aparte impresiva harmonio kaj kontinueco. Se tiuj homoj sen Dia faro el tiom disaj epokoj kaj sub tiom disiraj personstrukturoj prilaborus tioman temogamon, konforme al oniaj spertoj oni ne povus atendi tioman unuecon. Resume dirite, la biblia instruo pri Dio kaj pri Lia savhistorio kun la homoj etendiĝas tra la tuta Biblio kiel ruĝa fadeno.

2. *La Biblio enhavas tiom larĝan palettron da literaturaj specioj, kiaj troviĝas en neniuj aliaj libroj* (vidu B58 en la Aldono, parto I). Kontraste al tio mankas en la Biblio tiaj tekstoj, kiuj ne havas responson al la vero, kiel fabeloj, legendoj kaj rakontoj. Samtiel oni en ĝi ne trovas tiajn troigojn kaj maltroigojn, kiaj kutimas en satiroj, glosoj, heroaj paroloj aŭ komedioj.

3. *La Biblio estas karakterizita de estiminda plurfaceteco.* Ĝi estas samtempe la libro pri kreda, prileĝa kaj prihistoria. Ĝi donas bazojn por multaj kampoj de scio kaj enhavas milojn da vivreguloj por plej diversaj situacioj. Ĝi estas la plej bona konsilfonto pri geedzeca vivo kaj priskribas, kiamaniere oni konduku rilate al siaj gepatroj kaj infanoj, amikoj kaj malamikoj, najbaroj kaj parencoj, al fremduloj, gastoj kaj samkredantoj (elĉerpe pritraktite sub la demando DV3). Ĝi raportas pri la origino de tiu ĉi mondo kaj de ĉiu vivo, pri la esenco de la morto kaj pri la fino de la mondo. Ĝi montras al ni la esencon de Dio; de Patro Dio, de Lia Filo Jesuo Kristo kaj la efikojn de la Sankta Spirito.

4. *La Biblio estas la nura libro kun absolute fidindaj profetaj eldiroj.* Ili venas de Dio mem (1 Sam 9,9; 2 Sam 24,11; 2 Pet 1,20-21) kaj oni ilin tiel povas trovi en neniuj aliaj libroj de la mondhistorio (same ne en Korano aŭ en la notaĵoj de la franca okulta aŭguristo Nostradamo). La tempaj distancoj inter la tekstestiĝo kaj plenumiĝo estas tiom grandaj, ke eĉ la plej severaj kritikistoj ne povus kontraŭdiri, ke la profetaĵoj nur estis enskribitaj, post kiam la eventoj jam okazis (pli elĉerpe en [D1, 118-148]).

5. *La tempa eldirkadro de la Biblio ne havas komparon.* La eldiroj de la Biblio etendiĝas de la komenca punkto de la fizika tempoakso (kreo) ĝis la fina punkto (Apo 10,6b). Neniuj aliaj libroj peras ion certan pri la komenco de la tempoj kaj neniuj povas priskribi la eventojn je la fina punkto de la tempoakso. Transe de ĉio-ĉi parolas la Biblio pri la eterno, nome tiu realo, en kiu niaj malvastigantaj tempoleĝoj neniun validon plu havas.

6. *Neniu eldiro de la Biblio montris sin falsa.* Neniam devis la sciencaj konsideroj de la Biblio surbaze de esplorrezultoj esti reviditaj. Kontraŭe troviĝas aro da ekzemploj, kiam la sciencaj priskriboj en la Biblio nur plurajn jarcentojn post ilia notado estis konfirmitaj de la esploristoj (ekz. la nombro de la steloj: [D7, 15-23]; formo de la tero [D1,59-60]).

7. *Neniu cetera libro priskribas la homon tiom realisme kiel la Biblio.* Ĉi tie troviĝas neniu komediaj troigoj, neniu plibeligitaj biografioj kaj neniu glorigita heroeco, kiuj kovrus la negativajn flankojn de la homoj aŭ ilin kaŝus. Tiel en la Biblio la pekoj de la patriarkoj (1 Mos 12,11-13), la malĉastado de Davido (2 Sam 11) kaj la malordo en la komunumoj (1 Kor 1,11; 2 Kor 2,1-4) ne estas prisilentitaj.

8. *Kiel neniu alia libro entenas la Biblio la aperojn de estonto, kiujn ĉe la tiama scistato de la homaro neniu homo povis supozi* (ekz. kosmaj laboratorioj, orbitalaj stacioj) kaj inkluzivas en sian instruon la situaciojn, kiuj nur post multaj jarcentoj okazis (ekz. konsumado de narkotoj: 2 Kor 6,16-17; genteknologio: rigardu demandon DV10).

Jam tiuj ĉi cititaj apartaĵoj montras la Biblion eksterordinara libro, kiu eĉ proksimume ne havas komparon kun iu alia. La historiisto *Philip Schaff* priskribas la unikecon de la Skribo kaj tiun, pri kiu ĝi tekstas, tre trafe:

„Tiu ĉi Jesuo el Nazareto supervenkis sen mono kaj armiloj pli multajn milionojn da homoj ol *Aleksandro, Cezaro, Mohamedo* kaj *Napoleono*; sen sciencoj kaj instruiteco li ĵetis pli da lumo super la diaj kaj homaj aferoj ol ĉiuj filozofoj kaj kleruloj kune; sen retorika lerteco li elparolis la vortojn de la vivo, kiaj neniam antaŭe aŭ poste estis eldiritaj kaj alcelis la efikojn kiel neniu alia retoro aŭ poeto. Sen ke li mem skribus unu nuran linion, li ekfunkciigis pli da plumoj kaj liveris materialon por pli da predikoj, paroladoj, diskutoj, instruprojektoj, artaĵoj kaj himnoj ol la tuta armeo da grandaj viroj de la antikvo kaj moderno.“

(*J. McDowell: Die Bibel im Test, p. 54*)

Kvankam la Biblio estas ekzakte analizebla laŭ la nombro de ĝiaj vortoj kaj literoj (ekz. la angla versio „King James“: 783 137 vortoj kaj 3 566 480 literoj), la pleno da pensoj tamen ne estas registrebla. Neniu homa vivo estus sufiĉe longa por perceti la kompletan penstrezoron (Psa 119,162). Tiel oni povas laŭplaĉe ofte legi la Biblion kiel la solan libron, sen ke ĝi fariĝus enua. Per ĉiu nova legado malfermiĝas novaj pensoiroj kaj diagonalaj ligoj kun aliaj tekstopartoj. Tiel ni venas al signifoplena konkludo: La Biblio estas la unika Dia libro. Ĝia vero estas certigita kaj aŭtorizita de Dio (Psa 119,160; Joh 27,17).

DB4: *Ĉu niatempe ni disponas pri novaj mesaĝoj komplemente al la Biblio? Ĉu Dio ne estas pli granda ol la Skribaĵo, por ke Li senpere parolu al iu homo?*

RB4: Oni devas distingi inter du manieroj paroli ĉe Dio: la por ĉiuj homoj validan Biblion kaj la individuan kondukadon de la unuopa persono fare de Dio.

1. Ĉu komplementaĵoj al la Biblio? Paralele al la estiĝo de la bibliaj skribaĵoj fare de ĉe Dio vokitaj kaj de Li aŭtorizitaj viroj (ekz. Jer 1,5; Gal 1,12) aperis ankaŭ falsaj profetoj kun arbitraj mesaĝoj. La demandon, kiu ankaŭ nin skuas: „Kiamaniere mi povas rimarki, kiun vorton la Sinjoro ne diris?“ (5 Mos 18,21) Dio respondas per decida kriterio por eneketi la verecon:

„Kion la profeto diros en la nomo de la Eternulo kaj la afero ne fariĝos kaj ne plenumiĝos – tio estas la vortoj, kiujn la Eternulo ne diris; pro aroganteco diris tion la profeto; ne timu lin“ (5 Mos 18,22).

Ankaŭ en sia Prediko sur la monto Jesuo avertas antaŭ la falsaj profetoj kaj same nomas la karakterizojn por ilin identigi:

„Gardu vin kontraŭ la falsaj profetoj, kiuj venas al vi en ŝafaj feloj, sed interne estas rabemaj lupoj. Per iliaj fruktoj vi konos ilin. Ĉu el dornarbetoj oni kolektas vinberojn, aŭ el kardoj figojn?“ (Mat 7,15-16).

La apostolo Johano ne indikas malpli forte la danĝeron: *„Ĉar multaj delogantoj eliris en la mondon, kiuj ne konfesas Jesuon Kriston venantan en karno. Tio estas la deloganto kaj la antikristo. Gardu vin, ke vi ne perdu viajn elfaritaĵojn, sed ke vi ricevu plenan rekompencan. Ĉiu, kiu iras antaŭen kaj ne restas en la instruado de Kristo, ne havas Dion; kiu restas en la instruado, tiu havas kaj la Patron kaj la Filon“ (2 Joh 7-9).*

Nur la Biblio estas revelaciita de Dio. Laste Dio parolis per sia Filo (Heb 1,1) kaj nun okazos neniua nova revelacio plu (Apo 22,18). Al la vorto de la Biblio ne estas io por aldoni. Jam Petro admonis siatempe antaŭ „koruptaj sektoj“ (2 Pet 2,1), kiuj per arbitraj instruoj kondukas la homojn al pereco. La aldonoj kaj kripligoj de la Biblio fare de Joseph Smith (libro Mormono), de Jakob Lorber (Amikaro de novrevelacio), Ch. T. Russel (Atestantoj de Jehovo), de M. Baker Eddy (Kristana scienco) kaj aliaj ne estas mesaĝoj de Dio, sed bedaŭrindaj misvojoj de falsaj instruistoj kaj delogantoj. Dio donas neniujn aldonajn revelaciojn, sed nur novan lumon pri tio, kion Li jam delonge mesaĝis al ni en la malnova kaj nova testamentoj. Tiel la Biblio restas la unika deviga informfonto kaj la unika mezurilo, je kiu ĉio estas enketenda. Ankaŭ la citaĵoj de niaj samtempuloj kun la enkonduka aŭtoriza formulo „La Sinjoro diris al mi...“ bezonas pro supraj argumentoj tre severan pruvon.

2. La individua kondukado fare de Dio: ofte ni deziras por ni rektan parolon de Dio en certa situacio. Dio povus tion fari, sed tio ne estas lia metodo. Martin Luther, John Wesley, Hudson Taylor aŭ Bill Graham estis resp. estas signifaj viroj de Dio kaj faris ekstraordinarajn aferojn. Ili argumentis per la vorto de Dio kaj tie ricevis impulsojn por sia benita laboro. Nia preĝo *„Montru al mi, Sinjoro, vian vojon!“* (Psa 86,11) alpreĝas la intervenon de Dio en nia vivo. Tio estas sperteblo kaj nur post la evento sendube rekonebla kiel la interveno de Dio, sed ĉio-ĉi okazas en silento, sen fizike aŭdebla voĉo de Dio.

DB5: *Kiamaniere vi aprecus la verkon „La Biblia kodo“ de M. Drosnin?*

RB5: La usona ĵurnalisto *Michael Drosnin* asertas en sia libro *La Biblia kodo*, ke la Biblio posedas sekretan kodon kaj ĝi laŭaserte nun estas deĉifrita. La hebrea teksto de kvin libroj de Moseo (= 304 805 literoj) estis unue, sen konsideri la interspacojn, storita en komputilo. Poste el tiu literamaso estis elprenita ĉiu *n*-a litero per la distanco $n = 2,3,4$ aŭ 17, 35 ktp.), per kio estis produktitaj ĉiam novaj liter serioj. Per movoj de la kalkulkomenco troviĝas ebleco, produkti pliajn liter seriojn. La tiel ricevitaj liter serioj estis ordigitaj en blokoj kun certa kolon-kaj lininombro. En tiaj arbitre konstruitaj tekstoblokoj oni poste serĉas aperantajn literojn, kiuj enhavas sencohavan signifon kaj oni ilin laŭaserte povus interpreti en profeta senco por nia estonto. Kiamaniere ni do prijuĝu tiun ĉi metodon?

Informteoriaj objetoj:

1. Tiu ĉi procedmetodo estas plene arbitra kaj per nenio argumentebla. Ke en tiom giganta kaj preskaŭ neelĉerpebla vorttrezoro tie kaj tie aperas nomoj kaj vortoj, kiuj portas certan signifon, estas ĝuste neevitebla. La celsukceso pligrandiĝas eĉ draste, ĉar oni rajtas dumserĉe legi antaŭen, returnen, vertikalen, diagonalen kaj arbitre miksite. Eĉ pli: ankaŭ transsalti oni rajtas plurajn literojn.

2. La pli granda parto der literblokoj estas verdire forfalajo, en kiu eĉ sub konstanta metodŝanĝo neniuj signifoportaj elementoj estas troveblaj. Aldone helpas al tiu ĉi maniero ludi per literoj la specifa eco de la hebrea lingvo, ke certaj vokaloj ne estas skribataj. Tiamaniere aldone kreskas la celsukceso.

3. Ĉe la metodo de Drosnin estas la karakteroj ĉiam elprenitaj el la sama fonto. Tiamaniere estas garantiite, ke la frekvenco de la aperoj de la literoj ne estas ŝanĝigita. La hazarda apero de vortoj el la lingva trezoro de la hebrea lingvo estas tial multe pli verŝajna ol la elpreno el iu bazeno kun alia disdivido.

4. La karakterizado „biblia kodo“ por la statistikaj ludoj de Drosnin estas misgvida, ja la kodo ĉiam havas sendinton (aŭtoron) [D5, p. 67-80]. Ĉiujn ĉi tie prikonsideritajn literselektadojn oni devas rigardi kiel hazardseriojn, kiuj principe ne povas esti deĉifritaj, ja ili laŭdifine portas en si neniun signifon. Tiel ĉio, kion Drosnin provas ellegi, estas pura arbitro kaj sen iu ajn intenco de la sendinto.

5. La aŭstralia matematikisto Brendon McKay aplikis la metodon de „biblia kodo“ sur la angla romano *Moby Dick* kaj li povis sammaniere ellegi „sensaciajn“ rezultojn. Tiamaniere li demonstris, ke la rezulto estas sendependa de la uzita fonto. En sufiĉe riĉa literamaso oni povas trovi preskaŭ ĉion, kion oni serĉas. Literojn, kiuj ne kongruas kun la intencita komplekso, Drosnin simple ignoras. Cetere: McKay trovis ankaŭ la vorton „Drosnin“ kaj en senpera proksimo la vorton „liar“ (= mensogulo).

Bibliaj objetoj:

1. La centra mesaĝo de la Biblio estas la savhistorio de Dio kun la homoj. Ĝi montras al ni, kiu estas Dio kaj kiu Jesuo Kristo kaj kiamaniere ni atingas la savon kaj tiel la eternon. Sensaciaj politikaj eventoj ne estas bibliaj temoj. Kaj ĝuste ĉi tie alkroĉas sin Drosnin per sia serĉado kaj pozicias sin tiamaniere kontraŭ la biblia revelacia intenco. La supoze deĉifritaj mesaĝoj do neniamaniere kongruas kun la konteksto de la Biblio.

2. La arbitre kombinitaj vortoj de Drosnin troviĝas nek en iu ajn ordstrukturo nek venas el ili kompletaj frazoj. Kontraste al tio la afero de la Biblio estas, esprimi sin per kompreneblaj frazoj, por ke oni facile perceptu la sencon (Efe 6,17). Dio revelaciis sin per sia vorto (senpere legeble) (2 Tim 3,16; Gal 1,12; 2 Pet 1,21), sed ne en enigma komputa ludo. La mesaĝo de la Biblio estas tiel aranĝita, ke jam la komencantoj en la kredo ĝin povas kompreni (1 Pet 2,2). Do ĝi ne povas esti envolvita ene de iu sekreta kodo, kiu nur je la fino de la 20-a jarcento povus esti deĉifrita.

3. Drosnin desegnas difektitan bildon pri Dio, kiu kontraŭdiras la Biblion. Tiel li skribas ekzemple: „Pli kaj pli ŝajnis, kvazaŭ ĝi (= la kodo) estus ali ni bonvola, tamen ne ĉiopova estaĵo, kiu volas nin averti antaŭ la minacita danĝero, doni al ni eblecon, ke ni mem nin gardu“ (p. 161). La fino de tiu ĉi tero laŭ la Biblio neniukaze estos kaŭzita per iu kometo, sed per la juĝo de Dio (2 Pet 3,7.10). Koncerne la tempopunkton (2 Pet 3,10) neniuj troviĝas en la pozicio menciitaj jarnombroj, samtiel ne la „biblia kodo“.

4. Drosnin skribas: „Mi ne estas religia kaj mi ne kredas en Dion“ (p. 191). La revelacio de Dio tamen venas nur al la homoj, kiuj en Lin kredas kaj Lin fidas (Amo 3,7). Tial Drosnin estas kategorigita inter falsajn profetojn.

Ni konkludu: la „biblia kodo“ estas laŭ la procedmetodo laŭplaĉa literludo, ĉe kiu estas ignoritaj la bazaj informteoriaj aspektoj. Tiu ĉi nur al sensacia soifo adaptita koncepto kreas al si spacon por senresponsaj spekulacioj. La de Drosnin el fragmentoj konstruitaj eldiroj kontraŭdiras la aŭtentan esencon de la biblia revelacio kaj pozicias sin tiel kontraŭ Dio kaj Lia mesaĝo.

3. Demandoj, kiuj koncernas la kreadon, la sciencon kaj la fidon (DK)

DK1: *Ĉu troviĝas transiro de la neviva materio ĝis la vivantaj organismoj?*

RK1: La iama akra diferencigo inter la neorganika kaj organika kemio havis gravan argumenton. En la naturo, netuŝita de iu ajn influo de ekstere, estiĝas la organikaj komponaĵoj nur pro la aktivado de organismoj. Per morto de organismo komencas la retrograda proceso: la organikaj substancoj disfalas en neorganikajn partiklojn. Kiam la kemiisto F. Wöhler en la jaro 1828 ŝanĝis la sendube neorganikan amoniocianaton en la organikan komponaĵon de urino, tiu baza diferenco ne plu validis. Helpe de celalstrebaĵoj kaj planmetode procesitaj agoj oni niatage estas kapabla sintezi multajn organikajn komponaĵojn. Sed por tion atingi oni nepre devas posedi konon de kemio kaj de la procedtekniko, resume: la uzon de la spirito! Se oni nun observas la vivajn estaĵojn, oni povas konstati, ke sur la fizik-kemia nivelo ĉe la plantoj kaj la animaloj kaj same ĉe la homoj troviĝas nenijaj procesoj, kiuj kontraŭdiras la fizikajn kaj kemiajn procesojn ekster la vivaj estaĵoj. La konataj naturleĝoj ankaŭ ĉi tie retenas sian plenan validon. Inter la senviva materio kaj la materio en la vivestaĵoj troviĝas neniu principa diferenco sur la nivelo de la kemiko kaj fiziko. La novdarvinaj konceptoj pri la estiĝo de la unuaj vivestaĵoj en la prasupa atmosfero ignoras tiun ĉi ekkonon kaj asertas, ke troviĝas laŭcirkonstanco glata kaj senproblema transiro de la senviva materio al la vivaj organismoj. Viva organismo tamen ne devas esti miksita kun la materio ene de la vivestaĵo. La tuteca apero de la organismo ne estas plenkonsidere komprenata, se oni ĝin pritraktas nur sub la aspekto de izolita klarigeblo de ĝiaj unuopaj partoj. La organismoj enhavas kiel gravan aldoniĝon **la informon**, do tiun spiritan grandecon, kiun la materio el si mem ne povas produkti. La informo estas tiu unuo, kiu zorgas, ke ĉiu vivestaĵo tendencas al certa aperformo kaj troviĝas en povo multobliĝi. En la senviva naturo la principo de multobliĝo (reproduktado surbaze de la ene ĉeestanta informo) ne troviĝas. *Tiel la informo iĝas la karakteriza kriterio, por klare distingi la vivan organismon disde la senviva materio.* Samtiel la estiĝo de individua vivestaĵo – kontraŭe al la estiĝo de kristaloj – havas nenium ligan kun fizik-kemia strukturleĝeco. Koncerne la fenomenon *vivo* temas pri kvalito, kiu troviĝas transe de la fiziko kaj kemio. Ĝuste la t.n. evoluciaj eksperimentoj, kiuj devus pruvi, ke la estiĝo de la vivo estas la pure fizik-kemia fenomeno, konfirmas nian aserton: *Neniam povas informo estiĝi per fizik-kemia eksperimento!*

- Koncerne la multfoje cititajn eksperimentojn de Miller oni povis sintezi kelkajn aminoacidojn, kiuj estas la fundamentbrikoj de proteinoj; tamen neniam estiĝis ankaŭ iu ajn informo. Tiel tiu ĉi provo troviĝas ekster de tio, kion oni povus karakterizi evoluciekperimento.

- La t.n. hiperciklo, koncipita de M. Eigen, estas pure pensa eksperimento sen nepra praktike eksperimentita konfirmo. Helpe de t.n. „evoluciaj maŝinoj“ volis Eigen levi la evolucion al la statuso de eksperimenta kvalito. Responde al la scienca revuo „*Bild der Wissenschaft*“ (H. 8, 1988, p. 72) li diris: „En iu el niaj maŝinoj ni igis evolui bakteriojn ... Tiu ĉi projekto jam montras sukceson. Ene de nur tri tagoj ni povis izoli unu mutaciitan bakterion, kiu montris certan rezistopovon. La ekzemplo montras, ke estas eble simuli la evolucian proceson en laboratorio.“ Tiaj eldiroj vekas impreson, ke ĉi-okaze sukcesis evolucia eksperimento. En vero oni uzis *jam ekzistantajn* vivestajojn. Ankaŭ ĉikaze estiĝis neniua nova informo, sed nur per la jam ekzistantaj estis faritaj eksperimentoj, kiuj tiamaniere liveras neniun eldiron pri estiĝo de la informo.

Validas konstati kiel signifan fakton: *En neniua laboratorio de la mondo iam ajn sukcesis el senviva organika substanco „fabriki“ vivan organismon.* Tio ĉi estas tiom pli grava, ĉar la biotekniko evoluigis multajn manipuleblecojn por eksperimenti per vivaj organismoj. Sed karakterize estas, ke tiu biotekniko ĉiam uzas la jam vivajn organismojn kaj nur provas manipuli ilin. Evidente la abismo inter la kemiteknikaj procedoj kaj la biotekniko estas nevenkebla. Jes, eĉ se iun tagon post senlaca esplorklaboro kaj uzo de ĉiuj scioj estus eble fabriki vivan organismon, tio nur pruvus: La vivo estas klarigebla nur per la ĉeesto de spirito kaj krea ago.

DK2: *Kiom aĝa estas la tero, kiom la universo? Ĉu ekzistas scienca metodo por konstati la aĝon de la tero? Kio pri la metodo C14?*

RK2: Ĝis nun neniua fizika metodo estas konata, por mezuri la aĝon de la tero aŭ de la universo. Kial ne? Do, en la universo ne troviĝas horloĝo (en formo de tempomontra okazaĵo), kiu tiktakus ek de la kreo de la mondo. La radioaktiva disfalo de nestabilaj atomoj ŝajnas unuarigarde kiel konvena horloĝo. Tamen. Ĉiu nestabila izotopo de certa kemia elemento posedas propran duontempon de sia disfalado. Tio faras tiun tempokadron T , ene de kiu la ekzistanta nombro de atomoj per radioaktiva disfalado reduktiĝas je duono. De la en la naturo ekzistantaj 320 izotopoj pli ol 40 estas konataj kiel radioaktivaj. Ĉe la radiometriaj aĝenketadoj oni supozas tiun ĉi fizikan efekton. Oni diferencigas la *longtemporojn*:

horloĝo surbaze de urano/torio-plumbo: $T = 4,47 \cdot 10^9$ jaroj ĉe urano 238 (^{238}U),

horloĝo surbaze de kalio-argono: $T = 1,31 \cdot 10^9$ jaroj ĉe kalio 40 (^{40}K),

horloĝo surbaze de rubidio-stroncio: $T = 48,8 \cdot 10^9$ jaroj ĉe rubidio 87 (^{87}Rb)

kaj mallongtempa horloĝo ^{14}C (eldire: C-14) per $T = 5730$ jaroj.

Ĉe la matematika pritrakto de fizikaj disfalekvacioj oni disponas ĉiam pri unu ekvacio malpli ol la sistemo havas da nekonatoj. Tia sistemo estas matematike principe nesolvebla. Tio en la fizika senco signifas: la elira kvanto de disfalmaterialo estas nekonata, ja neniua scias, kiom da nestabilaj atomoj troviĝis okaze de la estiĝmomento. Apude troviĝas ankaŭ la t.n. *izokrona* metodo, kiu provas la nescion pri la deira kvanto ĉirkaŭiri tiamaniere, ke estas permesite uzi nur la kungenezajn provpecojn. La nescio transportiĝas tiamaniere sur tion, ke ne troviĝas aprioraj kriterioj pri tio, ĉu iu provpeco apartenas al la kungeneza tuto aŭ ne.

Alia kazo estas ĉe la metodo ^{14}C . Ĉi tie oni povas la deirvaloron konstati helpe de dendrokronologio (kalkulado de arboringo). Ĉar la plej aĝaj arboj havas 5000 jarojn, oni povas rilate al ĉiu unuopa arboringo de unu jaro kalkuli la deiran kvanton al la koncerna aĝo.

La plej aĝa al ni konata planto (observita en la jaro 1989), nodhava pino (pinus aristata), havas 4915 jarojn kaj kreskas en Nevado en Usono. Per nombro da arboringoj oni ricevas mezurkurvon, kiu nun permesas elkalkuli ankaŭ la aĝon de provpeco de nekonata aĝo helpe de komparo. La metodo ^{14}C estas tamen aplikebla nur enkadre de kelkaj miljaroj. La cititaj milionjaroj enkadre de la evolucia doktrino ne fundamentas sur eksaktaj fizikaj mezuroj, sed sur la t.n. „geologia temposkalo“, kiu deiras de la supozo, ke la tempodaŭro de ĉiu geologia formacio estas proporcia al sia plej granda sur la tero trovita tavoldikeco. Tiu ĉi teorio anticipas, ke por ĉiuj formacioj la maksimuma tavoloĝrapideco estas ĉiam konstanta kaj senescepte la sama. Eĉ interne de la evolucia aspekto tiu ĉi supozo ne estas argumentebla. Tiom pli malmule ĝi povas validi sub la konsidero de la tutmonda diluvo!

Do, ni tenu la aferon konstatante: La fizikaj grandecoj (kiel ekz. la tempo) estas absolute mezureblaj nur tiam, se dum certa procedo estas donita fizika efekto kvante kaj tiu mezurvaloro helpe de pesila maso (mezurkurvo aŭ mezurskalo) estas alskribita al la nombro de difinitaj unuoj. Se oni dronigus merkurian termometron sen la temperaturskalo en bolantan akvon, la merkuria stupo cetere kreskus, sed la absolutan temperaturon oni ne povus legi. Nur kompara mezurado per same almezurita termometro donus la eran valoron de la mezurado. En la kazo de radiometriaj longtemporloĝoj simple mankas la „almezurita instrumento“ (ekz. en la formo de iu natura proceso, ĉe kiu oni povus legi la tempajn distancojn).

La plej aĝa *pruvebla* profanhistorio komenciĝas en antaŭazia regiono kaj Egipto proksimume 3000 jarojn antaŭ Kristo. (Kurioze akordiĝas tiu ĉi tempokadro kun la aĝo de la plej maljuna arbo!). La plej larĝan historian revenon oni trovas sendube en la Biblio. Ĝi etendiĝas ĝis la unua de Dio kreita homparo. La konsekvenca registrado de genealogioj liveras nin per nuraj konstatablaj kaj fidindaj tempokadroj ek de la krea ago. Eĉ se oni ne rigardus la genealogiarbajn listojn kompletaj, oni konstatas per ili la teraĝon de kelkaj jarmiloj, sed neniukaze jarmilionojn laŭ la evolucia doktrino. La aĝo de la tero, de la universo kaj la komenco de la homa raso donas kun diferenco de ses kreotagoj la saman rezulton.

DK3: *Kiamaniere estas eble, ke okaze de juna universo la lumo de la objekto, kiu distancas de ni je milionoj da lumjaroj, jam atingis la teron? Ĉu oni ĉikaze prefere akceptu la aĝon, kiu korespondus kun la tempo, kiun la luma radio bezonas por atingi nin?*

RK3: La eldiroj, diritaj en la demando, estas konsekvencoj, kiujn oni ĝuste diras el la *nuna* situacio: la lumradio havas kun siaj 300 000 km/s (la ekzakta valoro donita per ekskluzive nulaj aliflanke de la komo estis difinita dum la ĝenerala konferenco por mezuro kaj pezo en la jaro 1983 per la nombro 299 792 458 m/s) cetere altan rapidecon de disvastigo, tamen ankoraŭ limigitan. Ĉiu stelo, kiun oni nun vidas, informas nin do ne pri sia nuna situacio, sed pri iu pasinteco, kies atestanto ĝia lumradio momente venas ĝis ni. La (nerajtigita!) konkludo tiel diras: Ĉar ekzistas steloj, kiuj distancas de ni plurajn miliardojn da lumjaroj, sekve ili davas havi almenaŭ tioman aĝon. Por klarigi tiun ĉi pensmanieron oni devas nepre konsideri du tre signifajn faktojn:

1. Distanco anstataŭ tempo: La lumjaro, same kiel la metro, ne estas mezuro de tempo, sed de spaca distanco! Unu lumjaro egalas al distanco de 9,46 bilionoj da km. Tian distancon trakuras la lumradio dum unu jaro. (Same oni povus indiki la tempon, kiun bezonas la lumo por trakuri la distancon de unu metro. Tiu estas 1/299 792 458 da sekundo. La antaŭa difino de la metro per ondolongo, pretere dirite, estis anstataŭita per tiu ĉi kurtempa difino de la

lumo.) Se du objektoj A kaj B havas sian distancon a , oni per nura kono de ilia distanco ne povas diri ion ajn pri ilia cetera stato (ekz. aĝo).

2. Kreopensado: La senĝena pensa ligado de distanco al tempo estas konsekvenco de la evolucia pensmaniero, ĉe kiu oni supozas laŭplaĉe multan tempon por pasinto, kiel ankaŭ por estonto. Laŭ la biblia vidpunkto la tempoakso tamen havas difineblan komencopunkton, kiun markas la unua verso de la Biblio, kaj troviĝas kelkajn mil jarojn (ne milionojn!) returne de ni. Aldona plilongigo de tiu ĉi tempoakso trans tiu komencmarko tial fizike ne estas allasebla. Se iu perdas atenton pri tiu ĉi fakto, tiam li troviĝas en la sama pozicio kiel iu, kiu plilongigus sian propran ekziston transe de la tempomomento de la koncipiĝo returnen. Por aldone kontroli la starigitan demandon, paŝu ni kun la supra penskoncepto en la semajnon de la kreado. La kvaran tagon de kreado estis kreitaj la steloj (1 Mos 1,14-16). Post la fino de la kreado oni povus laŭ la supra objeto vidi neniun stelon. La plej proksima stelo, nomata α -Centauri (pli precize: Proxima Centauri) distancas de nia tero je 4,3 lumjaroj. Tiel ĝi povus esti videbla nur 4,3 jarojn post la kreado unuafoje de la tero. Kiel sekva stelo venus 1,6 jarojn pli poste la Sagostelo de Barnardo (distance de 5,9 lumjaroj) ktp. Kaj tiu procedo ĝis niaj tagoj ne estus kompleta, ja ĉiun jaron venus al ni, konsidere ilian pli grandan distancon de la tero, lumo de konstante kreskanta stelnumero. Sed tio kontraŭdiras la astronomian observadon.

Adamo laŭ tiu pensmodelo dum 4,3 jaroj rigardis en tute stelmalplenan ĉielon, kaj post aldona 1,6 jaro li ricevus en sian vidon unu aldonan stelon. Abrahamo, kiu vivis proksimume 2000 jarojn post la kreo, laŭ tiu ĉi teorio povus vidi nek la plej helajn stelojn de nia laktostrata sistemo, por ne diri la stelojn de aliaj galaktoj, ja nia laktostrato etendiĝas en mezuro de 130 000 lumjaroj. Sed Dio montris al Abrahamo la senmezureblan nombron da *videblaj* steloj, por meti lin en miregon: „*Rigardu al la ĉielo kaj kalkulu la stelojn, se vi povas ilin kalkuli*“ (1 Mos 15,5).

La supra penskoncepto „numero de lumjaroj = minimuma aĝo de steloj“ do laŭ la eldiroj de la Biblio estas falsa. La biblia solvo de tiu ĉi problemo estas trovebla ĉe 1 Mos 2, 1-2: „*Kaj estis finitaj la ĉielo kaj la tero kaj ĉiuj iliaj apartenaĵoj (= steloj). Kaj Dio finis en la sepa tago Sian laboron, kiun Li faris, kaj Li ripozis en la sepa tago de la tuta laboro, kiun Li faris.*“ Saman atestadon oni trovas ankaŭ en la Nova testamento: „*kvankam la faritaĵoj estis finitaj jam de post la fondo de la mondo*“ (Heb 4,3). Post la fino de la kreadsemajno tiel ĉio estis komplete finita. Tio ankaŭ signifas, ke la perceptebleco vidi stelojn de la tero estis donita, ja *ek post* la fondo de la mondo ĉiuj faritaĵoj estis *videblaj* (Rom 1,20). Estas parto de la kreitaresenco, ke ni ne estas rajtigataj interprete projekcii ĉiujn leĝecojn de nia nuna sperto en la tempon de la kreado. „Estis finitaj“ signifas pretaj en ĉiu aspekto: la vojaĝanta radio de la lumo de la steloj estis samtiel kreita kiel la steloj mem, tio diras, ke ankaŭ la lumradio de la plej distanca stelo jam estis samtempe sur la tero. Oni devus pripensi: Per nia naturscienca klopodo (pensi kaj esplori) ni tempe atingis en plej bona okazo la finon de la kreadsemajno. Al kompreno de okazado interne de la kreadsemajno ni povas veni nur, se ni malfermas nin al la revelaciitaj detaloj per studado de la Biblio.

DK4: Kian starpunkton Darvino (Darwin) havis koncerne Dion?

RK4: Post rompo de sia komencinta medicinstudado Darvino konsile de sia patro komencis studi teologion (1828-1831), kvankam liaj interesoj troviĝis alikampe. En sia libro *La estiĝo de specioj pere de natura selekto* li skribis: „Verŝajne troviĝas io digna en la supozo, ke la Kreinto enspiris la ĝermon de la tuta vivo, kiu nin ĉirkaŭas, en nur malmultajn aŭ eĉ unu

nuran formon kaj ke, dum nia tero laŭ la leĝoj de gravito sin movas en cirkloj, el tiel simpla komenco estiĝis senfina nombro de plej belaj kaj plej mirindaj formoj.“ Tiu ĉi formulado de Darvino deiras el necerta deisma koncepto pri Dio, laŭ kiu Dio estas rekonata kiel prakaŭzo de kosma kaj biologia tutevolucio, tamen Lia persona starpunkto rilate la homon kiel ankaŭ la bibliaj eldiroj pri la kreado estas ignoritaj. Per la eldiro, ke la homo portas „la neforviŝeblan markon de sia besta origino“ Darvino plene esprimas sian rompitan rilaton al la Biblio. Li mem sentis la per li sukcesintan evolucian ideon kiel alternativon al la biblia revelacio, kiel li agnoskas en sia aŭtobiografio: „En tiu tempo mi iom post iom venis al la percepto, ke la Malnova testamento surbaze de sia evidente falsa tutmondhistorio ... ne estis pli vereca ol la aktualaj libroj de hinduistoj aŭ la religiaj enhavoj de barbaroj ... Mi pli kaj pli atingis la refuton de la kristana kredo kiel revelacio de Dio.“ Tiu lia percepto en sekvaj jardekoj nur plu plifortiĝis:

„Tiel la nekredo tre malrapide min ĉirkaŭrampis, sed finfine fariĝis kompleta. Tio funkciis tiel malrapide, ke tio por mi estis nenia plago, kaj mi post tiam eĉ unu sekundon ne dubis pri tio, ke mia konkludo estis ĝusta. Fakte mi ne povas kompreni, kiamaniere iu ajn povas deziri, ke la kristana kredo estu vera.“

Dum Darvino sub kompleta refuto de la biblia revelacio tamen ankoraŭ eliris el certa vaga deismo (t.e. dio konceptita kiel senpersona esto) Ernesto Haeckel transiris al plena ateismo, kiam li postulaciis: „ke organismoj estiĝis sur pure fizik-kemiaj vojoj“. Sur tiu sama pado troviĝas ankaŭ la nuntempaj novdarvinistoj M. Eigen, C. Bresch, B.-O. Küppers¹, kiuj per sia reduktisma penskoncepto pri memorganizeco de la materio multajn tente kondukis al ateisma aŭ deisma – kaj tiel kontraŭbiblia – mondpercepto.

DK5: *Enkadre de pinta sporto oni atingas pli kaj pli bonajn rezultojn, kiuj antaŭe ne estis eblaj. Ĉu tio ne estas aludo favore al la evolucio?*

RK5: En fina raporto pri la XXIV-a olimpika ludo en Seulo en la gazeto „Braunschweiger Zeitung“ oni povis per 3-a de oktobro 1988 legi:

„Sian brilon ricevis la olimpika ludo per 38 mondrekordoj. La limoj de homa kapablo en sudkorea metropolo estis nove difinitaj. La mizero estis personigita per la nomo de senhonora kanada kuristo Ben Johnson, kiu post sia mondrekorda kuro por atingi olimpikan venkon estis malkovrita kiel trompulo. Ĝisdimanĉe IOC povis denunci nur dek kazojn de malpermesita deekstera stimulo de la kondicio. Tamen la nekonata nombro estas multe pli granda. Tiel super multaj pintaj atingoj de Seulo ŝvebas ombro de pridubo. – La ludo surscenigis multajn grandatletojn: la sesopan naĝvenkinton de la olimpiko s-inon Kristin Otto el Leipzig, la per kvin ormedaloj dekoritan usonan naĝiston Matt Biondi, la rusan reĝon de atletiko kaj kvaropan venkinton Vladimir Artemov, la usonan facilatletikan superstelulon Florence Griffith-Joyner kun ŝiaj triumfoj en kurado je 100 m, 200 m kaj en stafetkurado. Al la galerio de historiaj grandpersonoj sendube apartenas ankaŭ Steffi Graf el Aŭstrio, kiu per sia olimpika venko finis la „Golden Slam“ kaj tiel atingis la jarcentan sukceson.“

¹ En nia tempo oni devas aldoni la nomon de angla biologo kaj bone vendata verkisto R. Dawkins, kies libro *God Illusion* (Dio kiel iluzio) li samtempe altiris atendon de milionoj kaj tamen ankaŭ kontraŭargumentojn de multaj seriozaj sciencistoj.

Fakte, la mondrekordoj en pinta sporto iĝas ĉiam pli bonaj. Ankaŭ se oni subtrahas la kazojn de dopingo, oni povas registri kreskon de la atingoj. Tamen ĉe tio ĉi oni devus pripensi: La atingitaj rekordoj estas rezulto de intensa sportesplorado kaj de apliko de ĝiaj rezultoj en penigaj trejnometodoj. La alrejnita pintatingoj tamen ne estas heredeblaj. Kiam la trejnado estas finita, tiuj atingoj ne povas esti retenitaj.

En la evolucia sistemo oni tamen bezonus mekanismon, kiu de generacio ĝis generacio memstare donus pliboniĝojn. Laŭ la evoluciismaj imagoj la mutacioj kaj la selektado estas la motoroj de la evolucio pli kaj pli alten. Tiuj fenomenoj tamen nek estas laŭplanaj nek orientitaj al certa celo. Fakte regas en la materio alia leĝo: la leĝo de inercio, de pasiveco, de energielĉerpiĝeco kaj la tendenco de niveliĝo. Kontraste al tio tamen, la vivo ĉiam estas – ĝis la fajnkonstruo de makromolekuloj – ligita kun planeco. Neniu povas pridubi, ke ĉe la konstruado de niatempaj komputiloj oni unue havas precizan planon. Sed eĉ la plej kompleksaj komputilaj arkitekturoj estas nur infanaj ludiloj kompare kun tio, kio funkcias en ĉiu vivoĉelo kaj tiel estas planeca je plej alta grado.

DK6: Ĉu oni la Bibliion povas preni por serioza libro science, se ĝi uzas antikvajn imagojn pri la mondo, jam delonge superigitaj?

RK6: La Biblio neniakaze uzas mondbildojn de la tiama tempo (vidu ankaŭ: B59, p. 149-151). Estas ĝuste kontraŭe. La liberalisma teologio interpretas en bibliajn tekstojn la imagojn de la antikva Oriento. Per tia al la Biblio interŝovita mondimago laboras ekzemple A. Läpple, kiam li vidas en ĝi pure homan volesprimon:

„Oni imagis la teron kiel rondan maldikan diskon. Ĝi transprenas la centron de la kreitaro kaj estas ĉirkaŭnundita de subaj akvoj, ĉu de la diluvo ĉu de praoceano ... Super tiu terdisko arkiĝas la supertegmento de la firmamento, sur kiu estas muntitaj la suno, la luno kaj la steloj kvazaŭ lampoj. Super la firmamento troviĝas la ‚supraj akvoj‘, kiuj tra la fenestroj aŭ akvobaraĵoj povas flui sur la teron kiel pluvo.“ („Die Bibel - heute“, München, p. 42)

Jam nur kelkaj bibliaj versikloj sufiĉas por malvalidigi tiajn antaŭjuĝojn kaj por montri, kiel verfidelaj *estis* la eldiroj de la Biblio antaŭ ol la nuna pruvita formo de la tero iĝis ĝenerala ekkono.:

En la libro de Ijobo 26,7 oni povas legi: „*Li etendis la nordon super la malpleno, Li pendigis la teron sur nenio.*“ La tero do nek naĝas sur iu praoceano nek ĝi estas starigita sur firma fundamento, sed ĝi *ŝvebas* libere en altgrada vakuo, kiu ĝin ĉirkaŭas. Ankaŭ pri la formo de la tero la Biblio sin esprimas ĉu rekte ĉu malrekte, kvankam tio ne apartenas al ĝia mesaĝa celo: „*Li sidas super la rondo* (hebr. *chug* = rondo aŭ sfero) *de la tero*“ (Jes 40,22).

La sfera formo de la tero estas klare esprimita en la tekstoj pri la novalveno de Jesuo. Ĉar la Sinjoro *subite* (Mat 24,27) kaj por *ĉiuj* homoj *samtempe* estos videbla (Apo 1,7), estas por la homaro dum lia alveno en unu duono tago kaj en la alia nokto. Kaj ĝuste tion diras la teksto ĉe Luko 17,34.36 kiel kromefekto: „*En tiu nokto estos du viroj sur unu lito; unu estos prenita, kaj la alia lasita. Du virinoj estos muelantaj kune; unu estos prenita, kaj la alia lasita. Du viroj estos sur kampo; unu estos prenita, kaj la alia lasita.*“ La samtempa sur la tero troviĝanta taga resp. nokta situacioj estas markitaj per laboro sur la kampo resp. per ripozo en la lito, ĉiam depende nur de tio, sur kiu pozicio de la rotacianta tero oni momente troviĝas. Ankaŭ Zeĥario la alvenon de la Sinjoro ne atestas per mondimago de sia tempo, sed

fidele al la vero: „*Kaj tio estos tago sola* (= konkreta dato), *konata nur de la Eternulo, nek tago nek nokto* (= tiam tago kaj nokto estos nuligitaj); *nur vespere montriĝos lumo*“ (Zeh 14,7).

DK7: Kion vi povus diri pri la strukturo de nia universo?

RK7: Ekskluzive sub la antaŭsupozo de kosma evolucio oni per ĉiam novaj hipotezoj kaj modeloj provis diveni la strukturon de la universo. Inter la „profetoj de novaj kosmologioj“ troviĝas, kiel Heckmann ilin nomas, personoj kiel ekzemple A. Friedmann, A. Einstein, E.A. Milne, P. Jordan, F. Hoyle, G. Gamow, A.A. Penzias kaj R.W. Wilson.

Ĉiuj sciencaj klopodoj, fundamenti la spacstrukturon de la universo (ekz. malfermita aŭ fermita, limigita aŭ senlima, fina aŭ senfina, tri- aŭ kvar-dimensia, pozitiva aŭ negative oblikva) fiaskis. La konata astronomo O. Heckmann esprimas sin pri tiuj ĉi klopodoj en sia libro *Sterne, Kosmos, Weltmodelle* (Steloj, kosmo, kosmomodeloj) sur la paĝo 129 sekve: „La inovacia forto de la homa spirito ne estas malforta, do relative ampleksa la produktado de mondimagoj, tiel ke iu kritikisto antaŭ nelonge kredis, ke li povas aserti, ke la nombro de kosmologiaj teorioj estas reciproke proporcia al la nombro de konataj faktoj.“ Gravan konstaton ĉi-kontekste atingis la astronomifizikisto V. Weidemann el Kiel, Germanio, okaze de la 16-a tutmonda kongreso por filozofio en Düsseldorf (1978):

„La kosmologio situas sur pli da filozofiaj supozoj ol sur aliaj branĉoj de la natursciencoj. Se ni aliaspekte estas devigataj, repreni la limojn de tio, kion oni povas nomi scienco kaj ni ne povas esperi, ke ni povus science respondi la fundamentajn demandojn de la kosmologio, tiam do ni devas agnoski, ke la universo en sia bazo estas neklarigebla. La scienco devas tion akcepti, ke troviĝas demandoj, kiujn oni ne povas respondi. Kio restas, estas teorio pri nia scio.“

Precize la saman konstaton peras ankaŭ la Biblio. La centran konkludan versiklon koncerne la neklarigeblon de la universo oni trovas ĉe Jeremio 31,37, kie tekstas tiel: „*Tiele diras la Eternulo: Se oni povos mezuri la ĉielon supre kaj esplori la fundamenton de la tero malsupre, tiam Mi forpuŝos la tutan idaron de Izrael pro ĉio, kion ili faris, diras la Eternulo.*“ Ĉi tie Dio ligas rezultojn de astronomiaj esploroj kaj la vojon de certa popolo – do du tute inter si nedependajn aferstatojn – por fari komunan eldiron. Unu parta eldiro estas la fidelesprimiĝo de Dio al Izraelo, kaj la alia estas kun tiu ĉi plene korelaciigita: Neniu astronomia kaj geofizika esploro spite al plej granda investo iam sukcesos esplori la strukturon de la universo kaj la ecojn de la terinterne. Ĉar do la promeso de Dio al Izraelo estas nerompebla, per sama determineco validas, ke la nomitaj astronomiaj kaj geofizikaj esplorceloj neniam povos esti atingitaj. Tiel la proklamita celo de la konata brita astronomifizikisto Stephen W. Hawking restos utopio: „Mia celo estas perfekta kompreno de la universo, kial estas, kiel ĉio estas, kaj kial ĝi tute ekzistas.“ La respondo al tiu ĉi demando, li tekstas, „estus la definitiva triumfo de la homa racio.“ (*Skiza historio de la tempo*).

DK8: Kiom longa estis la tago de la kreado?

RK8: Pri tiu ĉi demando oni ofte diskutis, ĉar pri tio estiĝis tro da teorioj, kiuj reciproke kontraŭdiris unu la alian rilate ilian starpunkton. Plej rapide ni atingas la respondon, se ni unue klarigas la nombron de informfontoj, kiujn ni povas konsideri adekvataj. Neniu el nunaj sciencoj disponas ĉi-rilate pri observinformoj aŭ faktoj, kiujn oni povus interpreti. La nura

eldiro venas al ni de Dio en la Biblio, nome, en la raporto pri la kreo kaj en la ordonoj de Sinajo.

La raporto pri la kreado estas konstruita en severa kronologia ordo. Rilate tion la unuopaj kreaĵoj estas vicigitaj en ses sinsekvaj tagoj. La Biblio ankaŭ tiu-ĉi-sence sin montras ekzakta libro (komp. B80 en Aldono, parto I), ja ĝi per uzo de certa fizika unuo nomas ankaŭ la apartenantan mezurmetodon (1 Mos 1,14). Tiel la longeco de unu tago – kontentigante ankaŭ la sciencan postulon – estas precize difinita: tio estas tiu geoastronomia temposekvenco, kiun difinas la rotacia daŭro de la tero, kaj tio faras 24 horojn. Enkadre de 10 Ordonoj de Sinajo Dio argumentas tiujn ses labortagojn kaj la ripoztagon de la homo per aludo al la kreosemajno: „*Dum ses tagoj laboru kaj faru ĉiujn viajn aferojn; sed la sepa tago estas sabato de la Eternulo, via Dio; faru nenian laboron, nek vi, nek via filo, nek via filino, nek via sklavo, nek via sklavino, nek via bruto, nek via fremdulo, kiu estas inter viaj pordegoj. Ĉar dum ses tagoj la Eternulo kreis la ĉielon kaj la teron, la maron, kaj ĉion, kio estas en ili, sed en la sepa tago Li ripozis*“ (2 Mos 20,9-10).

Apogante sin al la evoluciisma doktrino kelkaj okaze provas prezenti la kreaĵojn kiel longajn periodojn. Tiukaze ili arbitre uzas la vortojn el psalmo 90,4: „*Ĉar mil jaroj estas en Viaj okuloj kiel la hieraŭa tago, kiu pasis, kaj kiel nokta gardoparto*“ por 1 Mos 1, kvazaŭ temus pri matematika formulo. (Tamen en psalmo 80 kaj same ĉe 2 Pet 3,8 temas pri Dio kiel eterna estulo, kiu ne troviĝas sub la tempa leĝeco.) Tiu ĉi kvazaŭbiblia matematiko donas la serĉatan plivastiĝon de la tempo en rilato 1 : 365 000, tamen ni devas ĝin refuti nebiblia. Per sama kalkulmetodo oni povus tion apliki ankaŭ ĉe Mateo 27,63, kaj tiel subite ni ricevus pseŭdoprofetaĵon: „Post 3000 jaroj mi releviĝos.“ Sed Jesuo releviĝis post tri tagoj, precize tiel, kiel li antaŭdiris. Ofte la kritiko riproĉis, ke la kredo, ke Dio kompletigis la kreadon de la mondo en ses tagoj, ne estas nepra por atingi savon. Rilate tion mi flegas starigi sekvan demandon: „Ĉu vi kredas, ke Jesuo releviĝis post tri tagoj?“ Kutime oni respondas jese. Do mi kontinuas: „Por mi ankaŭ ne estas savdecide, ke la Sinjoro releviĝis post tri tagoj. Sed kial fari tiajn diferencojn en la sama Biblio? Unu aferon ni kredas kaj la alian ne?“ – Pliajn argumentojn por kredi la kreosamajnon en laŭvorta senco kaj objetojn kontraŭ la arbitra sencoŝanĝado de kreaĵoj al tempoepokoj mi prezentas en [G2, 13-55].

DK9: Ĉu troviĝas du kontraŭdiraj kreadraportoj?

RK9: Ambaŭ unuaj ĉapitroj en la Biblio, sed ankaŭ multaj aliaj partoj de la Biblio okupiĝas pri la eldiroj koncerne la temaron de la kreado. Ĉiuj raportoj kompletigas sin kaj en sia tuto peras detalan priskribon pri la krea agado de Dio. En traktado de la Biblio troviĝas du ĝeneralaj linioj, kiujn oni ne povas harmonizi: la biblifidela kaj la biblikritika sinteno. La antaŭdecido pri unu el ili ne okazas nur ĉe la Nova testamento, interpretante la releviĝon de Jesuo aŭ de liaj mirakloj; la disiro de du komplete disirantaj manieroj kompreni la Skribon estas farata jam ĉe la komenco de la Biblio:

1. La biblifidela kompreno: La kreoprotokolo laŭ 1 Mos 1 kaj 2 (kiel ankaŭ ĉiuj ceteraj bibliaj partoj, konforme al 2 Tim 3,16 estis skribitaj sub Dia inspiro) ne estas elpensita per la homo, sed Dio mem estis la aŭtoro de tiu ĉi informo. Neniu homo estis atestanto de Dia krea akto, do nur Li mem povas nin per sia revelacio informi, kiamaniere, kiom longe kaj en kia sinsekvo kaj laŭ kiuj principoj Li kreis. En kompleta kontraŭdiro al tio ĉi troviĝas la sekva gvidlinio:

2. La biblikritika kompreno: Laŭ ĝi la kreoprotokolo estas disigenda en partojn 1 Mos 1-2 kaj en parton 1 Mos 2,4b-2,25 kaj aljuĝita al diversaj homaj aŭtoroj, tiel la Elohisto (pli nova fonto) kaj Jahvisto (pli malnova fonto), kiuj per propra pensado pri la origino de la mondo kaj

de la vivo formulis la raporton. Post la babilona ekzilo la unuopaj partoj de la protokolo estis kunigitaj al la unueca tekstunuo. Oni vidas valoron en serĉado de kontraŭdiroj kaj diversaj estiĝtempoj de ambaŭ supozitaj raportoj por tiel argumenti la hipotezon pri du diversaj fontoj. Kiel du ĉefajn argumentojn oni mencias:

a) La raportoj distingiĝas per diversaj nomoj de Dio (Elohim, Jahveo);

b) La tekstoj kontraŭdiras sin reciproke en la sinsekvo de la kreado:

en la unua raporto: plantoj – bestoj – homo kaj

en la dua raporto: homo – plantoj – bestoj.

Kontraŭ tiuj du palisoj de la biblikritika hipotezo oni povas apliki fortajn objetojn:

Ad a): Dio rivelacias sin en la Biblio kiel la Patro, la Filo kaj la Sankta Spirito, uzante pli ol 700 diversajn nomojn (komp. demandon G3) por mesaĝi al ni multajn karakterajn trajtojn de si. Provo aljuĝi diversajn nomojn de Dio al diversaj skribistoj – konsekvence da ili do devus esti minimume 700 – estas arbitra subŝovaĵo, kiu ne akordiĝas kun la tuta atestado de la Biblio.

Ad b): Ek de 1 Mos 2,3b ne komenciĝas la dua kreoprotokolo, originanta el iu alia fonto, sed ĉi tie estas priskribita detalo, nome la kreado de la homo, pli proksime. Temas pri paralela raporto al 1 Mos 1 – 2,3 kun alia celo, nome montri la facile rekoneblan eldiran gravpunkton: kiamaniere, kie, en kia sinsekva ordo kaj en kiu rangigo inter si kaj en rilato al la Kreinto Dio kreis la unuajn du homojn? Ankaŭ ĉe aliaj bibliaj raportoj oni trovas rakontmetodon, laŭ kiu certa evento unue estas prezentita kronologie kaj superrigarde, kaj en la dua paŝo enirante la emfazitajn detalojn. Estas elstare dirite (V8), ke Dio la ĝardenon **plantis**. Plantado de iu ĝardeno antaŭpostulas jam kreitajn plantojn. Post la plantado Dio „**elkreskigis el la tero ĉiun arbon**“ (V9); sed tion oni ne devas miksi kun la kreo de la arboj. La uzitaj vortoj „planti“ kaj „kreskigi“ kompare al la vortoj en 1 Mos 1 ne estas la vortoj pri kreado, ja ili priskribas la aktivadon, kiu deiras de la jam ekzistanta stato de la aferoj. Plie gravas la interpretado de la versiklo 19. Se oni ĝin observas izolite kaj el tio tiras doktrinon (rompo de la interpreta regulo A4, vidu Aldonon parto II), oni povus samtiel subŝovi, ke la bestoj estis kreitaj *post* la homoj. Tamen se oni konsideras, ke la tekstoparto 1 Mos 2,7-25 estas tre antropomorfe stilizita (uzante similecon kun homa pens- aŭ vidpunkto), tiam fariĝas klare, ke ankaŭ ĉe la versiklo 19 ne temas plu pri la momento de kreado de la bestoj, sed pri enketado de spiritaj kaj lingvaj kapabloj de la ĵus kreita homo, kiamaniere li nomos la defileigitajn bestojn. La kromfrazo volas nur aludi, ke ankaŭ la montritaj bestoj – kurioze la kampbestoj estas menciataj aparte, kvankam ili estis kreitaj kun aliaj bestoj la saman sesan tagon kiel ankaŭ la homo – samtiel venas el la mano de la Kreinto.

DK10: Ĉu oni povis venigi zaŭrojn en la barkon de Noaĥo?

RK10: En la 40-a ĉapitro de la libro Ijobo la zaŭroj ne nur estas menciitaj, sed eĉ estas priskribitaj detaloj de ilia korpkonstruo (vers. 15-18.23):

„Vidu la hipopotamon (ĉe Lutero pli fidele: behemoton), kiun Mi kreis apud vi; herbon ĝi manĝas, kiel bovo. Vidu, ĝia forto estas en ĝiaj lumboj, Kaj ĝia fortikeco estas en la muskoloj de ĝia ventro. Ĝi streĉas sian voston kiel cedron, La tendenoj de ĝiaj femuroj estas interplektitaj. Ĝiaj ostoj estas kiel kupraj tuboj, ĝiaj ostoj estas kiel

feraj stangoj. Se la rivero tumultas, ĝi ne konfuziĝas; ĝi staras trankvile, se eĉ Jordan enverŝiĝus en ĝian buŝon.“

Lutero la hebrean nomon de la bestego *beĥemoto* ne tradukis, ja ĝi konvenas por neniu el la tiutempe vivanta besto. La fortika vosto povus aludi krokodilon, sed ĝi estas pura viandmanĝulo kaj tiel ne konvenas; la alia giganta en la rivero vivanta bestego, kiu vere manĝas la herbon, estas la hipopotamo (kiel ankaŭ Z. tradukis – rim. de trad.). Sed ankaŭ ĝi falas tra la kriterioj, ja ĝi havas nur etan penikvoston. Tiel restas nur la gigantaj bestegoj el la parencaro de zaŭroj, kiun la supra tekstoparto ekzakte indikas. La libro de Ijobo apartenas vere al la plej maljunaj bibliaj libroj, sed la preciza tempo de pretigo ne estas al ni konata. Pro la ŝanĝiĝinta tersurfaco pro la diluvo kun tute aliformitaj montoj, riveroj, lagoj kaj oceanoj la mencio de la rivero Jordano en Ijo 40,23 estas senpretervidebla indiko pri la postdiluva epoko, en kiu la zaŭroj ankoraŭ vivis. Ankaŭ tiuj bestegoj do devis esti savitaj en la barko. La plenkreskaj bestegoj forprenus en la giganta barko grandan spacparton, do oni povas imagi, ke Noaĥo prenis nur junan bestoparon aŭ eĉ nur ovojn. En la postdiluva tempo tiuj bestegoj ne trovis plu mediajn kaj klimatajn kondiĉojn, por kiaj ili iam estis kreitaj, tiel ili en sekva temposekvenco formortis. Tiu ĉi klarigo por la fino de la zaŭroj estas pli logika ol jenaj hipotezoj, kiuj niatepe estas elpensitaj pro prisilento de la biblia kreoraporto.

DK11: Kun kiu edziniĝis la du filoj de Adamo?

RK11: La unuaj homoj Adamo kaj Evaŭo naskis du filojn, Kainon kaj Habelon. Kaino frapis Habelon morte, kaj senpere post tio estis dirite, kiel ni legas ĉe 1 Mos 4,16-17: „*Kaj Kain foriris de antaŭ la Eternulo, kaj loĝiĝis en la lando Nod, oriente de Eden. Kaj Kain ekkonis sian edzinon, kaj ŝi gravediĝis, kaj ŝi naskis Ĥanoĥon. Kaj li konstruis urbon, kaj li donis al la urbo nomon laŭ la nomo de sia filo: Ĥanoĥ.*“ Sed de kie subite la edzino por Kaino?

Se la Biblio enhavus ĉiujn tiujn eldirojn, kiujn oni per logika konkludado povas mem diveni, tiam la Biblio devus ampleksi cent volumojn anstataŭ unu. Dio donis al ni nur unu libron kaj aldone la donitaĵon ke ni povas pensi. Tiamaniere ni povas respondi ankaŭ tiajn demandojn, kiuj ne estas rekte pritraktitaj, sed oni povas ilin facile klarigi el aliaj eldiroj.

En 1 Mos 5,3-4 oni legas: „*Kaj Adam vivis cent tridek jarojn, kaj al li naskiĝis filo laŭ lia bildo kaj simileco, kaj li donis al li la nomon Set. Kaj Adam vivis, post kiam naskiĝis al li Set, okcent jarojn, kaj naskiĝis al li filoj kaj filinoj.*“ El tio oni povas konkludi, ke la unua gepatra paro naskis certan nombron da posteuloj. Kiel sole eblan solvon, Kaino uzis la eblecon edziniĝi per unu el siaj fratinoj. Kune kun la origina peko ne venis en la mondon nur la morto kaj la sufero, sed per la tempo ankaŭ la progresanta degenero de la origine tre bona heredmaterialo. Inter la tempo de Adamo resp. Kaino kaj Moseo troviĝas proksimume 2500 jaroj, kaj tiam Dio malpermesas geedzecon en proksima parenceco (3 Mos 18), ĉar la genetikaj eraroj damaĝe sumiĝas. Abraĥamo vivis 400 jarojn antaŭ Moseo, kaj en lia tempo la geedzeco inter proksimaj sangparencoj ankoraŭ estis permesita, ja li edziniĝis kun sia duonfratino Sarao (1 Mos 20,12).

DK12: Kiu scienca argumento el via vidpunkto plej klare parolas favore al la kreado kaj plej forte malfavore al la evolucia hipotezo?

RK12: La vivon oni renkontas en ekstreme diversaj formoj, tiel ke eĉ la plej simpla unuĉelulo kun sia tuta simpleco tamen estas farita tiom komplekse kaj celorientite, kiel cetere neniu fabrikato de la homa inventspirito. Por klarigi la vivon kaj ĝian originon disponiĝas du principe distingendaj eblecoj: evolucio aŭ kreado. Laŭ la instruo de evoluciistoj la vivo estas difinita tiele:

„La vivo estas pure materia produkto, kiu devas per tio esti fizik-kemie priskribebla kaj distingiĝas de la senviva naturo nur per sia komplekseco.“

Kontraŭ la evolucidoktrino estis intertempe fare de diversaj sciencistoj el multaj kampoj (ekz. informadika, biologia, astronomia, paleontologia, geologia, medicina) formulitaj gravaj objetoj. En la kontraŭdiro kreado/evolucio tamen restas nesolvebla disputa punkto, kies kaŭzo troviĝas en tre diversaj bazaj asertoj de ambaŭ modeloj (vidu demandon S1). El tiu ĉi pat-pozicio oni povas elveni nur, se disponiĝus sistemo, kiu orientiĝus nure laŭ sciencaj spertokonstatoj. Tiuj konstatoj devus esti tre palpeble formulitaj, tiel ke unu nura eksperimente pruvebla kontraŭkazo jam povus ĝin venigi al falo. Se tio ne sukcesas, ili akiras naturleĝecan signifon kaj tiamaniere ili atingas fortan esprimcertecon por pritaksi de ne jam konataj kazoj. En tiu senco estas la nur en sperto pruvebla aserto pri energio aplikebla senkonsidere *mondpercepton*. Tiel neniam antaŭe sukcesinta flugo al la luno estis ebla nur pro tio, ke oni povis deiri de la severe respektata valideco de la leĝo pri energio ĉe ĉiuj postulitaj antaŭkalkuloj. De la sama esprimforto estas la **spertleĝoj pri la informoj**, tiel ke ni nun unufoje havas eblecon, atingi esprimfortan argumentaron sur la nivelo de naturleĝoj.

La *materio* kaj la *energio* estas cetere du nepraj bazaj unuoj de la vivo, tamen ili ne distingas jam baze vivajn kaj nevivajn sistemojn unu de la alia. Kiel centra karakterizo de ĉiuj vivestaĵoj tamen validas la en ili troviĝanta „*informo*“, nepre bezonata por ĉiuj procesoj (realigado de ĉiuj vivfunkcioj, la genetika informo por multobliĝado). La procesoj de informtransportado ludas la bazan rolon ĉe ĉio vivanta. Se ekzemple insektoj transportas polenon de plantfloroj, tio en la unua vico estas transporto de la informoj (genetikaj informoj); la kunĉeestanta materio estas negrava. Tiel la vivo neniukaze estas jam komplete priskribita, tamen estis menciita la absolute centra faktoro de ĝi.

La plej kompleksa informprilabora sistemo sendube estas la homo. Se oni resumus ĉiujn informfluojn en la homo, do la *konscian* (lingvo, informkibernetiko de intencaj motorikaj movoj) kaj *senkonscian* (informkibernetike regulitaj funkcioj de organoj, hormonsistemoj), do potage estas prilaboritaj 10^{24} da informbitoj. Tiu ĉi astronomie granda valoro de la informkvanto superas la tutscion de la homaro kun 10^{18} bitoj, kiom da ĝi estas konservita en ĉiuj bibliotekoj de la mondo per faktoro de unu miliono.

Se ni observas la demandon pri la origino de la vivo laŭ la informteoriaj vidpunktoj, do kiel ĉe ĉiu sistemo, kiu portas aŭ prilaboras informojn, ni devas konsideri sekvajn spertleĝojn:

1. Ne ekzistas informo sen kodo.
2. Ne ekzistas kodo sen libera arbitro.
3. Ne ekzistas informo sen la sendinto.
4. Ne ekzistas informĉeno, sen ke ĉe ĝia komenco troviĝu spirita (inteligenta) prakomencanto.
5. Ne ekzistas informo sen origina spirita fonto; tio signifas: la informo estas esence spirita, sed neniukaze materia unuo.
6. Ne ekzistas informo sen volo.
7. Ne ekzistas informo sen kvin hierarkie strukturitaj niveloj:

- *statistiko* (aspekto de ofteco de signoj kaj de signaltransportado),
- *sintakso* (aspektoj de kodoj kaj reguloj de frazkonstruo),
- *semantiko* (aspektoj de signifo),
- *pragmatiko* (aspektoj de farado),
- *apobetiko* (aspektoj de la rezultoj kaj de la celo).

8. Ne ekzistas informo, produktita de hazardo.

En la libro „Am Anfang war die Information“ (Komence troviĝis la informo) [G5, 52-147] tiuj ĉi frazoj estos komplete klarigitaj kaj argumentita ilia naturleĝa statuso [G5, 25-49]. Tiel la sintagmo „naturleĝa informteorio“ konvene respegulas la staton de la aferoj [G4, 155-159].

Kontraste al la evoluciisma doktrino oni do povas difini la vivon tiel:

La **vivo** = *materia parto* (fizikaj kaj kemiaj aspektoj) + *nemateria parto* (spirita aspekto),

Helpe de tiu ĉi konciza formulo mi volas klare emfazi, ke la vivo apud sia materia komponaĵo posedas ankaŭ la nematerian. Al la nemateria parto apartenas la informo el iu spirita fonto. Tamen tiel la nemateria parto de la vivo ne jam estas priskribita. Tio fariĝos klare en observo, ke vivestaĵoj tuj post sia morto en siaj ĉeloj ankoraŭ havas informojn, sed mankas al ili tio baza, nome tio, kio faras la diferencon inter la vivo kaj la morto. Tiu diferenco estas por ĉiu videbla, tamen science ne perceptebla.

Ĝis nia tempo per sperto fiaskis ĉiuj proponitaj konceptoj de aŭtonoma informestiĝo en la materio (ekz. Hyperzyklus de Eigen, molekularvinisma ideo de Küpper). Tiel estas nekomprenebla afero, ke M. Eigen tamen kredas, ke iam ajn oni povus per pure materiaj procesoj klarigi la originon de la informo: „Ni devas serĉi algoritmon de iu naturleĝa formulo por la estiĝo de la informo“ („Stufen zum Leben“, Piper-Verlag, 1987, p. 41). Lia ideo „La informo estiĝas el ne-informo“ (samtie, p. 55) kontraŭdiras ĉiujn observojn de la spertado kaj tiel eskapas la terenon de realo. La supraj ok informleĝecoj tamen montris sian validon en sennombra aro da kazoj kaj neniu laboratorio de la mondo ĝis nun ilin eksperimente refutis. Tiel estas konsekvence prave demandi, ĉu la vivo tamen ne originas en celorientita kreadproceso. Kaj ĝuste pri tiu ĉi principo raportas la Biblio. La spirita informfonto, postulata de la informadika vidpunkto por ĉiu informo – kaj samtiel ankaŭ por la biologia informo – estas en la Biblio menciita jam sur la unua paĝo: „Komence **Dio** kreis...“ (1 Mos 1,1). Kontraŭe al tio la evoluciisma doktrino anticipas, ke la informo en vivestaĵoj bezonas nenium sendanton. Sed tiu ĉi aserto estas per ĉiutaga sperto pri la supre cititaj informleĝecoj riĉe rifutita. Tial liveras nin niatage la naturleĝoj per la informo la plej fortan argumenton por la estiĝo de la vivestaĵoj per la akto krea.

4. Demandoj pri la savo (S)

DS1: *Per kio la homo povas esti savita – ĉu per la fido aŭ per la faroj?*

RS1: En la Nova testamento oni trovas du eldirojn, kiuj unuarigarde ŝajne kontraŭdiras:

- a) *Savo per la fido:* „Ni do konkludas, ke homo praviĝas **per fido**, ekster la faroj de la leĝo“ (Rom 3,28).
- b) *Savo per la faroj:* „Vi vidas, ke homo praviĝas **per faroj**, kaj ne sole per fido“ (Jak 2,24)

Laŭ la centraj eldiroj de la Nova testamento la fido en la Sinjoron Jesuon Kriston havas savan potencon (Joh 3,16; Mar 16,16; Ago 13,39; Ago 16,31). Tiu ĉi savanta fido ne troviĝas en tio, ke oni prenas bibliajn faktojn por veraj, sed en persona ligiĝo al la Filo de Dio: „*Kiu havas la Filon, tiu havas la vivon*“ (1 Joh 5,12). Tiu, kiu konvertiĝas al la Sinjoro Jesuo, spertas per tio la plej grandan ŝanĝon en sia vivo. Kaj en ties vivstilo kaj en ties faroj estas por ĉiuj manifestite: „*Se vi min amas, vi observos miajn ordonojn*“ (Joh 14,15) – „*Kaj vi ankaŭ atestas, ĉar vi estis kun mi de la komenco*“ (Joh 15,27) – „*Negocadu, ĝis mi revenos*“ (Luk 19,13) – „*En diligenteco ne malviglaj, en spirito fervoraj, servantaj la Sinjoron*“ (Rom 12,11) – „*Amu viajn malamikojn, kaj preĝu por viaj persekutantoj*“ (Mat 5,44) – „*Redonu al neniu malbonon pro malbono*“ (Rom 12,17) – „*Ne forgesu gastamon al nekonatoj*“ (Heb 13,2) – „*Sed ne forgesu la bonfaradon kaj kunulecon*“ (Heb 13,16) „*Paŝtu miajn ŝafojn*“ (Joh 21,17). La servado en la nomo de Jesuo uzante la fidintajn talentojn estas la *senkondiĉa sekvo* de la savanta fido. Tiu ĉi agado estas en la Nova testamento difinita kiel *frukto* aŭ *faro de la fido*. Tiu, kiu ne havas farojn, do estas survoje al perejo: „*Kaj elĵetu la senutilan serviston en la eksteran mallumon; tie estos la plorado kaj la grincado de dentoj*“ (Mat 25,30). Kontraŭe al la *faroj de la fido* por la *faroj de la leĝo* (Gal 2,16) aŭ *mortaj faroj* (Heb 6,1; 9,14) validas, ke ili estas la faroj de tiu, kiu ankoraŭ ne kredas. Ankaŭ ĉi tie validas: Se du faras la samon, tio tamen ne estas la samo. La kunteksto ĉe Jakobo 2,24 (vidu la supran eldiron b)) montras, ke la fido de Abrahamo tiris post si konkretajn farojn. Li fariĝis obea al Dio, kiam li elmigris el sia patrolando (1 Mos 12,1-6) kaj li estis preta oferi sian filon Isaakon (Jak 2,21). Samtiel la faro de la iama prostituino Rahabao (Jak 2,25), nome la savo de izraelaj spionoj en Kanaano estas sekvo de ŝia fido en Dion (Jos 2,11). Tiel fariĝas evidente: al la fido senkondiĉe apartenas la faroj. Same kiel la homa korpo estus sen la animo morta, tiel ankaŭ la fido sen la sekvantaj faroj estus morta (Jak 2,26). La supre menciitaj versikloj a) kaj b) do ne faras kontraŭdiron; ĉi tie temas pri komplementaj eldiroj, kiuj sin kompletigas reciproke (vidu principojn de biblia eksplikado A3 kaj A14 en Aldono, parto II).

DS2: *Kial Dio elpensis por nin savi ĝuste la metodon de la kruco? Ĉu oni povus imagi ankaŭ alian metodon?*

RS2: La maniero krucumi en la Malnova testamento ne estas senpere menciita, tamen pluraj detaloj estis profete antaŭdiritaj, kiuj povas signifi nur la krucumadon, kiel ekz. en psalmo 22,17: „*Ili traboras miajn manojn kaj piedojn.*“ Paŭlo metas la malnovtestamentan eldiron: „*ĉar pendigito estas malbenita antaŭ Dio*“ (5 Mos 21,23) en rilaton kun krucumita Jesuo (Gal 3,13). Tiu de persoj transprenita mortigmaniero havis ĉe romanoj fian reputacion de „la plej kruela, abomena“ (Cicero) kaj „plej hontiga“ (Tacito). La kruco troviĝis en la plano de Dio; Jesuo „*suferis la krucon, malestimante honton*“ (Heb 12,2). „*Li sin humiligis kaj fariĝis obeema ĝis morto, eĉ ĝis la morto per kruco*“ (Flp 2,8). Ĉu iu alia metodo de la mortigo venus en konsideron – ekzemple ŝtonumado, dekapigo, venenigo, dronigo – estas pro la analogio kun la kazo de la origina peko kaj kun la savo ekskludita: Per la *arbo de rekono* (1 Mos 2,17) venis la peko en la mondon; *sur la arbo* ĝi devis esti ekstermita: la kruco sur Golgoto estas la arbo de la malbeno (Gal 3,13): Jesuo senhonore mortas kaj estas ekskluzivita el ĉia homa societo: li estas malbenita.

La leĝo de Moseo eldiras super la pekanto la malbenon. Tiu troviĝas post la kazo de la origina peko super ĉiuj homoj. Jesuo prenis la malbenon de Dio super sin mem anstataŭ resti super la homoj. La vorto, eldirita desur la kruco nun estas la liberiga mesaĝo por ĉiuj homoj, kiuj pro sia peko principe staras sub la malbeno.

La papo Johano Paŭlo II-a nomis la koncentrejon Auschwitz foje Golgoto de la 20-a jarcento. Tiusence en nia tempo troviĝas teologia linio, kiu vidas Jesuon solidara kun aliaj suferantaj, turmentitaj kaj mortigitaj homoj, kiuj ŝajne kiel li suferis kaj mortis teruran morton. Tamen: La surkruca morto de Kristo neniam devas esti komparata kun morto de aliaj homoj kaj lia kruco neniam kun krucoj de aliaj homoj, kiuj estis starigitaj ĉu en Romo ĉu en Jerusalemo. La kruco de Jesuo Kristo, ĉar de li, havas alian „kvaliton“ ol ĉiuj aliaj krucoj. Li ne trasuferis nur la maljustecon de la povuloj en tiu ĉi mondo, sed kiel *la sola* la koleregon de Dio pro la pekoj. Nur li sole estis la oferŝafido, kiu substitute „por multaj“ portis la kondamnon de Dio. „*La priparolo de la kruco*“ (1 Kor 1,18) post tio estas la centro de ĉiuj kristanaj predikadoj. Paŭlo havas koncerne tion ĉi mesaĝi unu nuran aferon: „*nenion, krom Jesuo Kristo kaj tiu krucumita*“ (1 Kor 2,2). A. L. Coghill montras al ni la signifon de la kruco en sia konata vekiga kanto:

*„Kiu Jesuon sur kruco en fido ekvidas,
tiu en sama jam horo saviĝas;
do eku rigardi al li, de la Patro sendita,
iam samtiel por vi estinte vundita.“*

DS3: Kiel Jesuo povis antaŭ 2000 jaroj morti por niaj pekoj, kiujn ni faris nur niatempe?

RS3: La savoplano de Dio por la falinta homo ekzistis jam antaŭ la fundamentigo de la mondo (Efe 1,4), ĉar Dio per donaco de libero al la homo ne enkalkulis nur la pekokazon, sed ĝin ankaŭ antaŭvidis. Dio povus realigi la savon per la Sinjoro Jesuo principe jam tuj post la kazo de la origina peko aŭ nur post la fino de la mondhistorio. Grave nur estas, ke tio iam *unufoje* okazas (Heb 9,28). En la unua kazo la prezo por la peko estus pagita jam tuj dekomence por la tuta estonto; en la dua kazo retrograde por la pasinto. El la komerca vivo oni konas ambaŭ manierojn: la antaŭpagon kaj la postpagon. Dio decidis en sia saĝo la „*optimuman tempmomenton*“. Rigardante tion oni povas legi en la epistolo al Galatoj 4,4: „*Sed kiam venis la pleneco de la tempo, Dio elsendis Sian Filon.*“ La homoj, vivantaj antaŭ la alveno de Jesuo kaj konsiderantaj la *tiamajn* ordonojn de Dio por atingi savon, estis samtiel per la ofero sur Golgoto savitaj kiel tiuj, kiuj estis naskitaj *post* lia alveno kaj alprenas la evangelion (Heb 9,15). La tempan aspekton de la por ni jam okazintaj saveventoj esprimas la epistolo al Romanoj 5,8 tiel: „*Sed Dio rekomendas al ni Sian amon en tio, ke dum ni ankoraŭ estis pekuloj, Kristo mortis por ni.*“

En la tempo de Abrahamo aŭ Ijobo ne ekzistis jam la Ordonoj de Dio. Tiuj viroj agis laŭ sia konscienco kaj fidis al Dio. Tion Li alkalkulis al ili por justeco (Rom 4,3). En la tempo de Davido jam delonge troviĝis la Ordonoj desur Sinajo. Ili estis la mezurkriterio por esti pravigita antaŭ Dio; la pekoj estis forigitaj per oferado de bestoj. Tamen la oferitaj bestoj ne povis elsarki pekojn (Heb 10,4); ili nur indikis la venontan oferon en Jesuo. El tiu kialo li estas ankaŭ karakterizita „*Ŝafido de Dio, kiu forportas la pekon de la mondo*“ (Joh 1,29). Nur per li la kulpo estis komplete pagita. Ni vivas en la tempo de la jam plenumita ofero. Tial la ombraj bildoj (oferado de bestoj) estas ĉesitaj kaj ni ricevas pardonon surbaze de la jam plenumita ofero.

DS4: Ĉu ne estus pli ekonomie, se Jesuo suferus nur por la pekoj, por kiuj ni homoj petas pardonon, anstataŭ por la pekoj de la tuta mondo?

RS4: Laŭ la leĝo de Dio por la peko estas decidita mortkondamno (Rom 6,23). Ni supozu, ke surbaze de la evangelio de Jesuo Kristo en la tuta mondhistorio *nur unu sola* homo estus konvertiĝinta, do ankaŭ por tiu unu nura homo la morto estus la prezo por la peko. Al la penso de Hermann Bezzel la aŭtoro de tiu ĉi libro povas aliĝi, nome, ke la amo de Jesuo estis tiom granda, ke li la savagon plenumus ankaŭ por unu sola pentprepara homo. La elvokita savago de la Filo de Dio havas aliflanke tian dimension, ke ĝi sufiĉas por la tuta homaro. Tial Johano Baptisto povis diri: „*Jen la Ŝafido de Dio, kiu forportas la pekon de la mondo!*“ (Joh 1,29). Nun, ĉiu, kiu volas, povas alpreni la pardonon. La sekva kazo povas tion demonstri:

Multposeda irlanda grandbinulo parolis foje al la homoj, engaĝitaj sur siaj bienoj, tre originalan predikon. Li anoncis sur ĉiuj gravaj lokoj de siaj vastaj bienoj jenan mesaĝon:

„La sekvan lundon mi estos atingebla en buroo de mia biendomo en la tempo inter la deka kaj dekdua horo. En tiu tempo mi estos preta pagi ŝuldojn de miaj bienlaboristoj. La nepagitaj fakturoj estu kunprenitaj.“

Tiu nekutima propono estis la ĉiutaga konversacia materio. Kelkaj opinias la aferon malica blufu, aliaj supozas en la afero kaŝitan hakon, ja neniam ĝis tiu momento io simila estis ofertita. Kaj la anoncita tago alvenis. Multaj homoj troviĝis tie. Precize je la 10-a horo enpaŝis la bienmastro kaj senvorte rapide malaperis malantaŭ la pordo de sia buroo. Neniu kuraĝas enpaŝi. Aliflanke oni multe diskutas pri la aŭtento de la subskribo kaj pri la motivoj de la ĉefo. Je 11-a kaj duono finfine maljuna paro aliras la buroon. La maljuna viro kun plena mano da fakturoj kun tremanta voĉo informdemandas, ĉu oni ĉi tie povas pagi siajn ŝuldojn. Oni primokas lin: „Ĝis nun li pagis nenion!“ Iu alia: „Ankaŭ neniu ĝis nun provis, sed se li tion vere faras, do venu rapide kaj informu nin!“ Tamen ambaŭ altaĝuloj riskas. Ili estas amike akceptitaj, la sumoj estas adiciitaj kaj ili ricevas de la bienposedanto subskribitan ĉekon en la valoro de la tuta ŝuldsumo. Kiam ili ĵus plene dankemaj volis forlasi la buroon, li diras: „Restu, mi petas, ĝis la 12-a horo, kiam mi ŝlosos la buroon!“ Ambaŭ altaĝaj homoj indikas pri la atendanta homamaso ekstere, kiu volas de ili aŭdi, ĉu la propono estas aŭtenta. Sed la mastro restas ĉe sia strikta Ne: „Vi kaptis min per vorto, kaj tiuj ekstere devas fari la samon, se ili volas kovri siajn ŝuldojn.“ La propono de la grandbienulo validis por ĉiuj liaj homoj, kaj lia konto estis sufiĉe plena por kovri ĉiujn ŝuldojn. Sed de siaj ŝuldoj liberiĝis nur unu geedza paro, kiu fidis lian vorton.

(Fonto: F. König: Du bist gemeint, p. 127, tre mallongigita)

Tiel la morto de Jesuo estus sufiĉa por la savo de ĉiuj homoj: „*Tial, kiel per unu* (Adamo) *eraro venis juĝo al ĉiuj homoj ĝis kondamno, tiel same nur per unu* (Jesuo) *justaĵo venis la donaco al ĉiuj homoj ĝis la pravigo de vivo*“ (Rom 5,18). La savpropono validas por ĉiu kaj tial ĝi povas esti anoncita al ĉiu homo. Sed savitaj estos nur tiomaj, kiomaj kuraĝas fidi al la vorto de Jesuo kaj alprenas lin persone.

DS5: *Surbaze de primica morto de Jesuo Kristo Dio al ĉiuj homoj proponas pardonon de iliaj pekoj. Kial do Dio ne proklamas ĝeneralan amnestion por ĉiuj pekoj de ĉiuj homoj?*

RS5: Surbaze de la morto sur la kruco Dio proponas al ĉiuj homoj la savon, tial Paŭlo povis sur Areopago prediki tiel ĝeneralige: „*Kaj la tempojn de nesciado preterrigardis Dio, sed nun Li proklamas al ĉiuj homoj, ke ili pentu*“ (Ago 17,30). Do neniu estas devigata perdiĝi pro sia animŝarĝo. Ĉiu pekulo povas esti amnestiita. Se povis esti pardonite eĉ al tiu Paŭlo, kiu volis

ekstermi la komunumon de Jesuo, kiom pli ankaŭ al ĉiu alia. De ambaŭ kun la Sinjoro Jesuo kunkrucumitaj rabistoj nur *unu* estis savita, ĉar li turnis sin al la Sinjoro konfesante sian kulpon. La alia restis en refuto kaj primokado de Jesuo kaj samtiel ene de siaj pekoj. El tio ni vidas: Dio proklamas neniun ĝeneralamnestion, sed Li procedas rilate al la libera voldecidiĝo de ĉiu unuopa persono:

„Mi atestigas pri vi hodiaŭ la ĉielon kaj la teron: la vivon kaj la morton mi proponis al vi, la benon kaj la malbenon; elektu la vivon, por ke vi vivu, vi kaj via idaro“ (5 Mos 30,19).

„Kaj al ĉi tiu popolo diru: Tiele diras la Eternulo: Jen Mi proponas al vi vojon de vivo kaj vojon de morto“ (Jer 21,8).

Tiu, kiu vere serĉas pardonon, tiu ĝin ankaŭ, spite al plej grandaj misagoj, akiros: *„Venu, kaj ni faru inter ni juĝan disputon, diras la Eternulo: se viaj pekoj estas sangoruĝaj, ili fariĝos blankaj kiel neĝo; kaj se ili estas kiel skarlaro, ili fariĝos kiel lano“ (Jes 1,18).* Ni povus tion, pli draste esprimante, diri tiel: La homo ne pereos pro siaj pekoj, sed pro sia volo, tio estas, pro sia nepreteco penti. En la ĉielo de Dio loĝas nur libervolantuloj kaj neniuj perforte enloĝigita!

DS6: Miaopinie ankaŭ post la morto troviĝas la ŝanco de la saviĝo. La Dia graco finfine devas esti pli granda ol tio, pri kio vi parolas?

RS6: Tiu ĉi demando estas tre ofte starigita, ja ĝi nin vere tre profunde movigas, se ni aŭtente sentas zorgemon pri la homoj, kiuj troviĝas en nia proksimo aŭ tio iam estis. Efektive aŭdiĝas ĉiteme multaj demandoj: Kio pri tiuj homoj,

- kiuj aŭdis pri Jesuo Kristo nur en akve maldensigita maniero;
- kiuj aŭskultis en siaj preĝejoj, kvazaŭ temus pri kristana mesaĝo, nur temojn, kolorigitajn per politika kaj ĉi-monda orientiĝo kaj la temo pri esti kristano tute ne venis en konsideron;
- kiuj alprenis al si kristanan ŝajnon, sed en la kerno de sia vivo ili estas alidirekten orientitaj ol la Biblio instruas;
- ĉe kiuj niaj evangelizaj klopodoj evidente restis senrezultaj, ĉar ni ne trovis aliron al la koro de tiu alia homo aŭ ĉar tiu homo la evangelion ne volis havi;
- kiuj estis edukitaj en la konscia ateismo aŭ en diversaj sektoj kun falsaj instruoj;
- kiel multaj junaj homoj de nia tempo, al kiuj ĝuste ĉe religia instruo en la lernejo estis prezentita supozita neaŭtenteco de la Biblio kaj ili pro tio neniam plu en sia vivo okupiĝis pri demandoj, koncernantaj kredon;
- kaj kio finfine pri la homoj, kiuj sen propra kulpo neniam havis okazon troviĝi en la influproksimo de la evangelio?

Ĉiuj-ĉi demandoj vokis multajn pensemulojn kaj ili apartenas al diversaj grupoj koncerne la akiritajn respondojn, kiuj rilatas al savo postmorte aŭ ĝenerale ekskludas eblecon pereji. Ni volas ĉi tie poekzemple nomi nur kelkajn el inter si kontraŭdiraj ideoj:

1. La *universalrepaciĝuloj* asertas, ke finfine post certa tempo de limigita pundaŭro senescepte ĉiuj estos savitaj: Hitlero kaj Stalino samtiel kiel nihilistoj kaj spiritistoj. (Pli detale pritraktite en [G3, 107-108].)

2. Laŭ la *katolika* percepto venas animoj de mortintoj, kiuj ankoraŭ bezonas purigadon en purgatorion (purigejon), antaŭ ili povos esti enlasitaj en la ĉielon. Tiu ĉi instruo estis aparte forte favorigita de Aŭrelia Aŭgusteno kaj de la papo Gregorio la Granda. La percepto, ke la sufero de „kompatindaj animoj“ en la purgatorio per pripetoj de la vivantoj povas esti malplilongigita, spronis en la mezepoko la vendadon de absolvatestoj kaj starigon de la festotago „de kredantaj animoj“.

3. La *mormonoj* kredas en eblecon, ke iliaj anoj alprenas bapton anstataŭ la mortintaj kaj tiel la nekredantoj eĉ el pasintaj epokoj povas esti savitaj.

4. Laŭ la instruo de *atestantoj de Jehovo* troviĝas por la homoj (krom por 144 000 elektitaj) nek la ĉielo nek la infero. Por iliaj adeptoj estas antaŭvidita komplete renovigita tero anstataŭ la eterna komuneco kun Dio la Patro kaj Lia Filo Jesuo Kristo en la ĉielo. La aliaj restos en iliaj tomboj aŭ la mortintoj povos esti liberdeacĉetitaj per tn. „ofero de deacĉeto“.

5. La *novapostola eklezio* aranĝis specialan „mortoservon“, per kiu iliaj memnomumitaj apostoloj povas efiki ĝis la profundo de la mortinta mondo. La perado de la ĉi-flanke efikantaj savferoj al la alia mondo sekvas pere de la mortintaj apostoloj, kiuj „aliflanke“ kontinuas sian „savlaboron“.

6. Aliaj religiaj grupoj, kiel ekzemple ankaŭ *adventistoj de la 7-a tago* instruas, ke tiuj, kiuj kredas en Kriston, venos en la ĉielon, sed tiuj, kiuj ne kredas, estos definitive nuligitaj, ili simple ne ekzistos plu.

7. Iu alia percepto rilatas al la tekstoparto ĉe 1 Pet 3,18-20, el kiu kelkaj ekzegetoj vidas predikadon de Jesuo en la regno de la mortintaj kun celo atingi savon. (Pli detale en [G3, 146-153].)

Ĉiuj-ĉi perceptoj provas – certe kun bona intenco – trovi esperon por la menciitaj persongrupoj. Sed la tuta spekulaciado nin ne helpas por vidi antaŭen, kaj tiel ni volas demandi tiun, kiu sola nin povas helpi ĉe alveno tien: Dion kaj Lian vorton. Tiel oni devas surfone de la bibliaj tekstoj kontroli, ĉu troviĝas post la morto ankoraŭ iu savebleco. Ĉar ĉi tie temas pri ekstreme grava demando, ni povas supozi, ke Dio en la Biblio ne lasas nin en neklaro kaj nescio (komp. alineon B51 en Aldono, parto I). Samtiel nur la Skribaĵo nin helpas rekoni falsajn instruojn en ilia kerno, por ke ni ne estu misgvidataj per falsa doktrino.

1. Post la morto sekvas la juĝo: En la lumo de la Biblio ĉiuj imagoj, laŭ kiuj la homoj post sia morto ankoraŭ ricevos proponitan saveblecon, montras sin fantasmagorioj de la homa fantazio, ja „*estas dekretite por homoj unufoje morti, kaj post tio juĝo*“ (Heb 9,27). Tio validas tiel por la homoj, kiuj en iu ajn formo venis en kontakton kun la mesaĝo de Dio, sed samtiel por tiaj, kiuj neniam pri tio ion aŭdis: „*ĉar ni ĉiuj staros antaŭ la tribunala seĝo de Dio*“ (Rom 14,10). Tiun juĝon Dio transdonis al sia Filo. Estos sub la juĝo ne tio, kio post la muro de la morto aldone okazis, sed nur tio, kion la koncerna homo faris ĉi tie kaj en nuna tempo „*por ke ĉiu ricevu tion, kion li faris en la korpo, laŭ siaj faritaĵoj, ĉu bonaj aŭ malbonaj*“ (1 Kor 4,10). Tiun juĝlimtempon neniu eskapos: nek kredantaj nek indiferentaj nek liberpensaj nek tentitaj nek idolanaj ... resume: la tuta homaro (Ago 17,31).

2. La kriterioj de juĝado: La kriterioj de Dia tribunalo ne dependas de iu ajn arbitro; neniu estos favorita aŭ malfavorita (1 Pet 1,17; Rom 2,11). La mezurojn Dio al ni komunikis. Ni estos juĝitaj ekskluzive laŭ la biblie publikigitaj reguloj: „*la vorto, kiun mi parolis, juĝos lin en la lasta tago*“ (Joh 12,48). Tiel ni kompilos la plej gravajn kriteriojn el la tekstoj de la Skribaĵo:

a) Laŭ la justeco de Dio: Ni povas esti certaj: „*Vere, Dio ne malbonagas, kaj la Plejpotenculo ne kurbigas la veron*“ (Ijo 34,12), ja Li estas justa Juĝisto (2 Tim 4,8). Ĉi tie troviĝas neniu kurbigado kaj transformado, ĉar la vero kaj la justeco realiĝas plene: „*Vere, ho Dio, la Sinjoro, la Plejpotenca, veraj kaj justaj estas Viaj juĝoj*“ (Apo 16,7).

b) Laŭ la mezuro de kiom estis al ni donite: Neniu homo egalas la alian, kaj ĉiu ricevis en alia mezuro. La neevangelizitaj idolanoj posedas malpligrandan rekonon pri Dio, nome nur el la kreitaro (Rom 1,20) kaj el sia konscienco (Rom 2,15) kompare al tiuj, kiuj povis aŭskulti la evangelion. Riĉa homo posedas aliajn eblecojn, por fari bonon kaj por subteni la disvastigon de la evangelio ol malriĉa. Persono, pridonacita per diversaj spiritaĵoj donitaĵoj troviĝas en aparta respondeco. Estas diferenco, ĉu iu devis vivi en diktaturo kun multaj limigoj aŭ li povis agi en libera lando. La Sinjoro diras en Luko 12,48: „*Kaj al kiu multo estas donita, el tiu estos multo postulata; kaj al kiu oni multon komisiis, el tiu oni des pli multon postulos.*“

c) Laŭ niaj faroj: Dio konas la farojn de ĉiu aparte kaj Li „*redonos al ĉiu homo laŭ liaj faroj*“ (Rom 2,6). La faroj estas plenumitaj agoj (Mat 25,34-40), kiel ankaŭ la neplenumitaj (Mat 25,41-46). La faroj de ĉiuj homoj estas notitaj en libroj de Dio kaj konsistigas la bazon por valorigi en la juĝo (Apo 20,12-13).

ĉ) Laŭ nia frukto: Ĉio, kion ni faras en la nomo de Jesuo (Luk 19,13) – nia konduto, nia efikado – komprenas la Biblio kiel nepereeban frukton (Joh 15,16). Kaj tiu frukto estas la fundamenta prijuĝmezuro en la juĝo (Luk 19,16-27). Dum ĉiuj mortaj faroj forbrulas (1 Kor 3,15), ĉio restanta ricevos pagon (1 Kor 3,14).

d) Laŭ nia amo: La amo estas aparta frukto, ja ĝi estas la plej granda (1 Kor 13,13). Ĝi estas la plenumigo de la leĝo (Rom 13,10). Ĉi tie temas pri tio, kion ni faris el la amo al Dio kaj al Jesuo (Joh 21,15). La senegoisman amon ni devas distingi de la kalkulamo: „*Ĉar se vi amas tiujn, kiuj amas vin, kian rekompencan vi havas?*“ (Mat 5,46). La fariseo Simono invitis Jesuon al sia domo, sed li regalis lin nek per akvo, por lavi liajn piedojn (Luk 7,44). Sed la malĉastulino ŝmiris liajn piedojn per multekosta ŝmiraĵo. Ŝi ricevis grandan pardonon de siaj pekoj, tial ŝi montris al la Sinjoro multan amon (Luk 7,47). La amo estas la frukto de la spirito (Gal 5,22); ĝi havas signifon poreterne.

e) Laŭ niaj vortoj: Laŭ la eldiro de Jesuo niaj vortoj havas por eterne decidan karakteron. Tiu ĉi aspekto en la juĝo probable plej malforte troviĝas en nia konscio: „*Kaj mi diras al vi, ke pro ĉiu senutila vorto, kiun homoj parolos, ili donos respondon en la tago de juĝado. Ĉar laŭ viaj vortoj vi estos pravigitaj, kaj laŭ viaj vortoj vi estos kondamnitaj*“ (Mat 12,36-37).

f) Laŭ nia respondeco: Per la persona strukturo, ricevita per la kreado, ni estas ligitaj al respondeco. Dio atribuis al ni grandan spacon de libera arbitro, en kiu ni respondecas mem. Ankaŭ en kazo de tento ni mem respondecas por niaj agoj. Eĉ se la malobeco de Adamo ne okazis el propra volo, sed per tento, tamen li devis akcepti la konsekvencojn. Ĉar la tentoj sur la kampo de kredo finiĝas en la pereco, bibliaj admonoj ĉi-teme estas aparte emfazitaj (ekz.:

Mat 24,11-13; Efe 4,14; Efe 5,6; 2 Tim 2,16-18). Pro tio oni ne subtaksu la falsajn instruojn de la sektoj en iliaj postsekvtoj.

g) Laŭ nia rilato al Jesuo Kristo: Nia persona rilato al la Filo de Dio al ĉio-ĉi donas la decidan karakteron: „*Kiu fidas al la Filo, tiu havas eternan vivon; sed kiu ne obeas al la Filo, tiu ne vidos vivon, sed la kolero de Dio sur li restas*“ (Joh 3,36). La peko alportis malbenon sur ĉiujn homojn (Rom 5,18). La sola eliro el tio estas nia ligiĝo al Kristo: „*Ekzistas do jam nenia kondamno kontraŭ tiuj, kiuj estas en Kristo Jesuo*“ (Rom 8,1).

3. La kondamno en la juĝo: Laŭ la supre menciitaj kriterioj ĉiu estos juĝita individue. Neniu aspekto en la vivo de la prijuĝota homo estos pretervidita. Kiamaniere sonos la kondamno? Okazos disdivido de la homaro je du partoj, kiun Jesuo ĉi-flanke formulis en la senco de invito:

„*Eniru tra la mallarĝa pordo, ĉar larĝa estas la pordego kaj vasta estas la vojo kondukanta al la perejo, kaj multaj tra ĝi eniras. Ĉar mallarĝa estas la pordo kaj malvastigita estas la vojo kondukanta al la vivo, kaj malmultaj ĝin trovas*“ (Mat 7,13-14).

Ne troviĝas „ora mezvojo“ por maldecidemaj kaj neniu neŭtrala restadloko inter la ĉielo kaj la infero. Je la fino – kiel rekoneble jam en tiu ĉi vivo – estos distingo nur inter la savitaj kaj pereigitaj. Al la unua grupo la Sinjoro diras: „*Venu, vi benataj de mia Patro, heredu la regnon preparitan por vi de post la komenco de la mondo*“ (Mat 25,34) kaj la alia grupo aŭdos la eldiron de li: „*Mi ne scias, de kie vi estas; foriru de mi, ĉiuj farantoj de maljusteco*“ (Luk 13,25+27). En la dua grupo ne troviĝas nur liberpensuloj kaj idolanoj, sed ankaŭ homoj, kiuj sciis pri la mesaĝo de Jesuo, sed ne servis al li en obero. Surprizitaj ili krios: „*Ni manĝis kaj trinkis antaŭ vi, kaj sur niaj stratoj vi instruadis*“ (Luk 13,26).

4. Niaj konsekvencoj: Post la morto troviĝas – laŭ la Biblio – neniu savebleco plu. La decido estas farita en tiu ĉi vivo, tial la Sinjoro Jesuo diras: „*Strebu eniri tra la mallarĝa pordo*“ (Luk 13,24). Antaŭ la Dia tribunalo estos malfermitaj la libroj de Dio pri ĉiuj detaloj pri nia ĉi-viva agado (Apo 20,12). Beno al tiu, kies nomo tiam estos enskribita en la libro de la vivo. La nekristanaj religioj havas neniun savforton. Kiom da homoj estos savitaj, kiuj neniam aŭdis la ĝojan mesaĝon, tamen ili etendis siajn manojn laŭ Dio (Ago 17,27) kaj sopiris pri la eterna vivo (Rom 2,7), tion ni ne scias. Sed por ni, aŭdintaj la evangelion, troviĝas neniu pardono kaj neniu flankeliro (Heb 2,3), se ni pretertrafas la savon. Ni havis nian ŝancon esti savitaj. Kiamaniere ni povas akcepti tiun ĉi savon, estas elĉerpe prezentita en la Aldono (parto I, punkto 10).

DS7: Kio okazas al la infanoj, kiuj tro frue mortis, por povi akcepti decidon de fido? Kio pri abortitaj fetusoj aŭ pri mense handikapitaj? Ĉu ili ĉiuj estas pereigitaj?

RS7: Baze ni havas ĉi tie la demandon, de kiu tempopunkto la homa embrio estu konsiderata homo. Se oni kredas aktualajn tempofluojn, oni povus akiri impreson, ke tio dependas de la plaĉo de individuaj perceptoj aŭ de la ŝtata leĝdonanto. Sed se oni serĉas fidindajn kriteriojn pri vera komenco de homa ekzisto, ni trovas tion en la Biblio. La individua estiĝo de la homo komenciĝas per kuniĝo de la vira semĉelo kun la virina ovĉelo. Ĉe iu ajn embria evoluo ni konfrontiĝas kun la senpera interveno de la Kreinto: „*Ĉar Vi kreis mian internajon, formis min en la ventro de mia patrino. Mi gloras Vin, ĉar mi estas mirinde kreita; mirindaj estas*

Viaj kreitaĵoj, kaj mia animo tion bone konscias“ (Psa 139,13-14). Okaze de la nomumo de Jeremio argumentas Dio per tio, ke Li vidis lin jam longe antaŭ lia naskiĝo kiel personecon kaj lin elektis por al li atribuita tasko: „*Antaŭ ol Mi formis vin en la utero, Mi vin konis, kaj antaŭ ol vi eliris el la ventro, Mi vin sanktigis, Mi faris vin profeto por la popoloj*“ (Jer 1,5).

Ni fiksi do: La homo estas individuo de la tuta komenco kaj laŭ multaj bibliaj tekstoj (ekz. Luk 16,19-31; Heb 9,27) poreterna kreaĵo, kies ekzisto neniam estas estingota.

Sed kie troviĝas la homo, post kiam li transiras la valon de l' morto? Senduba estas la kazo de tiuj homoj, kiuj aŭdis la evangelion kaj estis en ebleco akiri decidon. Ankaŭ la volo de Dio estas senduba: „*La Sinjoro ne malrapidas pri la promeso, kiel iuj malrapidecon kalkulas; sed pacienca al vi, volante, ne ke iuj pereu, sed ke ĉiuj venu al pento*“ (2 Pet 3,9). La savo aŭ pereado dependas per tio nur plu de nia volo. Ni havas liberon, eniri la ĉielon aŭ la inferon. Ambaŭ vojoj estas disponigitaj al ni por ke ni decidiĝu (5 Mos 30,19; Jer 21,8).

La persongrupoj el la demando supre tamen ne disponas pri propra volo por povi decidi pri tiel longperspektiva demando. Laŭ iu mezepoka misinstruo oni spekulacis, ke la animoj de la nebaptitaj infanoj post ilia frua morto falas en pereon. Ĉi tie temas pri nebiblia instruo, ke la bapto savas la neplenaĝajn infanojn. Laŭ la centraj bibliaj eldiroj ne la bapto, sed la fido en la Sinjoron Jesuon havas savan povon (Ago 16,31). Por respondi la supran demandon tiel ne helpas al ni la bapto de infanoj, kiu kaze de abortigitaj ĉiukaze ne venas en konsideron. La solvon oni trovas en la mezurilo de Dio: „*Vere, Dio ne malbonagas, Kaj la Plejpotenculo ne kurbigas la veron*“ (Ijo 34,12) – laŭ la traduko de Lutero: „*Dio neniam faras maljustaĵon*“; laŭ la angla traduko (Good News Bible): „*La ĉiopova Dio neniam faras malbonon, Li neniam estas maljusta kontraŭ iu ajn*“ ... ja Liaj verdiktoj estas ĉiam justaj (Apo 16,7) kaj estis plenumitaj sen konsideri la personon (1 Pet 1,17; Rom 2,11). Tiel ni povas resumi, ke la menciitaj personoj ne falas en pereon. Ili mem havas neniun kulpon pri sia sorto. Kiam oni venigis al Jesuo etajn infanojn (kaj kompreneble ankaŭ bebojn), la disĉiploj vidis en tio senutilan ŝarĝigadon de la Sinjoro Jesuo, ja li havis tre streĉan tagon post si. Sed Jesuo tiukaze proklamis la infanojn laŭ aparta maniero kiel la heredantojn de la ĉiela regno: „*Lasu la infanojn veni al mi; ne malhelpu ilin, ĉar el tiaj estas la regno de Dio*“ (Mar 10,14).

DS8: Ĉu Judaso ne estis devigita perfidi Jesuon, por ke tiel la savo estu ebla?

RS8: Validas fiksi: la savo ne fariĝis ebla per Judaso, sed per Jesuo. La morto de la Sinjoro Jesuo estis nepra, por ke la savo por la homoj estu efektivigita. Absolute senpeka homo devis trasuferi la kondamnon substitue por la pekuloj. Laŭ la Dia plano li „*estis transdonita pro niaj pekoj kaj estis relevita por nia pravigo*“ (Rom 4,25). Ĉe la efektivigo de la krucumado koncerne la volon ĝis la ago multaj homoj estis enplektitaj, tiel judoj, kiel ankaŭ romanoj: la alta konsilio en Izraelo (Mar 14,64), la homamaso (Joh 19,7; Ago 13,28), Pilato (Mar 15,15) kaj la romaj soldatoj (Mar 15,24). Ankaŭ Judaso estis per sia perfido partopreninta rekte en la afero. Ĉe li troviĝis nenia „dieca devigo“, sed temis pri lia propra decido. Ke la Sinjoro Jesuo la liberan agadon de Judaso antaŭvidis (Joh 13,21-30) kaj ke tio jam en MT estis detale profetita (Zaĥ 11,12-13), estas afero de Dia ĉioscio kaj ne de devigo fare de Dio.

La motivoj de Judaso el la bibliaj tekstoj ne estas klare rekoneblaj. La fondinto de la ekipocentro de Kreling Heinrich Kemner formulis eĉ eblecon, ke Judaso volis puŝi la Sinjoron en tian tiklan situacion, por ke li finfine demonstros sian povon en Izraelo. Judaso tiel ne povis imagi, ke Jesuo senage toleros sian mortigon. Sed eĉ se multaj homoj kontribuis sian parton

por mortigi Jesuon, tamen ili ne estis veraj kaŭzantoj, ja Jesuo mortis pro la peko de la tuta homaro. Ĉiu unuopa persono inter ni havas partoprenon en la morto de Jesuo, ĉar: „*tamen li estis vundita pro niaj pekaj, dispremita pro niaj krimoj; puno por nia bono estis sur li, kaj per lia vundo ni saniĝis*“ (Jes 53,5).

La perfida prisilento de Jesuo antaŭ sensignifa servistino fare de Petro estas tute komparebla kun la perfido de Jesuo fare de Judaso. La esenca diferenco inter tiuj ambaŭ viroj ne troviĝas en ilia peko, sed en la pento. Ĉar Petro sian perfidon pentis (2 Kor 7,10): „*dieca tristo*“ kaj bedaŭris, li ricevis pardonon. Ankaŭ Judaso akirus pardonon, se li serĉus ĝin ĝustaloke – ĉe Jesuo. Sed Judaso ne revenis al sia Sinjoro, tiam la veo super lia ago restas ripozi: „*Ĉar la Filo de homo ja iros, laŭ la antaŭdecido; sed ve al tiu viro, de kiu li estos perfidata*“ (Luk 22,22).

DS9: Ĉu mi rajtas naski ankoraŭ unu infanon, se la ebleco, ke ĝi pereos, estas 50 %? (Demando de juna virino, kiu ĵus alprenis la fidon.)

RS9: Multaj geedzaj paroj volas enmondigi surfone de kreskanta medimalpuriĝo aŭ de minacata militdanĝero akompane de la nuntempa tutmonda armilpotencialo neniujn infanojn plu. En la tradiciaj federaciaj landoj de Germanio ni momente havas negativan kresktendencon, tiel ke la loĝantaro ĝis la fino de la jarmilo malkreskos je du milionoj de 61 al 50 milionoj. Iu alia rigardmaniero venas elplume de Lutero per lia respondo al la konata demando, kion li farus, se la mondo estus sekvatage pereinta: „*Mi plantus pomujon.*“

La starigita demando esprimas fortan responskonscion, kiu la eternon ne nur retenas en okuloj, sed atribuas al ĝi prioritaton antaŭ ĉiuj sin proponantaj motivoj. Por respondi ĝin oni devas klarigi du unuopajn subdemandojn: Kion diras al ni la Biblio pri la nombro da infanoj, kaj kiamaniere ĝi respondas la demandon pri la savo de niaj infanoj. Laŭ la kreoordo de Dio ni estis kreitaj viro kaj virino. La unua de Dio donita tasko al la homo diras: „*Frukto kaj multiĝu, kaj plenigu la teron*“ (1 Mos 1,28); kaj tiu tasko neniam estis nuligita. La kapablo koncipi kaj naski infanojn estas samtiel Dia donaco al la homo, kiel la infanoj mem: „*Jen, heredo de la Eternulo estas infanoj; rekompenco estas la frukto de ventro*“ (Psa 127,3). Riĉa nombro de infanoj estas komprenata kiel aparta beno: „*Bone estas al la homo, kiu plenigis per ili (infanoj) sian sagujon*“ (Psa 127,5). Kaj: „*Via edzino estas kiel fruktoporta vinberbranĉo interne en via domo; viaj filoj estas kiel olivaj branĉoj ĉirkaŭ via tablo. Jen tiel estas benata tiu homo, kiu timas la Eternulon*“ (Psa 128,3-4). Tamen Dio ne donacas al ni nur infanojn (1 Mos 33,5); Lia granda intereso estas ankaŭ, ke ili estu edukitaj por ekkoni Lin:

„*Metu do ĉi tiujn miajn vortojn en vian koron kaj en vian animon, kaj alligu ilin kiel signon al via mano, kaj ili estu kiel memorigaĵo inter viaj okuloj. Kaj instruu ilin al viaj filoj, parolante pri ili, kiam vi sidos en via domo kaj kiam vi iros sur la vojo kaj kiam vi kuŝiĝos kaj kiam vi leviĝos*“ (5 Mos 11,18-19).

Se ni postsekvas tiun ĉi konsilon de Dio, frukto ne mankos: „*Instruu knabon konforme al lia vojo, kaj eĉ maljuniĝinte li ne dekliniĝos de ĝi*“ (Sen 22,6). Tiel ni konsolite rajtas havi infanojn, ja sub tia edukado ili trovos vojon al fido kaj estos savitaj. Validas la granda promeso de Dio: „*Mi amas miajn amantojn; kaj miaj serĉantoj min trovos*“ (Sen 8,17). Dio havas apartan antaŭamon al gejunularo, kiu sin turnas al Li: „*Mi memoras la piecon de via juneco, la amon de via fianĉineco, kiam vi sekvis Min en la dezerto, en lando ne prisemita*“ (Jer 2,2).

Kiel fidantaj homoj ni konsolite rajtas enmondigi infanojn, ja la ebleco, ke ili pereu, neniukaze estas 50:50; super ili estas la promeso de Dio, se ni ilin edukas biblifidele. La sperto de multaj fidantaj geedzaj paroj pruvas, ke la infanoj ankaŭ trovis la vojon de la fido, se ili ek de sia infanaĝo estis instruitaj surfone de la Biblio.

DS10: *En la Biblio legiĝas pri la elektiteco fare de Dio. Ĉu do oni ne havas liberan volon, se la decido pri la pereco aŭ saviĝo jam estas donita?*

RS10: Antaŭ ĉio de Aŭrelio Aŭgusteno kaj Kalveno (Calvin) estis argumentita la tn. antaŭdestino (lat.: *praedestinatio*). Tio estas instruo, kiu iras de la Dia antaŭdecido, ke homoj estas antaŭdestinitaj ĉu por kredo ĉu por malkredo; por savo aŭ por pereco. Pro tiu duopa ebleco oni parolas pri „duopa antaŭdestino“. Tamen oni devas kontroli tiun ĉi instruon surfonte de la Biblio.

En la respondoj al la antaŭaj demandoj estis aparte emfazita la libero de la homo koncerne lian decidiĝon. Tiel povis esti ĝi impreso, kvazaŭ la homo estus la sola aganta kaj Dio kondutus plene pasive. Sed tio ne korespondas kun la biblia atestado. En Rom 9,16+18 oni povas legi: „*Tial do tio apartenas ne al tiu, kiu volas, nek al tiu, kiu kuras, sed al Dio, kiu kompatas. Tial Li favorkoras ĉiun, kiun Li volas; kaj ĉiun, kiun Li volas, Li obstinigas.*“ Ĉi tie la emfazo estas ĉe la agado de Dio. La homo troviĝas samtiel en aktiva kaj libere formanta mano de la Kreinto, kiel argilo en libere formanta mano de potisto: „*Sed antaŭ tio, ho viro, kiu vi estas, ke vi respondas kontraŭ Dio? Ĉu faritaĵo diros al sia farinto: Kial vi faris min tiel? Aŭ ĉu la potfaristo ne havas rajton super la argilo, el la sama maso fari jen vazon por honoro, kaj jen vazon por malhonoro?*“ (Rom 9,20-21). Ni do ne havas rajton je savo. Libera decidiĝo de la homo estas ĉiam en paro kun libera elektiteco fare de Dio. La penso pri la elektiteco estas argumentita aparte per sekvaj bibliaj tekstoj:

- Mt 22,14: „*Ĉar multaj estas vokitaj, sed malmultaj estas elektitaj.*“
- Joh 6,64-65: „*Sed estas iuj el vi, kiuj ne kredas. Ĉar Jesuo sciis de la komenco, kiuj estas la nekredantoj, kaj kiu lin perfidos. Kaj li diris: Tial mi diris al vi, ke neniu povas veni al mi, se tio ne estas donita al li de mia Patro.*“
- Efe,1,4-5: „*Kiel Li elektis nin en li antaŭ la fondo de la mondo, por ke ni estu sanktaj kaj senmakulaj antaŭ Li en amo; antaŭdestininte nin por filadopto per Jesuo Kristo al Si mem, laŭ la aprobo de Sia volo.*“
- Rom 8,29-30: „*Ĉar kiujn Li antaŭkonis, tiujn Li antaŭdifinis kiel konformajn al la bildo de Lia Filo, por ke ĉi tiu estu la unuenaskita inter multaj fratoj; kaj kiujn Li antaŭdifinis, tiujn Li ankaŭ vokis; kaj kiujn Li vokis, tiujn Li ankaŭ justigis; kaj kiujn Li justigis, tiujn Li ankaŭ gloris.*“
- Ago 13,48: „*Kaj aŭdinte tion, la nacioj ĝojis, kaj gloris la vorton de Dio; kaj el ili kredis ĉiuj, kiuj estis difinitaj por eterna vivo.*“

Koncerne la biblian komprenon de la elektiteco sekvaj aspektoj havas bazan signifon:

1. Tempo: La elektiteco okazas en larĝa tempa retroago, kiu ĉiukaze troviĝas antaŭ nia ekzisto: antaŭ la fondo de la mondo (Efe 1,4), antaŭ la koncipado (Jer 1,5) kaj de la tuta komenco (2 Tes 2,13).

2. Servo: La elektiteco enhavas konstantan servon al Dio. Tiel Dio ekzemple elektas Salomonon por konstrui la templon (1 Kro 28,10), la genton Levio por la sacerdota servo (5

Mos 18,5); Jesuo elektas la disĉiplojn por la apostola servo (Luk 6,13; Ago 1,2), kaj ĉiuj kredantoj estas elektitaj por doni frukton (Joh 15,16).

3. Sen konsidero de persono: La elektiteco okazas ne laŭ homaj meritoj aŭ mezuroj. Ĝuste kontraŭe, Dio rigardas la minimumon: Izraelo estas la plej malgranda nacio (5 Mos 7,7), Moseo ne estas lerta parolisto (2 Mos 4,10), Jeremio opinias sin tro juna (Jer 1,6), kaj al la komunumo de Jesuo apartenas prefere sengravuloj de tiu ĉi mondo (1 Kor 1,27-28).

4. Por la savo, sed ne por pereco: Kion deziras Dio – ĉu nian savon aŭ nian perecon? Dio mesaĝas sendube al ni sian intencon: „*Kiel paŝtisto esploras sian ŝafaron, kiam li alvenas al siaj diskurintaj ŝafoj, tiel Mi esploras Miajn ŝafojn*“ (Jeĥ 34,12). Jesuo resumas la motivon de sia alveno en tiun ĉi mondon per la versiklo: „*Ĉar la Filo de homo venis, por savi tion, kio estis perdita*“ (Mat 18,11). Dio en la persono de Jesuo mem survojiĝas serĉi, por ke li akirus homojn por la vivo eterna. La volo de Dio por doni savon estas direktita al la tuta homaro: „*Dio, nia Savanto, volas, ke ĉiuj homoj estu savitaj kaj venu al la scio de la vero*“ (1 Tim 2,4). Tiu volo de Dio estas evidenta ankaŭ en: „*Ĉar Dio nin destinis ne al kolero, sed al la ricevo de savado per nia Sinjoro Jesuo Kristo*“ (1 Tes 5,9). Estas evidente: oni trovas en la Skribaĵo firman ligan inter la nocioj elektiteco kaj saviteco, dum ne troviĝas ligo inter pereco kaj elektiteco. Dio do neniam elektas por pereci. Tiel Dio ŝtonigas la koron de faraono nur surbaze de ties insista idolana sinteno, sed li neniukaze estis antaŭdestinita por pereci antaŭ sia naskiĝo. Ke troviĝas certa „tromalfruo“, la Biblio ĉiam denove atestas, dum la Biblio nenie instruas antaŭelektecon por la infero. Herodo per sia mortigo de Johano Baptisto tro streĉis la arkon de sia aŭdkapablo, tiel Jesuo lin ne respondis plu (Luk 23,9).

Ni notu: Ekzistas ambaŭ faktoj (komplementa eldiro!): Dio elektas la homon por esti savita. Tamen la homo estas starigita antaŭ la responso alpreni la savon el libera arbitro. Kiam la perdita filo esprimis sian decidon: „*Mi leviĝos, kaj iros al mia patro*“ (Luk 15,18), lia patro lin kure renkontis kaj lin alprenis (Luk 15,20). Se ni alprenas la savon en libera decido, la promeso de Dio en ni efektiviĝas: „*Mi ekamis vin per amo eterna*“ (Jer 31,3) kaj: „*Li elektis nin en li antaŭ la fondo de la mondo*“ (Efe 1,4). Antaŭ ol ni decidiĝas por Dio, Li jam longe antaŭ nia erao decidiĝis por ni. Dio atendas kaj respektas nian voldecidon; tamen sen Lia kompatato neniun alpreno estus ebla (Rom 9,16). Ĉe kiomaj homoj la Dia elektiteco (Fil 2,13) kaj la homa libera arbitro (Fil 2,12) sinergias, scias nur la Sinjoro.

DS11: Ĉu vi povas al mi per naturscienco pruvi, ke la infero ekzistas?
(Demando de gimnaziano.)

RS11: Al la aserta kampo de la scienco estas sendube desegnitaj limoj. Bedaŭrinde ili ofte estas pretervidataj. La eblojn rekoni kaj klarigi etendiĝas nur ĝis tie, ĝis kie oni povas mezuri la procesojn en la materia mondo. Tie, kie procesoj ne estas mezureblaj kaj esprimeblaj per nombroj, la sciencoj ne povas plu ilin klarigi. La naturscienco tiel ne devas transiri la limojn, desegnitaj al ĝi, cetere ĝi ĉesas esti vere scienco kaj fariĝas nura spekulaco. Tiel la sciencoj ne estas fontoj de informoj pri la komenco kaj pri la fino de la mondo. Ankaŭ rilate demandojn transe de la mortomuro neniun scienco povas al ni ion diri.

Se do la scienco nenion povas al ni diri pri la ekzisto de la infero, tamen troviĝas la unika loko, en kiu ni povas trovi certecon: desur la kruco sur Golgota ni povas legi la veron pri la ĉielo kaj pri la infero. La kruco estas la plej bona ekzegeto de la Skribaĵo. Se ĉiuj homoj kvazaŭ sur la kurtrako aŭtomate atingus la ĉielon, tiam la kruco estus superflua. Se troviĝus iu

ajn religio aŭ alia vojo por atingi la savon, tiam do Dio ne lasus sian amatan Filon sangoverŝi sur la kruco. Desur la kruco ni tiel povas klare legi: Vere troviĝas la infero. La Sinjoro Jesuo faras ĉi tie ĉion, por ke ni estu liberigitaj de la infero. Sen la ago sur Golgota ni ĉiuj estus konsumitaj de la malbeniteco (Rom 5,18). Ni povas per unu nura frazo resumi la okazadon sur la kruco: „Ĉi tie la Filo de Dio savas de la infero!“ Neniam estis farita io pli granda por la homoj ol per la faro sur Golgota. La Sinjoro Jesuo predikis ĵurpete pri la amo kaj mizerikordo, graco kaj justeco, invitante pri la ĉielo; sed kun aparta sereno li parolis pri la infero. Li kvalifikis ĝin senfonda abismo, loko, „*kie ilia vermo ne pereas kaj la fajro ne estingiĝas*“ (Mar 9,44) kaj kiel „*eternan punon*“ (Mat 25,46). Sub la scio de tiu ĉi realo li avertas kun ne plu superebla ĵurpeto, por ke ni ne alvenu tien:

„Kaj se via dekstra okulo faligas vin, elŝiru kaj forĵetu ĝin; ĉar estus pli bone por vi, se unu el viaj membroj pereus, ol se via tuta korpo estus ĵetita en Gehenan“ (Mat 5,29).

„Kaj se via mano aŭ via piedo faligas vin, detranĉu ĝin kaj forĵetu ĝin de vi: estas bone por vi eniri en vivon kripla aŭ lama prefere ol, havante du manojn aŭ du piedojn, esti enĵetita en la eternan fajron“ (Mat 18,8).

5. Demandoj pri diversaj religioj (R)

La esenco de religioj: El la faroj de la kreado ĉiu povas konkludi pri la nepra Kreanto (Rom 1,19.21). Depost la originpeka falo la konscienco de la homo aludas al la statuso de disiĝeco for de Dio kaj al la kulpohava konduto de la homo: „(Idolanoj), *kiuj elmontras la faradon de la leĝo skribita en iliaj koroj, kiam ilia konscienco kunatestas, kaj iliaj rezonadoj inter si akuzas aŭ defendas ilin*“ (Rom 2,15).

Per *propra* pensado kaj volo ĉiuj nacioj serĉis la religion al Dio kaj evoluigis ĉe tio diversajn religiojn. La vorto *religio* venas el la latina *religio* (= konsciencobeo, dio-timo), kio venas el la latina verbo *re-ligare* (re-ligi). Tiu ĉi religio estas praktikata esence per du manieroj, karakterizitaj de du ecoj: per plenumado de home elpensitaj preskriboj (ekz. oferritoj) kaj per uzo kaj estimadorado de specialaj objektoj, vidataj escepte gravaj (ekz. figuroj de Buddho, preĝmueliloj, la kubo Kabao en Meko ktp.).

Sub la nocio „religio“ ni komprenas en sekvaj tekstopartoj ĉiujn homajn klopodojn atingi Dion. Laŭ la instruo de la evangelio tamen okazas la malo: Dio mem agas kaj venas al la homo. Konsekvence ni do ne prenas la biblian vojon por religio (pli detale en [G3]).

DR1: *Troviĝas multaj religioj. Ili ĉiuj do ne povas esti falsaj. Ĉu ne sonas aŭdace, se la kristana instruo asertas, ke ĝi estas la nura vojo al la eterna vivo?*

RR1: Neniu religio savas, eĉ la kristana ne, se ĝi manifestiĝas kiel religio. Ekzistas unu nura Dio, nome tiu, kiu kreis la ĉielon kaj la teron. Nur la Biblio raportas pri tiu Dio. Do nur Li povas al ni devige diri, kio servas al nia savo. Se iu ajn religio troviĝus en pozicio nin savi de eterna pereco, Dio ĝin certe menciis. Tiam la morto de Kristo sur la kruco ne estus nepra. Sed ĉar okazis la ofero sur Golgota, tio do estis senkondiĉe nepra por nia savo. Tiel la kruco de Jesuo provizas nin per senduba aludo, ke ne troviĝas pli malmultekosta metodo por viŝi

pekojn antaŭ la sankta Dio kaj nin tiel nur la persona sinturno al Jesuo Kristo kaj la disponigo de sia vivo al Li savas. En ĉiuj religioj la homo devas per sia propra penado kvazaŭsavi sin mem; laŭ la instruo de la evangelio Dio mem faris ĉion per sia propra Filo kaj al la homo restas nur plu alpreni la savon en la fido. Tial tekstas en *Agoj* de la apostoloj 4,12 tiel ekskluzive: „*Kaj en neniu alia estas savo; ĉar ne estas sub la ĉielo alia nomo* (krom Jesuo), *donita inter homoj, per kiu ni devas esti savitaj.*“ Krom per Jesuo troviĝas neniu alia ponto por atingi la ĉielon!

Ĉiuj religioj estas nur briletanta fatamorgano en la dezerto de la perdita homaro. Al soifega homo ne helpas iluzia bildo de akvoputo. Samtiel la tolerideo koncerne ĉiujn fantaziajn imagojn de la homoj finfine kondukas al la morto (Pro 14,12). Tiu homo bezonas freŝan akvon. La Biblio montras per granda sendubeco al la nura reala oazo, al la nura supervivŝanco, al Jesuo Kristo:

„*Mi estas la vojo kaj la vero kaj la vivo; neniu venas al la Patro krom per mi*“
(Joh 14,6).

„*Ĉar neniu povas meti alian fundamenton krom tiu, kiu estas metita, tio estas Jesuo Kristo*“ (1 Kor 3,11).

„*Kiu havas la Filon, tiu havas la vivon; kiu ne havas la Filon de Dio, tiu la vivon ne havas*“ (1 Joh 5,12).

DR2: *Ĉu kristanoj kaj islamanoj ne preĝas al la sama Dio?* (Demando de islamano.)

RR2: „Ĉu mi rajtas starigi kontraŭdemandon: Ĉu via dio Allah estas la Patro de Jesuo Kristo?“ – „Ne, Allah ne havas filon. Tio estus blasfemo!“ – „Nu, vidu, sekve via dio kaj mia Dio ne estas la sama Dio.“ Surfone de multaj religioj proponiĝas ankaŭ al multaj aliaj la tolerdemando, ĉu oni fakte ne adoras la saman Dion. Jam en la malnovtestamenta epoko Dio de la Biblio proklamis sin esti la nura ekzistanta Dio: „*Mi estas la unua, kaj Mi estas la lasta, kaj ne ekzistas Dio krom Mi*“ (Jes 44,6); „*Mi, Mi estas la Eternulo; kaj krom Mi ekzistas nenia savanto*“ (Jes 43,11). Tiu vivanta Dio estas Dio de Abrahamo, Isaako kaj Jakobo (Mat 22,32); Li estas la Patro de Jesuo Kristo (Mar 14,36a). Ĉi tie mi montras sekvajn diferencojn inter Allah kaj la Patro de Jesuo Kristo:

1. La rilato inter Dio kaj la homo: En islamo Dio ne rivelacias sin. Li restas en la neatingebla foro. La konstanta alvoko „Allahu agbar“ (= Dio estas la ĉiam pli granda) manifestas: Oni ne povas paŝi en personan rilaton kun li. Allah restas la ĉiam transcenda, kiel orienttradicia despoto alte super siaj subuloj reganta.

2. La rilato Patro-infano: Por islamanoj la nocioj kiel „esti infano de Dio“ kaj „Dio kiel la Patro“ („Abba, amata Patro“, Rom 8,15) ne estas nur nekompreneblaj, sed rekte blasfemaj, ja Allah estas strikte disigita de tiu ĉi mondo.

3. Dio, estante homo: La centra evento de la biblia savhistorio estas la homfariĝo de Dio en Jesuo Kristo. Dio ne promenis nur inter ni, li trasuferis ĉiujn pekojn ĝis sia morto sur la kruco. La de tio akirita savo de la homo estas por islamo absolute neakceptebla kaj nekomprenebla.

4. La mizerikordo de Dio kaj la amo: Se Dio povas esti mizerikorda rilate la pekan homon, tiam la prezo por tio estas neimageble granda: „*Vi ne aĉetis por Mi per mono bonodoran kanon kaj ne satigis Min per la sebo de viaj buĉferoj; vi nur laborŝarĝis Min per viaj pekoj,*

lacigis Min per viaj malbonaĝoj“ (Jes 43,24). Dio estas kompata al ni, ĉar Li nin multekoste deaĉetis (1 Kor 6,20; 1 Pet 1,19). La kompato de Allah kostas nenion; ĝi aperas arbitre.

5. Dio estas nia garantio: En islamo estus neimageble paroli pri dio, kiu donacus al ni azilon, garditecon, pacon kaj savcertecon: „*Ĉar mi konvinkiĝis, ke nek morto, nek vivo, nek anĝeloj, nek aŭtoritatoj, nek estantaĝoj, nek estontaĝoj, nek potencoj, nek alteco, nek profundeco, nek iu alia kreitaĝo povos apartigi nin de la amo de Dio, kiu estas en Kristo Jesuo, nia Sinjoro*“ (Rom 8,38-39). En islamo estus neimagebla la memhumiliĝo de Dio ĝis la kruco, kaj la Sankta Spirito, kiu estas elversita en niajn korojn; neimagebla ankaŭ la reveno de Jesuo en povo kaj gloro.

La dio de Korano kaj Dio de la Biblio povas kelkloke montri similecojn. Sed sub pli proksima observo fariĝas evidente, ke ne ekzistas komuneco inter ili. Tial islamanoj kaj kristanoj ne preĝas al la sama Dio.

DR3: *Helpe de kio mi povas rekonii, ke la evangelio ne estas unu el la religioj, sed havas Dian originon?*

RR3: Jam kelkaj rimarkeblaj diferencoj inter la religioj kaj la evangelio povas nin konduki al la respondo al la demando pri la vero:

1. En ĉiuj religioj la homo provas atingi Dion el si mem, tamen neniu tia serĉanto povas vere atesti tiel: „Mi trovis personan rilaton al Dio, mi havas pacon en mia koro, mia kulpo estas pardonita, mi havas certecon de eterna vivo.“ En la evangelio de Jesuo Kristo Dio sin turnas al ni. Li transpontas per la kruco la abismon de la peko kaj donacas al ni la savon. Tiu, kiu tion ĉi alprenas, povas atesti: „*Ĉar mi konvinkiĝis, ke nek morto, nek vivo, nek anĝeloj, nek aŭtoritatoj, nek estantaĝoj, nek estontaĝoj, nek potencoj, nek alteco, nek profundeco, nek iu alia kreitaĝo povos apartigi nin de la amo de Dio, kiu estas en Kristo Jesuo, nia Sinjoro*“ (Rom 8,38-39).

2. La profetaj anoncoj de la estonta savdonanto en MT (ekz.: 1 Mos 3,15; 4 Mos 24,17; Jes 11,1-2; Jes 7,14) plenumiĝis laŭvorte. En neniu religio troviĝas tiaj profetaĝoj kun antaŭanoncoj kaj plenumiĝoj.

3. Dio kondamnis ĉiujn religiojn kiel idolservojn kaj sorĉadon (1 Kor 6,9-10; Gal 5,19-21; Apo 21,8). Neniu el multaj religioj havas savan karakteron (Gal 5,19-21). Se iu tia troviĝus, kiu povus nin savi, do Jesuo ĝin rekomendus al ni, kaj li ne devus morti amaran krucomorton. Sed la Filo de Dio iris sur la krucon por efektiviĝi la nuran saveblecon. Tial li diris en konsekvenco: „*Iru en la tutan mondon, kaj prediku la evangelion al ĉiu kreitaĝo*“ (Mar 16,15).

4. Dio konfirmis la oferon de Jesuo Kristo per Lia resurekto el la mortintoj (Rom 4,24-25). Jen la sola tombo, restinta malplena, en la mondhistorio: „*Kial vi serĉas la vivanton inter la mortintoj? Li ne estas ĉi tie, sed leviĝis*“ (Luk 24,5-6). Ĉiuj religiaj fundintoj mortis kaj restis en siaj tomboj. Nur Jesuo povis diri: „*Mi vivas, tial vi ankaŭ vivos*“ (Joh 14,19).

5. En ĉiuj religioj la homo provas sin savi per siaj agoj. Kontraŭe, la evangelio estas la faro de Dio (Jes 43,24b; Joh 3,16). Al la savofaro sur Golgoto la homo nenion povas kontribui: „*Ĉar vi estas aĉetitaj per prezo*“ (1 Kor 6,20).

6. Religioj eliras el falsa imago pri la homo kaj samtiel desegnas falsan bildon pri Dio. Nur la Biblio diras al ni, kiu ni estas kaj kiu estas Dio. El ni mem ni ne troviĝas en pozicio nin tiel ŝanĝi, ke tio povus plaĉi al Dio, „*ĉar ĉiuj pekis kaj maltrafis la gloron de Dio*“ (Rom 3,23).

7. En neniuj religioj Dio forlasas la ĉielon por savi la homon. En Jesuo Dio fariĝis homo: „*Kaj la Vorto fariĝis karno kaj loĝis inter ni, kaj ni vidis lian gloron, gloron kvazaŭ de la solenaskita de la Patro, plena de graco kaj vero*“ (Joh 1,14).

Jesuo Kristo tiel ne estas alternativo al religio. Li estas ĝia negado kaj forĵeto. Li estas la unika vojo hejmen – al la patra domo de Dio (Joh 14,6).

6. Demandoj pri la vivo kaj la fido

DF1: *Pro kio oni vivas sur la tero?*

RF1: Nia vivo ne ekzistas pro tio, ke ni elirus el iu evolucia proceso, sed ĉar estis la volo de Dio, krei la homon. La Biblio nenie nin informas pri la kialo de la kreado de la homo, kiel: ĉar Dio estis sola; ĉar Dio havis ĝuon en kreado; ĉar Dio volis havi partneron aŭ ĉar Dio volis krei estaĵojn por ilin ami. En la teksto 1 Mos 1,26-27 ni legas pri la volo de Dio krei la homon kaj pri la procedo: „*Kaj Dio diris: Ni kreu homon laŭ Nia bildo, similan al Ni; kaj ili regu super la fiŝoj de la maro kaj super la birdoj de la ĉielo kaj super la brutoj, kaj super ĉiuj rampaĵoj, kiuj rampas sur la tero. Kaj Dio kreis la homon laŭ Sia bildo, laŭ la bildo de Dio Li kreis lin; en formo de viro kaj virino Li kreis ilin.*“ El tio ĉi estas evidente: ni estas volitaj estaĵoj. Ni do ne estas „kosmaj angulstarantoj“ (F. Nietzsche) nek „ciganoj rande de la universo“ (J. Monod) nek iaj ajn progresantoj el la regno de la bestoj, sed ni devenas el la rekta krea ago de Dio.

Preter tio ĉi la Biblio informas nin pri tio, ke ni estas amataj de Dio: „*Mi ekamis vin per amo eterna, tial Mi altiris vin favorkore*“ (Jer 31,3). Aŭ: „*Ĉar Dio tiel amis la mondon, ke Li donis Sian solenaskitan Filon, por ke ĉiu, kiu fidus al li, ne pereu, sed havu eternan vivon*“ (Joh 3,16). Tiu ĉi versiklo montras al ni aldone, ke ni estis destinitaj por la eterna vivo.

DF2: *Kio estas la senco de la vivo?*

RF2: Ni homoj estas la nuraj surteraj estaĵoj, kiuj demandas pri la senco. Nin maltrankviligas tri bazaj demandoj: De kie mi venas? Pro kio mi vivas? Kien mi iras? Multaj pri tio meditis. La filozofo el Karlsruhe Hans Lenk emfazas, ke ni el lia fako neniukaze povas atendi respondon, kaj skribas: „La filozofio malofte donas finajn enhavajn solvojn; ĝi estas problemfako, nenia materi- kaj rezultfako. Por ĝi estas foje nova problemperspektivo multe pli grava ol parta solvo de iu tradiciita demando.“ La verkisto Hermann Hesse skribas: „La vivo estas sensenca, terura, stulta kaj tamen brila – ĝi ne ŝercas pri la homo, tamen ĝi ne zorgiĝas pro la homo pli ol pro la lumbriko.“ La franca verkisto pri ekzistalismo, ateisto s-ino Simone de Beauvoir falis en sencecon: „Kian sencon havas la vivo, se ĝi tamen estos radike detruita, neniigita? Pro kio do iam ĉeesti? Sensenca estas finfine ĉio: la belo de la vivo, la agoj de la homoj, ĉio. La vivo estas absurda.“ Ankaŭ la sciencoj kiel la psikologio, biologio, medicino, povas doni al ni neniun respondon, ja la demando pri la senco ne apartenas al ilia eldira kampo.

Kelkaj homoj vidas la sencon de sia vivo en tio, ke:

- *ili volas fari ion bonan*: Multaj dividas tiun ĉi humanisman penson, kiu tamen ne estas jam specife kristana. Fari bonon estas cetere surtaskigita ankaŭ al kristanoj (Gal 6,10; 2 Tes 3,13), sed tamen tiu, kiu faras bonajn farojn, per tio ne jam estas kristano.
- *ili volas mem veni al renomo*: La sportistoj alstrebas altklasajn sportajn titolojn kaj ormedalojn. La artistoj serĉas sian rekonon sur la scenejoj de tiu ĉi mondo.
- *ili volas krei al si ion nepereblan*: Tiel ili pensas, ke ili povus pluvivi en siaj infanoj aŭ en la societo (ekz. per mondediĉoj, ligitaj kun ilia nomo). Aliaj deziras eternigi sin per poeziaĵoj, memoaroj aŭ taglibroj.

Ni devas pripensi: ĉia mondeca gloro estas nur io portempa. Post nia morto ni mem ne profitas de tio, ja tie, kien ni iros: „*kaj jam por neniam ili havas partoprenon en io, kio fariĝas sub la suno*“ (Koh 9,6).

Se nia vivo estas la kreaĵo de Dio, ĝi do nur povas havi sencon, se ĝi vivas kun Dio kaj estas de Li gvidata. La homa koro – eĉ se ĝi posedus la tutan ĝojon de la mondo – restus maltrankvila, malplena kaj sen plenumo, se ĝi ne trovus pacon en Dio. Tial ni volas ekscii de Dio, kio donas al ni la sencon. Tio estas skizita en tri punktoj:

1. La Dia celo rilate nian vivon estas, ke ni venos al la kredo. Sen la sava kredo en la Sinjoron Jesuon Kriston ni estas malsavitaj. Tial Paŭlo diris al la gardista ĉefo de la prizono en Filipino: „*Kredu al la Sinjoro Jesuo, kaj vi estos savita, vi kaj via familio*“ (Ago 16,31). Tiusence „(Dio) *volas, ke ĉiuj homoj estu savitaj kaj venu al la scio de la vero*“ (1 Tim 2,4). Kaj ĉar tiu savo por ĉies homa vivo havas absolutan prioritaton, la Sinjoro Jesuo diris al la malsanulo kun paralizo unue: „*Kuraĝu, filo, viaj pekoj estas pardonitaj*“ (Mat 9,2). La savo de la animo havas en la vidpunkto de Dio prioritaton antaŭ la kuracado de la korpo.

2. Kiam ni estas savitaj, ni troviĝas en la servo je Dio: „*Servu al la Eternulo kun ĝojo!*“ (Psa 100,2). Kiel la postsekvanto de Jesuo nia vivo devas esti direktita tiel, ke ni ankaŭ aliajn faras liaj disĉiploj (Mat 28,19).

3. „*Amu vian proksimumon kiel vin mem*“ (Mat 22,39). Per tiu ĉi am-ordono Dio ne surtaskigas nin nur por malproksimaj en Sudafriko aŭ Ĉilio, sed unuarange por tiuj homoj, kiuj estas senpere sub nia respondeco: nia geedza partnero, niaj infanoj, niaj gepatroj, niaj najbaroj, niaj laborkolegoj. Ke ni nin mem amas, konstatas la Biblio kiel fakto, sed tiu amo estu dediĉita ankaŭ al la proksimumo.

Kion ni en fido sub la supre menciitaj punktoj 2 kaj 3 faris, tion la Biblio nomas la fruktoj de nia vivo. Kontraŭe al ĉiuj portempaj sukcesoj nur tiuj ĉi fruktoj restas (Joh 15,16). Dio serĉas ilin je la fino de nia vivo kaj demandas nin, kion ni faris per la fidintaj pundoj (vivo, tempo, mono, talentoj – Luk 19,11-27). Eĉ la glaso de malvarma akvo, kiun ni proponis en la nomo de Jesuo, havas poreternan signifon (Mat 10,42).

DF3: *Kiamaniere mi povas en mia ĉiutaga vivo atingi klarecon en la kredo?*

RF3: Tiu, kiu en sia koro fariĝis kredanta en Jesuon Kriston, ĝisvivos klare videblan ŝanĝon en sia vivo. Tri punktoj markas la novan vivovoĵon de tia homo:

1. Distanciĝo de pekado: Kiam oni per konvertiĝo ricevas pardonon de la tuta kulpo, oni venas al nova vivmaniero, kiu fundamente distanciĝas de pekado. Kiel la novnaskitaj kristanoj oni ne estas sen pekoj, sed tio, kio antaŭe okazis laŭ la veturplano, nun venas eventuale kiel paneo survoje. Observado de la ordonoj, kiuj ne estas donitaj kiel malpermesoj, sed kiel helpo por sukcesa vivo, donas al onia vivo decidan korekturon. Per tiu ĉi nova orientiĝo oni montras al Dio, ke oni Lin amas (1 Joh 5,3) kaj por oniaj kunhomoj oni estas „la letero de Kristo“ (2 Kor 3,3), kiun ĉiu povas bone legi.

2. La ĉiutaga vivo en la fido: Tiu, kiu kredas en Kriston kaj konsekvence al tio konstante okupiĝas per la Biblio, tiu trovas plenan da helpinstrukcioj por ĉiuj kampoj de la surtera vivo, pri kio nun sekvas certa selekto kiel ekzemplo por orientiĝi. Sed ĉar ĉi tie temas preskaŭ ekskluzive pri la surteraj aspektoj de la fido, ricevas la malnovtestamentaj libroj, Sentencoj kaj Predikanto de Salomono gravan rolon. Oni povas trovi indikojn pri nia propra persono (a) kaj pri la konduto kun aliaj homoj (b):

2a) koncerne propran personon:

- Korpo (Rom 13,14; 1 Kor 3,17; 1 Kor 6,19)
- Manĝado kaj trinkado (Sen 23,20)
- Maniero sin nutri antaŭ la unua peko (1 Mos 1,29)
- Maniero sin nutri post la diluvo (1 Mos 9,3-4; 1 Kor 8,8; Kol 2,16; 1 Tim 4,3-5)
- Dormo (Psa 4,9; Sen 6,6-11; Sen 20,13; Pre 3,13; Pre 10,18; 2 Tes 3,10)
- Nepra laboro (2 Mos 20,9-11; 2 Mos 2,12; Sen 6,6-11; Sen 14,23; Sen 18,9; Sen 21,25; Pre 3,13; Pre 10,18; 2 Tes 3,10)
- Laboro kiel vivprincipo (Pre 2,3-11)
- Kompenso por kunlaborantoj (Jes 65,23; Jer 22,13; Luk 10,7)
- Libertempo (Sen 12,11b)
- Perlaboro de mono kaj bonaĵoj (Pre 4,6; 1 Tim 6,6-8; Heb 13,5)
- Strebado pure mondeca, mondecaj vivenhavoj (Pre 2,2-11)
- Posedo (Mat 6,19; Sen 10,22)
- Riĉeco (Sen 11,28; Sen 13,7; Sen 14,24; Pre 5,18)
- Domkonstruado (Psa 127,1; Jer 22,13)
- Sporto (1 Kor 9,24-25; 1 Tim 4,8)
- Zorgoj (Psa 55,23; Sen 12,25; Fil 4,5; 2 Tim 2,4; 1 Pet 5,7)
- Sekso kaj geedzeco (Sen 5,18-19; Pre 9,9; 1 Kor 7,3-6)
- Sekso ekster geedzeco (Sen 5,20-23; Sen 6,24-32; Jer 5,8-9; Heb 13,4b)
- Peko (1 Mos 4,7; Psa 65,4; Lam 3,39; Joh 20,23; 1 Joh 1,9; 1 Joh 5,17; Heb 12,1)
- Alkoholo (Psa 104,15; Sen 23,30-35; Sen 20,1; Efe 5,18; 1 Tim 5,23)
- Parolmaniero (Psa 119,172; Sen 12,14+5; Sen 18,20-21; Sen 25,11; Efe 5,19; Kol 4,6; Jak 1,19; Heb 13,16)
- Elprovoj (1 Pet 1,6-7; Jak 1,2+12)
- Akuzanta konscienco (1 Joh 3,20)
- Kolero (Efe 4,26)
- Tempo (Luk 19,13b; 1 Kor 7,29; Efe 5,16)
- Pensmaniero (Fil 2,5)
- Songoj (Pre 5,6)
- Ĝojo kaj gajeco (Psa 118,24; Sen 15,13; Sen 17,22; Fil 4,4; 1 Tes 5,16)
- Bonon fari por si mem (Mat 22,39)
- Preciza mezuro (Sen 11,1+24; Sen 10,10)

- Filozofio propra aŭ religio (Sen 14,12)
- Juneco (Psa 119,9; Pre 11,9; Pre 12,1)
- Maljuneco (Psa 71,9)
- Morto (Ijo 14,5; Psa 88,4; Pre 8,8)

Konduto okaze de:

- Malsano (Pre 7,14; Jak 5,14-16)
- Plagoj (Psa 46,2; Psa 50,15; Psa 77,3; Psa 73,21-28; Psa 107,6-8; Fil 4,19)
- Deprimiĝoj (Psa 42,6; Psa 119,25)
- Timo antaŭ homoj (Psa 56,12; Psa 118,6+8; Sen 29,25)
- Malfeliĉa okazo (Jes 45,7; Lam 3,31-37; Amo 3,6)
- Ĉiutagaj aktivadoj (Pre 9,10; Kol 3,17)
- Doni (Sen 11,24-25; Pre 11,1; Mal 3,10; 2 Kor 9,6-7)
- Garantioj (Sen 11,15; Sen 17,18)
- Garantiaĵo (2 Mos 22,25-26)
- Serĉi vojon (Psa 37,5; Psa 86,11; Psa 119,105)
- Serĉi partneron (Kann 3,1; Amo 3,3; 2 Kor 6,14)
- Sufero pro justeco (1 Pet 3,14)
- Misinstruo (Kol 2,8; 2 Pet 3,17; 1 Joh 4,6)
- Planoj (Pre 9,10; Fil 4,13; Kol 3,23)

Indikoj pri la konduto kun aliaj homoj:

- Geedzeca partnero (Efe 5,22-28; 1 Pet 3,1-7; Heb 13,4)
- Infanoj (5 Mos 6,7; Sen 13,1; Efe 6,4; Kol 3,21; 1 Tim 3,12)
- Gepatroj (2 Mos 20,12; Sen 6,20; Sen 30,17; Efe 6,1-3)
- Amikoj (Miĥ 7,5)
- Edzino, timanta Dion kaj virtoplena (Sen 12,4a; Sen 31,10-31)
- Kverelema kaj senbrida edzino (Sen 11,22; Sen 12,4b; Sen 21,19)
- Malamikoj (Sen 25,21-22; Sen 23,17; Mat 5,22+44; Rom 12,14)
- Malicaj homoj (Sen 1,10; Sen 24,1-2; 1 Pet 3,9)
- Frenezuloj, senraciaj homoj (Sen 9,8; Sen 23,9; Psa 14,1-2; Psa 53,1-2)
- Kredantoj (Rom 12,10; Gal 6,2+10b; Efe 4,32; Fil 2,4; 1 Pet 3,8-9)
- Distancitaj de kredo (Mat 10,32-33; Ago 1,8; Kol 4,5; 1 Pet 2,12+15)
- Konsilanto (Sen 15,22; Jes 9,6)
- Kunhomoj (Mat 22,39; Gal 6,10a; 1 Joh 4,17-18)
- Instruistoj pri kredo (Heb 13,7)
- Malsanuloj (Mat 25,36; Jak 5,14-16)
- Kuracisto kaj medikamentoj (Mat 9,12; 1 Tim 5,23)
- Fremduloj kaj gastoj (2 Mos 22,20; 2 Mos 23,9; 3 Mos 10,18-19; Jer 7,6; Jer 22,3; Mat 25,35; Rom 12,13; Heb 13,2)
- Malriĉuloj (Sen 3,27; Sen 19,17; Mat 25,34-40)
- Erariĝintoj (Jak 5,19)
- Misgvidaj instruistoj (1 Joh 4,1-3; Jud 23)
- Dubantoj (Jud 22-23)
- Vidvinoj (1 Tim 5,3; Jak 1,27)
- Gajaj aŭ funebrantaj (Sen 17,22; Rom 12,15)
- Olduloj (3 Mos 19,32; Sen 23,22; 1 Tim 5,1)

- Mortintoj (Pre 9,5-6)

Indikoj pri la konduto:

- Koncerne la komunumon (Ago 2,42; Heb 10,25)
- Koncerne la kreitaron (1 Mos 1,28)
- Koncerne la ŝtaton (Mat 22,21; Rom 13,1-7; 1 Pet 2,13)
- Koncerne Izraelon (Zaĥ 2,12).

3. En la mondo, sed ne de la mondo: La agadkadron de tiuj, kiuj kredas en Kriston, la Sinjoro Jesuo formulis tre koncize: „*Sed ĉar vi ne estas el la mondo, kaj mi elektis vin for de la mondo, tial la mondo vin malamas*“ (Joh 15,19). Tiu, kiu kredas en Jesuon, vivas cetere samtiel en tiu ĉi mondo kiel ĉiuj aliaj, sed lia vivtraĵto posedas transe al tio, kion ni menciis sub la punkto 2 eternecan dimension, kiu efektiviĝas en ties rilato al Dio-Patro kaj Lia Filo kaj en ties spirita konduto:

3a) Konduto rilate al Dio kaj al Jesuo Kristo:

- **Dion** ami (5 Mos 6,5; Psa 31,24; Mat 22,37)
- Lin ekkoni ((Psa 46,11)
- En Lin kredi (Heb 11,6)
- Je Li pensi (Sen 3,5-6; Pre 12,1)
- Liajn ordonojn observi (Pre 12,13; Miĥ 6,8)
- Lin danki (Psa 107,8; Efe 5,20; Kol 4,2)
- Lin adori kaj glori (Psa 103,1-2; Efe 5,19b)
- Lin prikanti (Psa 68,5; Psa 96,1)
- Lin voki en plago (Psa 50,15)
- Lin alpreĝi (Mat 4,10b)
- Sinjoron **Jesuon** ami (Joh 21,16; 2 Kor 5,6; Tim 4,8)
- Lin alvoki (Ago 7,58; Rom 10,13)
- Lin adori kaj glori (Apo 5,12)
- Lin alpreni (Joh 1,12)
- En lin kredi (Mar 16,16; Joh 11,25-26; Ago 16,31; 1 Joh 3,23)
- Lin pli bone ekkoni (Efe 4,13)
- Lin obei (2 Kor 10,5; 1 Pet 1,22)
- Lin postsekvi (Luk 14,27; Luk 14,33)
- Lin servi (Efe 6,7)
- Havi kun li komunecon ((Joh 15,2; 1 Kor 1,9; 1 Kor 11,23-29; 1 Joh 1,3)
- Resti en li (Joh 15,4)
- Preĝi al li kaj lia nomo (Joh 14,13-14; Ago 7,58; Efe 5,20).

3b) Spirita efikado kaj konduto:

- Al la regno de Dio atribui prioritaton (Mat 6,33; Kol 3,2)
- Doni fruktojn (Psa 126,5-6; Luk 19,13)
- Doni fruktojn de la Spirito (Gal 5,22; Efe 5,9)
- Kompili trezoraĵojn en la ĉielo (Mat 6,20)
- Disvastigi la Vorton de Dio (2 Kor 5,20; 1 Tes 1,8)
- Fari tion, kio al Dio plaĉas (Efe 5,10; 1 Tes 2,4)

- Anonci la evangelion (Mat 28,19-20; Fil 1,27; 1 Tim 6,12)
- Flegi komunecon kun kredantaj gefratoj (Mat 18,20; Ago 2,42)
- Vivi en sanktigo (1 Tes 4,3; 2 Tes 2,13; Heb 12,14)
- Riĉe orientiĝi en la Biblio (Joŝ 1,8; Psa 119,162; Kol 3,16)
- Havi spiritajn celojn (Psa 39,5; Fil 3,14).

DF4: *Mi senĉese sonĝas pri la sama afero, kiu min turmentas. Kion mi pensu pri tiuj ĉi sonĝoj?*

RF4: Oni povas distingi tri sonĝospecojn:

1. *Sonĝoj pri Dio:* La Biblio raportas pri kelkaj sonĝoj, per kiuj Dio parolis kun la homoj (ekz.: Jozefo: Mat 1,19-25). Povas esti, ke la sonĝanta persono ekkonas Dion kiel la senperan mesaĝanton (ekz.: Salomono: 1 Reĝ 3,5-15; Danielo: Dan 7) aŭ Dio sendis eksplikanton de sia mesaĝo (ekz.: Jozefo eksplikis en la malliberejo la sonĝojn de la panbakisto kaj de la vinservisto: 1 Mos 40). La sonĝoj, per kiuj Dio parolas al ni, estas rekoneblaj per tio, ke ili nek nin ŝarĝigas nek nin timigas; ili baldaŭ montriĝas aparta helpo en niaj vivsituacioj. Tamen tia parolo de Dio restas laŭ ĉiuj spertoj escepta situacio.

2. *Sensignifaj sonĝoj:* La plej oftaj sonĝoj estas efemeraj kaj neniondirantaj, kiel tion ankaŭ esprimis Ijobo 20,8: „*Kiel sonĝo li forflugos, kaj oni lin ne trovos; li (= la gloro de la sendia homo) malaperos, kiel nokta vizio.*“ La modan praktikon de simbola sonĝeksplikado oni devas objeti: „*La antaŭdiristoj havas malverajn viziojn, rakontas mensogajn sonĝojn, kaj konsolas per vantaĵo*“ (Zeh 10,2). Ankaŭ en la apokrifa libro de Siraĥo 34,1-8 troviĝas helpoplena klarigo: „*Vanajn kaj trompajn esperojn havas malsaĝulo, kaj sensciajn homojn flugigas sonĝoj. Same kia estas la ĉasanto de ombroj, la kaptanto de vento, same tia estas la homo, kiu sin direktas je sonĝoj. Nura ripetado estas la vidaĵo de sonĝo, anstataŭ vizaĝo simileco je vizaĝo. El io malpura kiel estiĝus io pura? Kaj kiel el mensogo estiĝus io vereca? Antaŭdiroj, birdaŭguroj kaj sonĝoj estas trompo; kiel fantazias la koro de naskantino. Se ne la Plejaltulo sendis ilin, kiel averton, vi ne direktu je ili vian koron. Ĉar jam multajn erarigis la sonĝoj, kaj kiuj esperis je ili, tiuj estis faligitaj. La leĝo estos plenumita sen trompo, kaj Saĝeco estas perfekta en buŝo fidinda*“ (Sir 34,1-8).

3. *Sonĝoj kiel neprilaboritaj travivaĵoj:* El la senkonscia tavolo, kiu estas disigita de la konscia volo kaj racio, povas eliri sonĝbildoj, kies kaŭzoj havas klare rekoneblan vivsperton: la nekontrolitaj angoroj, la neagnoskita kulpo, la nesuperregitaj travivaĵoj (ekz.: impresajoj el milito, ekzamentimoj, geedzecaj krizoj). Al tiu ĉi grupo apartenas la sonĝoj de la persono, kiu starigis tiun ĉi demandon. Per animprizorgado oni povas foje la personon liberigi de tiaj koŝmaroj. Ĉar en plej multaj kazoj temas pri kulpoproblemoj, estas la spertita pardono la plej adekvata solvovojo.

DF5: *Kio estas la peko?*

RF5: Antaŭ ol la Biblio mencias la vorton „peko“, ĝi montras al ni ties naturhistorion plastike antaŭ niajn okulojn (1 Mos 3,1-13). Ĝi ne proponas unue teorion kaj poste praktikon, sed inverse unue la praktikon kaj poste el ĝi derivas principojn. La peko venis en nian mondon per la tenta demando: „*Ĉu Dio diris, ke vi ne manĝu de ĉiuj arboj de la ĝardeno?*“ (1 Mos 3,1). La peko do estas ago, kiu estas orientita kontraŭ la volo de Dio. La preciza spegulo por ekkoni

la propran pekemon estas la Dek ordonoj (2 Mos 20,1-17) kaj la Prediko sur la monto de Jesuo (Mat 5-7). Se iu vivas sen la vorto de Dio, tiel li ne konas Lian volon kaj tiamaniere li aŭtomate kaj permanente vivas en la peko. La unue en la Biblio aperinta vorto por la peko (heb.: *chattath*) en 1 Mos 4,7 signifas: *celmaltrafo*; samtiel oni tradukas la grekan vorton *hamartia*. Aldonaj signifoj de la vorto „peko“ estas: devojigo, perversigo (heb.: *awon*), malico, korupto (hebr.: *raa*), perforto (heb.: *chamas*), malbona pensmaniero (heb.: *reša*). Jam la nura malĉeesto de justeco estas peko: „*Ve al tiu, kiu konstruas sian domon per malbonagoj kaj siajn ĉambrojn en maljusteco*“ (Jer 22,13). En la Nova testamento tekstas la koresponda difino de la peko: „*Kio ne estas el fido, estas peko*“ (Rom 14,23). Hermann Bezzel nomis la reduktiĝon de la homo al si mem peko. En Johano 16,9 Jesuo identigas la ĝeneralan pekon de la homoj per manko de rilatoj al li: „*ke ili ne kredas en min*“. La peko estas forta malhelpo en rilato inter Dio kaj homo. Tiu, kiu ne atingas ŝanĝon de direkto per konvertiĝo kaj pekpardono (1 Joh 1,9), tiu ĝisvivis la konsekvencon de la celmaltrafo kiel neŝanĝeblan leĝon: „*Ĉar la salajro de peko estas [la poreterna] morto*“ (Rom 6,23). Ĉe multaj homoj ilia sano okupas la unuan ranglokon, sed ili ignoras la plej fatalan malsanon: la pekon – la malsanon por la morto.

DF6: *Ĉu la needziniĝintaj paroj laŭ la Biblia instruo rajtas vivi kune? Ek de kiam iu paro validas esti geedza: ĉu post la decido de la paro, ke ili volas vivi kune? Ĉu post ilia unua sekskuniĝo? Ĉu post la municipofica aŭ eklezia nupto?*

RF6: Por klarigi tiun ĉi en nia tempo pli kaj pli tiklan demandon la kvin punktoj el la biblia orientigo estu prezentitaj. Ni uzos ĉi tie la biblian bazan tekston, kie la problemsolvo ne estas fiksita je unu nura versiklo, sed montras sin erst en la konteksto de pluraj bazaj eldiroj (vidu la principojn de eksplikado A5 kaj A6 en Aldono, parto II):

1. La geedzeco kaj la seksa vivo: Dio en sia krea ordo starigis la geedzecon. Tio estas Lia volo kaj lia bona ideo: „*Ne estas bone, ke la homo estu sola; Mi kreos al li helpanton similan al li*“ (1 Mos 2,18). Tio estas difinita kiel la tutviva komuneco (Mat 19,6), kiu laŭ la nupta formulo validas tiel longe „ĝis la morto vin disigos“. Okaze de la starigo de tiu ĉi de Dio fondita komuneco de viro kaj virino la Kreinto diris: „*Tial viro forlasos sian patron kaj sian patrino, kaj aliĝos al sia edzino, kaj ili estos unu karno*“ (1 Mos 2,24). Esti „unu karno“ rilatas unuarange la korpan, seksan komunecan. Tiu ĉi mallonga formulo supozas tamen la tutan homon kaj tiel ankaŭ la animon kaj la spiriton. Du homoj kun ĝis tiam diversaj vivovojoj trovas al la plej intima komuneco, kiu tute povas ekzisti. Ili fariĝas unu en ilia sento kaj penso tiel en la spirita kiel ankaŭ en la korpa rilato. La sekso estas la donaco de Dio kaj la geedzeca seksrilato servas laŭ la biblia vidpunkto ne nur al la akuŝado de infanoj:

„Ne senigu unu la alian, krom eble kun konsento por kelka tempo, por ke vi dediĉu vin al preĝado, kaj kuniĝu denove, por ke Satano vin ne tentu pro manko de sinregado“ (1 Kor 7,5)

„Via fonto estu benata; kaj havu ĝojon de la edzino de via juneco. Ŝi estas ĉarma kiel cervino, kaj aminda kiel ibeksino; ŝiaj karesoj ĝuigu vin en ĉiu tempo, ŝia amo ĉiam donu al vi plezuron“ (Sen 5,18-19).

„Ĝuu la vivon kun la edzino, kiun vi amas en la tempo de via tuta vanta vivo, kaj kiun Dio donis al vi por ĉiuj viaj vantaj tagoj; ĉar ĉi tio estas via apartenaĵo en via vivo, kaj en viaj laboroj, kiujn vi laboris sub la suno“ (Koh 9,9).

La Biblio montras al ni la ĝustan uzon de la seksa vivo. Ĝi faras distanclinion tiel rilate bigotecon (Hoh 4) kiel ankaŭ diboĉon (Jer 5,8); la amo kaj la respekto estas la decidaj kadrolinioj (Kol 3,19; 1 Pet 3,7).

2. La geedzeco kaj la komunumo kiel la institucio de Dio: En tiu ĉi mondo troviĝas tiom multaj formoj de la homa komuneco, sed inter ili tiuj de la geedzeco kaj familio, eklezia komunumo kaj la ŝtato (Rom 14,1-7) estas starigitaj laŭ la volo de Dio. La komunumo de Jesuo Kristo kaj la geedzeco tamen estas du tute apartaj Diaj institucioj kaj tiel kontraŭ la ĝenerala opinio neniel homa invento. Pro tio ambaŭ komunecoj estas en la sendia mondo atakitaj (1 Tim 4,3; Apo 2,9). Ek de la kreo de la mondo ne troviĝas homa kulturo sen la geedzeco. Ĝi neniam fariĝis superflua kaj travivos ĉiujn tempojn spite al tempaj fluoj, malamikaj al la geedzeco kaj spite al homaj perversaĵoj, ĉar Dio mem ilin fundamentis kaj por ili zorgas. Samtiel la eklezia komunumo laŭ la promeso de Jesuo mem eĉ de la infera pordo neniam estos supervenkita (Mat 16,18).

3. La geedzeco kiel parabolo: La Biblio priskribas ofte la kredon kaj la rilaton inter Dio kaj la homo per la plej intima fidrilato, kiu estas imagebla inter la homoj, per la geedzeco. „*Kiel junulo prenas por kunvivado junulinon, tiel kunvivos kun vi viaj filoj; kaj kiel fianĉo ĝojas pri la fianĉino, tiel ĝojos pri vi via Dio*“ (Jes 62,5). Pro tio ankaŭ la geedzeco estis elektita parabolo (gr.: *mystaerion* = mistero) por la rilato de Kristo al lia komunumo: „*Edzoj, amu viajn edzinojn, kiel Kristo amis la eklezion kaj pro ĝi sin donis, por ke li sanktigu ĝin per akvolavo, kun la vorto, por ke li starigu ĝin antaŭ si glora eklezio, ne havanta makulon, nek malglataĵon, nek ion tian, sed por ke ĝi estu sankta kaj sendifekta. Tiel same devas edzoj ami siajn edzinojn kiel siajn proprajn korpojn. Kiu amas sian edzinon, tiu amas sin mem; ĉar oni neniam malamas sian propran karnon, sed nutras kaj prizorgas ĝin, kiel ankaŭ la Sinjoro la eklezion; ĉar ni estas membroj de lia korpo*“ (Efe 5,25-30). Analogie diras al ni la vorto de Dio: „*Ĉi tiu mistero estas granda, sed mi parolas pri Kristo kaj la eklezio*“ (Efe 5,32). Jam el la parabola karaktero de la geedzeco por difini la eternan komunecon kun Kristo oni povas dedukti, ke la geedzeco estas komuneco por la tuta vivodaŭro. Ĉiu divorcita geedzeco produktas difektitan bildon pri la Diaj imagoj kaj detruas la sencon de la parabolo. Tiel oni povas ankaŭ bone kompreni la starpunkton de Jesuo rilate divorcon (Mat 19,6-9).

4. Prostituado kiel metaforo: Se geedzeco, vivata en amo kaj fidelo, estas bildo por la rilato de Dio al Lia popolo, tiel la Biblio en konsekvenco la defalon de Dio kaj adoradon de fremdaj diaĵoj kaj idoloj nomas adulto aŭ prostituado:

„*La Eternulo diris al mi en la tempo de la reĝo Joŝija: Ĉu vi vidis, kion faris la defalinta Izrael? Ŝi iris sur ĉiun altan monton kaj sub ĉiun verdan arbon kaj tie malĉastis. Kaj post kiam ŝi faris ĉion ĉi tion, Mi diris: Revenu al Mi; sed ŝi ne revenis. Kaj tion vidis ŝia perfidema fratino Judujo. Mi vidis ĉiujn adultaĵojn de la defalinta Izrael, kaj Mi forpelis ŝin kaj donis al ŝi eksedzigan leteron; tamen ne ektimis ŝia perfidema fratino Judujo, sed ŝi iris kaj ankaŭ malĉastis. Kaj de la bruo de ŝia malĉastado malpuriĝis la lando, kaj ŝi adultis kun ŝtono kaj kun ligno*“ (Jer 3,6-9). „*Via adulto, via voluptegeco, viaj malĉastaj pensoj. Sur la montetoj de la kampo Mi vidis viajn abomenindaĵojn. Ve al vi, ho Jerusalemo! ĉu vi ne puriĝos? Kiam do fine?*“ (Jer 13,27).

5. Kio estas la prostituado? Por diversaj vortoj en Esperanto, kiel malĉastado, adulto, prostituado, en la Nova testamento troviĝas unu nura vorto greka: *porneia*, kiun ni konas en la internacia vorto „pornografio“. La vorto „adultulo“ (greke: *pornos*) estas en NT uzita unuflanke por malĉastuloj kaj samseksemuloj (ekz. 1 Kor 6,9), sed aliflanke ankaŭ kiel ĉefnocio por *ĉiu-ajn* kontentigo de la seksa instinkto ekster la de Dio starigita geedzeca komuneco (ekz.: 1 Kor 6,18; 1 Tes 4,3). Al tio apartenas:

- la antaŭgeedzeca seksuala komuneco (5 Mos 22,28)
- la intima komuneco kun iu alia virino krom la edzino (3 Mos 18,20; Jer 5,8-9; Mat 5,32)
- la samseksualeco (1 Mos 19,5; Rom 1,26-27; 1 Tim 1,10)
- la incesto, sangadulto (1 Kor 5,1)
- la kuplado kun besto (3 Mos 18,23)

Tiuj, kiuj praktikas la volupton, prostituadon, troviĝas sub peza verdikto de Dio:

„Aŭ ĉu vi ne scias, ke la maljustuloj ne heredos la regnon de Dio? Ne trompiĝu: nek malĉastuloj, nek idolanoj, nek adultuloj, nek molmoruloj, nek viruzaĉantoj, nek ŝtelistoj, nek aviduloj, nek drinkuloj, nek insultantoj, nek rabemuloj, heredos la regnon de Dio“ (1 Kor 6,9-19).

„Estu honorata la edzeco ĉe ĉiuj, kaj la lito estu senmakula; ĉar malĉastulojn kaj adultulojn Dio juĝos“ (Heb 13,4).

„Ekstere estas la hundoj kaj la sorĉistoj kaj la malĉastuloj kaj la mortigistoj kaj la idolanoj, kaj ĉiu, kiu amas kaj faras mensogon“ (Apo 22,15).

Konsekvencoj: Laŭ tiuj ĉi bibliaj bazoj la serĉataj respondoj troviĝas sur la manplato. La kuna vivo de la negeedziĝintaj paroj estas same kiel la antaŭgeedzeca aŭ ekstergeedzeca seksuala kontakto laŭ la Biblio difinenda kiel adulto, prostituado kaj ekskludas la homon el la regno de Dio, krom se la koncernaj personoj sin deturnas de tia peka vivo kaj konvertiĝas (komp. en Aldono parto I., punkto 10).

Sed de kiu momento iu paro estas geedziĝinta? Per la kreskanta malproksimiĝo de niaj popoloj de la ordonoj de Dio oni povas observi pli kaj pli, ke la negeedziĝintaj paroj ekloĝas kune kaj vivas vivon similan al la geedzeca, tamen ne geedzeca kaj senliga. Tiuj paroj ankaŭ ne estas geedziĝintaj, eĉ se kelkaj el ili ne vidas diferencon inter ilia vivkomuneco kaj geedzeco. Kiamaniere Dio prijuĝas tiajn situaciojn, ni sub la punkto 5 jam montris. El la atestado de la Biblio ni resumas, ke vera geedzeco ne komencas validi:

- *se iu paro intencas eniri komunan vivovojon:* Jakobo volis ricevi Rahelaon por edzino. Kiam pasis la interkonsentitaj sep jaroj, diris Jakobo al sia bopatro Labano: „*Donu mian edzinon, ĉar finiĝis mia tempo, kaj mi envenos al ŝi*“ (1 Mos 29,21). Tiel estis preparolita la seksuala komuneco. Du aferoj eliras el la kunteksto: Antaŭ la nupto Jakobo ne tuŝis Rahelaon sekse, kaj la geedzeco validis ekde la publika nupta festo.
- *se iu paro jam havis intiman kontakton:* Se en Izraelo viro ekkonis knabinon, li devis ŝin ankaŭ preni por edzino kaj – kiel tiam uzo – pagi la fianĉinan prezon (5 Mos 22,28-29). Intimaj rilatoj estis antaŭ la oficiale starigitaj geedzeco malpermesitaj.

La difino pri la vera komenco de la geedzeco: Geedzeco havas validon nur tiam – ankaŭ antaŭ Dio – kiam la viro kaj la virino per la loke kutima oficiala ceremonio alprenas la nuptan akton.

Tiu ĉi difino estas eltirebla el ĉiuj bibliaj ekzemploj de la nupto. Ĉi tie oni trovas la sekvan biblian eksplikprincipon: El la amaso da unuopaj okazintaĵoj estas la al ĉiuj komuna maniero eltirita kiel la biblia vero. Tiu ĉi sama difino estas samtiel aplikebla ĉe eĉ tiel provincfora tribo kun sia propra, en la konkreta tribo rekonita rito, kiel ankaŭ enkadre de nia kulturcirklo kun la kutima magistrato. Grave estas en ĉiuj okazoj, ke la homoj en la ĉirkaŭo per klara kaj oficiala maniero estas sciigitaj, ke ĉi tie du homoj apartenas lige al sia geedzeco. Tiamaniere ili ne plu troviĝas je dispono kiel eventualaj partneroj por la homoj ekster la geedzeca cirklo. Se iu viro alrigardas edziniĝintan virinon (aŭ la edziĝinta viro alian virinon kaj inverse) kun deziro, tiel li aŭ ŝi laŭ la Prediko sur la monto de Jesuo fariĝis adoltulo (Mat 5,28). Al la virino ĉe la puto de Jakobo diris Jesuo, ke la viro, kiun ŝi havis, ne estas ŝia edzo (Joh 4,18). Se ŝi estus per publika akto kun li geedziĝinta, Jesuo ne estus parolinta kun ŝi tiamaniere. La Biblio nenie difinas la eksteran formon de la nupto, sed tamen troviĝas difinita nuptotago, ek de kiu la viro kaj la virino oficiale apartenas unu al la alia. En la tempo de Abrahamo tio okazis alimaniere (1 Mos 24,67) ol ĉe Simsono (septaga festado: Juĝ 14,10-30) aŭ en la tempo de Jesuo (nupto en Kanao de Galileo: Joh 2,1-11). En la plimulto de modernaj (almenaŭ eŭropaj) ŝtatoj la jure rekonita formo de la nupto estas sub la biblie eltirita difino antaŭ Dio valida kiel geedzeco.

DF7: Fidi tamen ne signifas „scii“; kiel vi do povas paroli pri la fido kiel pri io certa?

RF7: Multaj pensuloj okupiĝis pri la demando de la fido. Oni trovas ĉe ili tre diversajn starpunktojn, kiuj tamen ne estas rezultoj de neŭtrala pensado, sed ili liveras nin per sia persona starpunkto.

Kritikaj starpunktoj: La ateisto *Theo Löbsack* reprezentas la percepton: „La fido defendas la anticipojn faritajn konvinkojn kaj refutas rekonojn de la scienco, kiam tiuj kontraŭdiras la konvinkojn de la fidantoj. Tiel la fido finfine estas ankaŭ la mortmalamiko de la scienco.“ Simile kritike sin esprimis Kanto (*Immanuel Kant*): „Mi devis forlasi la scion por ricevi lokon por kredi.“ Per tiu ĉi kontraŭbiblia rigardo li fariĝis la voĵpreparanto de diversaj filozofiaj skoloj, kiuj troviĝis diametrale en kontraŭo al la fido. La slogano sur iu vando en la instituto „Neue Oberschule in Norf bei Neuß“ „Fidu al neniu, kiu sian dion havas en ĉielo!“ estas la lasta konsekvenco de la kritika racio.

Pozitivaj starpunktoj: De la certe plej granda fizikisto de ĉiuj tempoj, Izako Njutno (*Isaak Newton*) originas la eldiro: „Tiu, kiu la aferojn nur duone pripensas, tiu ne kredas en Dion; sed tiu, kiu vere pripensas la aferojn, tiu devas kredi en Dion.“ Per sama certeco atestas la fama matematikisto Blezio Paskalo (*Blaise Pascal*): „Kiel ĉiuj aferoj pri Dio parolas al tiuj, kiuj Lin konas kaj malkovras Lin al tiuj, kiuj Lin amas, tiel same ili prikaŝas Lin tamen ankaŭ al ĉiuj tiuj, kiuj Lin ne serĉas kaj ne konas.“

Ambaŭ konfronte troviĝantaj starpunktoj klare dokumentas, ke la fido neniel estas funkcio de nescio, sed ĝi dependas plene de la persona dispozicio. Tiu ĉi ne ŝanĝiĝas per filozofiaj refleksioj, sed ekskluzive per sinturno al Jesuo Kristo, kion la Biblio karakterizas konvertiĝo. Por la nekonvertiĝinta persono la demandoj pri la fido estas frenezo (1 Kor 1,18) kaj tiu ne povas ilin kompreni (1 Kor 2,14). Sed la de Kristo prenita homo tamen estos enkondukita en plenan veron (Joh 16,13), lia kredo havas firman fundamenton (1 Kor 3,11) kaj lia fido estas io ekstreme certeca:

„Kaj la fido estas realigo de esperataĵoj, provado de aferoj ne vidataj“ (Heb 11,1).

DF8: Ĉu por la novnaskiĝo oni bezonas ian eksteran signon?

RF8: La konvertiĝo kaj la novnaskiĝo estas vokabloj, priskribantaj la procedon de nia savo. La konvertiĝo estas tio, kion faras la homo, kaj la novnaskiĝo estas, kion faras Dio. La konvertiĝo tiel estas la homa, la novnaskiĝo la Dia flankoj de ununura proceso. Dum iu nokta interparolo diras Jesuo al Nikodemo: „*Se homo ne estas denove naskita, li ne povas vidi la regnon de Dio*“ (Joh 3,3). La novnaskiĝo sekve estas nepre por veni en la ĉielon. Esti novnaskita estas samtiel pasiva proceso kiel la natura naskiĝo. Okaze de la natura naskiĝo oni venas en tiun ĉi surteran vivon kaj fariĝas civitano de la mondo. Samtiel ni ricevas civitanecan en la ĉielo nur pere de la novnaskiĝo. Sed ĉar ni ĉiuj jam estas unufoje naskitaj, karakterizas la Biblio tiun duan naskiĝon per rajto je la ĉiela (eterna) vivo per la nocio *novnaskiĝo*.

Per la pentoakto ni deturnas nin de la malnova pekohava vivo, kaj per la konvertiĝo ni turnas nin al Kristo. Tiu, kiu per sia plena esto realigas tiun ĉi sinturnon al Dio, tiu fariĝas hejmravenanto en la ĉielon. Dio respondas, donante al ni novan, eternan vivon; kaj tio estas nia novnaskiĝo. Per ia ekstera signo tiu ĉi evento ne estas markita, tamen la nova vivoiro baldaŭ manifestiĝos per videbla frukto de la Spirito: amo, paco, pacienco, amikeco, boneco, fidelo, mildeco, ĉasteco (Gal 5,22-23).

DF9: Vi parolas, kvazaŭ Dio mem vin sendus ĉi tien. Kiel vi pri tio pensas?
(Okaze de iu prelego.)

RF9: Mi ĝojas, ke vi tiel defie formulis vian demandon, ja estas bone, se ni ankaŭ ĉikaze faras klaran kalkulon. Dum via tuta vivo vi vane atendas, se vi volas aŭdi evangelian mesaĝon fare de anĝelo, venanta el la ĉielo. La savon efektivigis Dio mem per Jesuo Kristo; sed la anoncadon Li fidis al la homo. Estas la volo de Dio, ke la disĉiploj de Jesuo transprenu la taskon ankaŭ aliajn homojn fari disĉiploj de Jesuo kaj ilin enkondukas en la biblian instruon (Mat 28,19-29). Tiel ni rajtas en la nomo de la Sinjoro, kiu kreis la ĉielon kaj la teron, elpaŝi, ja „*ni estas kunlaborantoj kun Dio*“ (1 Kor 3,9). Al tiu kunlaboro estas vokitaj ĉiuj kredantoj en Jesuon, kaj ni estos en certa tago juĝitaj laŭ tio, kion ni efektivigis per la al ni fidita evangelio (Luk 19,11-27). La plej alta en eksterlando akreditita reprezentanto de iu registaro estas la ambasadoro. Li estas komisiita, konfirmita kaj sendita, elpaŝi plene en la nomo de sia registaro. Ne malpli ol en la tiom altan pozicion de la ambasadoro starigis nin la Filo de Dio por anonci la evangelion, ĉar en la Nova testamento tekstas vortfidele: „*Ni do estas ambasadoroj pro Kristo, kvazaŭ Dio per ni petadus; ni vin petegas pro Kristo, repaciĝu al Dio*“ (2 Kor 5,20). Jesuo diras en Luko 10,16: „*Kiu vin aŭskultas, tiu min aŭskultas*“. Nia legitimito do ne estas memproklama, sed aŭtorizita de Dio.

DF10: Kion vi opinias pri la genteknologio?

RF10: La metodoj de la genteknologio permesas kombini genojn laŭplaĉe. Tiel malfermiĝas multaj eblecoj, la heredmaterialon de vivestaĵoj alcele kaj rapide ŝanĝi kaj ĝin submeti al difinitaj celoj. En la centro de la modernaj genkirurgiaj klopodoj troviĝas la konstruado de bakteriaj ĉeloj, kiuj per imputado de iu fremda geno (ekz. de iu suĉbesto aŭ homo) povas esti uzata por produkti medicino aŭ teknike interesaj produktoj (ekz. hormonoj, vakcinoj ktp.). La unua genteknike produktita medikamento estis la hormono *insulino*, kiu estas nepre bezonata

por trakti la malsanulojn je diabeto. Tio estas farata tiel, ke oni en la koli-bakterion imputas la konvenan genon de la homa organismo, kiu ĉe la sana homo responsas pri produktado de sufiĉa insulinkvanto. Tiel akirita insulino estas tiel identa kun la normale en la homa korpo producita insulino. Aliaj celoj estas plibonigi la nutran valoron ĉe kelkaj kulturplantoj, fari ilin rezistopovaj kontraŭ infektoj kaj kemiaĵoj, por elsarki kreskaĉaĵojn aŭ kuraci hereditan malsanon per imputo de aldona intakta geno en la kromosoman ĉenon de la homo. La utilo de tiu nova teknologio estas evidenta. Tamen oni ankaŭ ĉikaze devas pripensi la fakton, ke ĉiu tekniko estas ambivalenta: per martelo oni povas puŝi najlon en la vandon, sed ankaŭ rompi la kranion de la homo. Ankaŭ ĉe la bone intencita teknika uzo oni ne povas ĉiam bone konsideri kaj prijuĝi la longtempajn postsekvojn. Ĉio-ĉi validas eĉ speciale por la gentekniko.

Per la konstruo de la babela turo estis – kiel ĝenerale konate – ligita la puno de la lingva konfuzo. Malpli bone oni scias, ke Dio disponigis la homon ankaŭ al ties faroj: „*Ili ne estas malhelpataj en ĉio, kion ili decidis fari*“ (1 Mos 11,6). Dio do disponigas al la homoj fari aferojn, kiujn oni prefere ne estu farinta. Estus por la homo bone, se li ne estus kapabla konstrui gasĉelojn por tie amase mortigi aliajn homojn, konstrui atombombojn por detru tiutajn urbojn, aŭ evolui ideosistemojn, kiuj faras la homojn sklavojn. Tiel troviĝas en la kampo de la home fareblaj aferoj kiel flugi al la luno, transplanti korpajn organojn kaj manipuli la genojn.

La homo, ne plu ligita al Dio, prenas sin por aŭtonoma kaj konas neniujn limojn de siaj faroj. La homa farado fariĝas la puno por li mem. La en Dion kredanta homo serĉos laŭ la bibliaj mezuroj kaj ne faros ĉion, kio estas farebla. En la ordono: „*Fruktu kaj multiĝu*“ (1 Mos 1,28) inkluzivigas Dio nin homojn en kreaĵon. Per la seksa difiniteco de viro kaj virino Dio kreis ĉiujn antaŭkondiĉojn por tiu ĉi krea proceso, tamen Dio ankaŭ en tio restas la formdonanto: „*Mian embrion vidis Viaj okuloj, kaj en Via libro estis enskribitaj ĉiuj tagoj destinitaj, kiam ankoraŭ eĉ unu ne ekzistis*“ (Psa 139,16). Okaze de la genmanipulado ni povas ŝanĝe interveni en la de Dio koncipitan proceson: la en la koncipitan ĉelon enmetitaj genoj povas esti hereditaj de sekvaj generacioj. Tia interveno ne estas plu reprenebla kaj kaŝas en si neantaŭvideblajn danĝerojn. *Ch. Flämig* vidas en sia utopia vizio la fincelon de la genetiko en kreo de certa superhomo: „La plej bonaj spiritoj de la homaro evoluos ... genetikajn metodojn, kiuj ebligas novajn kvalitojn, organojn kaj eltrovos novajn biosistemojn, kiuj servos interesojn, feliĉon kaj eminenton de tiuj disimilaj estaĵoj, kies mizera antaŭbildo ni mizeraj kreaturoj de nia tempo estas“ (Die genetische Manipulation des Menschen – publikigita en *Aus Politik und Zeitgeschichte B3/1985*, p. 3-17). Ĉe tiaj celoj la homo fariĝos de Dio malrespektata Prometeo:

„Ĉi tie sur la tron’ mi homojn formas
tute laŭ la bild’ de mi,
specion kiel mi nur estas,
por suferi kaj por plori,
por ĝuegi kaj por gaji
kaj por vin jen malestimi
kiel mi!“

(*Johann Wolfgang v. Goethe*)

DF11: *Kion Jesuo faris kun kuloj kaj tabanoj? Ĉu li mortfrapis ilin?*

RF11: De *Albert Schweitzer* venas la konata vorto pri „respektigo antaŭ la vivo“, kiu – se oni ĝin konsekvenca apliku por la homa uzo – malebligas, ke en la tuta mondo ĉiujare troviĝas

ĉirkaŭ 80 milionoj da abortitaj beboj. *Schweitzer* streĉis sian arkon eĉ transe de tio kaj provis en la ĝangalo neniam surtreti eĉ insekton. En la hinduismo principe samtiel neniu besto rajtas esti mortigita, ja oni kredas tie, ke iu ajn homo povus post sia surtera homa vivo plu vivi en iu besto. La postsekvo de tiu ĉi kredo estas, ke en Hindio troviĝas okoble pli da ratoj ol da homoj. La nutrobezono de tiuj ĉi bestoj estas nesolvebla problemo; la tiel kaŭzita damaĝo estas nepriskribebla. La biblia ordono: *Ne mortigu!* (2 Mos 20,13) tamen rilatas ekskluzive la homon. Por la bestoj la ordono ne validas, ja ili estas klareprime permesitaj por la nutrado de la homoj (1 Mos 9,3). Ankaŭ la pliseverigo de la mortiga malpermeso per Jesuo en lia montoprediko (Mat 5,21-26) neniukaze etendiĝas sur la kampon de la bestoj.

La supre starigita demando puŝas Jesuon al ia hinduisma starpunkto aŭ al la kondukmodelo de *Albert Schweitzer* kaj *Francisko de Asiso*, kiu sin mem punis, se li surtretis insekton. La ĝustan rilaton al la bestoj montras Dio al ni en la Biblio. En la origina kreitaro ĉio estis metita sub la verdikton: „*Kaj Dio rigardis ĉion, kion Li kreis, kaj vidis, ke ĝi estas tre bona*“ (1 Mos 1,31). Tiel troviĝis nenia malsano, nenia morto, neniaj malutilaj insektoj kaj neniaj danĝeraj bestoj. Sed per la kazo de la peko okazis profunda splitiĝo ankaŭ en la regno de la bestoj, kiu estas ek de unu ĝis la alia specio diversgrade markita. Tiel troviĝis la kategorio de la puraj kaj de la malpuraj bestoj (1 Mos 7,2). Aldone oni povis distingi inter la danĝeraj kaj utilaj bestoj (3 Mos 26,6), kie tamen la protekto de la lastaj eĉ estas ankrita en dek Ordonoj (2 Mos 20,10+17). En 5 Mos 25,4 estas por la bovo, uzita por draŝi de Dio garantiita manĝporcio de la grenoj. Aliaj bestoj perdis per la peka kazo siajn origine pozitivajn trajtojn koncerne la homon kaj fariĝis malutilaj bestoj. Tiel la Biblio nomas lakustojn, skarabojn, larvojn, ranojn kaj insektojn, kiuj en sia amasa apero fariĝas la juĝpuno de Dio (2 Mos 10,12; Psa 78,45-46; Psa 105,30-34; Joe 2,25; Amo 4,9). Samtiel enkorpiĝas la serpentoj kaj la skorpionoj la malamikajn fortojn, antaŭ kiuj Dio povas gardi (4 Mos 21,8-9; Luk 10,19) aŭ ili ricevos dum la juĝsituaĵoj la regpovon super homoj (4 Mos 21,6; 1 Reĝ 12,11).

La plej multaj malsanoj estas kaŭzitaj fare de la mikroorganismoj (virusoj, bakterioj, parazitoj). Se Jesuo kuracis *ĉiujn* malsanojn (Mat 4,23), tiam li tiamaniere mortigis ankaŭ vivestaĵojn, kiuj danĝerigas kaj malutilas al la homoj. Oni desegnas falsan bildon pri Jesuo Kristo, se oni atribuas al li nerealisman prijuĝon de la falintaj kreitaĵoj. En sia plenpovo li ordonas al detruaj fortoj kiel ventego kaj ondegoj (Mat 8,27), malsano kaj morto (Mat 8,3; Joh 11,43-44), demonoj kaj malbonaj spiritoj (Luk 11,14). Jesuo venis al ni kiel la Filo de Dio kaj samtempe kiel la homo. Li „*sin malplenigis, alprenante la formon de sklavo, fariĝante laŭ la bildo de homoj*“ (Flp 2,7), te. li estis ekspoziciita al ĉiaj situaĵoj kiel ĉiu alia homo kaj tiel ankaŭ al plagoj pro moskitoj, kuloj, muŝoj kaj tabanoj. La Biblio nenie eksplicite raportas, kiamaniere li ĉion-ĉi traktis. Sed laŭ la supre dirita ni povas konkludi, ke li ilin kaj forpulis kaj mortigis.

7. Demandoj pri la morto kaj pri la eterno (DM)

DM1: Ĉu troviĝas la vivo post la morto?

RM1: La gigantaj piramidoj de egiptanoj pravas la tiaman konon de la konstrutekniko kaj arkitektura arto, sed eĉ multe pli ili estas gigantaj atestaĵoj de iu homarparto, kiu kredis en pluan vivon post la surtera morto. Troviĝas en la mondo neniu kulturo kaj neniu gento kaj klano sen tiu sama kredo. De tiu fakto eĉ la ateistoj ne estas ekskluzivitaj. Kiam post la morto de la nordvietnama revoluciulo *Ho Chi Minh* (1890-1969) lia testamento estis legita antaŭ la komunisma eminentularo, ili aŭdis la tekston: „Mi iras tien por renkonti la kamaradojn

Markso, Lenino kaj Engelso. “Kie estas la kialo? Nun, Dio al ĉiu homo „*scion pri la eterno² enmetis en ilian koron*“ (Koh 3,11). La morto estas por ni muro, trans kiun ni ne povas rigardi; tamen unu trafosis ĝin. Li troviĝis tie transe kaj revenis de la transcenda mondo en nian mondon: la Sinjoro Jesuo Kristo! Li mortis sur la kruco kaj en la tria tago li releviĝis el la mortintoj. De tiu ĉi venkinto super la morto ni havas nian certecon, ke nia ekzisto per la morto ne ĉesas. Li atestis al ni pri la realoj de la ĉielo kaj de la infero. Ni estas estaĵoj de la eterno kaj per la fido en lin vokitaj al la eterna vivo: „*Mi estas la releviĝo kaj la vivo; kiu kredas al mi, eĉ se li estos mortinta, tiu vivos*“ (Joh 11,25).

DM2: Kio estas la eterna vivo? Kiel oni ĝin imagu?

RM2: En la lingvo de la Nova Testamento troviĝas du tute diversaj grekaj vortoj por la esperanta vorto „vivo“: *bios* kaj *zoé*. *Bios* signifas la biologian homan vivon kaj ankaŭ la vivon de aliaj estaĵoj. Tiu ĉi vivo rapide pasas kiel fluo, kiel dormo, kiel baldaŭ velkanta floro (Psa 90,5; 103,15). Ĉe Ijobo 14,1-2 ni povas legi: „*Homo, naskita de virino, havas mallongan vivon kaj abundon da afliktoj. Kiel floro li elkreskas kaj velkas; li forkuras kiel ombro kaj ne restas.*“ Aliloke tiu ĉi rapide pasanta vivo estas komparata kun vaporhaladzoj: „*Kio estas via vivo? Vi ja estas vaporo, kiu mallongan tempon montriĝas kaj poste malaperas*“ (Jak 4,14).

De Otto v. Bismarck³ venas la eldiraĵo: „La vivo estas kiel lerta eltirado de dentoj. Oni ĉiam pensas, la vera doloro ankoraŭ devas veni, ĝis oni subite vidas, ke ĉio jam pasis.“ La poeto *Chr. F. Hebbel* opiniis: „La vivo estas en la sepobla orpapero envolvita amarmagdalo,“ kaj la eseisto *Adolf Reitz* difinis la vivon kiel „la amastombon de esperoj kaj disraviĝoj“. La Biblio donas al ni tamen komplete alian perspektivon: Tie, kie la homoj ilian vivon trovas kiel la bonan donacon de Dio kaj aranĝas ĝin en la postsekvo laŭ Jesuo, ĝi ricevas novan dimension, kiun priskribas la greka vorto *zoé*. Tiel *zoé* estas la vivo el Dio, tiu sencoplana, nedetrubla, eterna vivo. Jesuo Kristo venis en tiun ĉi mondon por alporti al ni la eternan vivon. Tiel ĝi ne estas ligita nur kun lia persono; en li konfrontas nin senpere la eterna vivo. Jesuo diras en Johano 14,6: „*Mi estas la vojo kaj la vero kaj la vivo.*“ Greke do: *zoé*. Tiun ĉi identon de Jesuo atestas ankaŭ la apostolo Johano: „*Kaj la vivo elmontriĝis, kaj ni vidis kaj atestas kaj anoncas al vi la vivon, la eternan vivon, kiu estis ĉe la Patro kaj montriĝis al ni*“ (1 Joh 1,2). Tiu, kiu kredas en Jesuon, kiu lin havas sia Sinjoro, tiu tiamaniere havas ankaŭ la eternan vivon (1 Joh 5,12). Per la promeso de la eterna vivo (1 Joh 2,25) nia portempa vivo staras sur la eterna bazo. Nur de tiu ĉi perspektivo estas komprenebla, ke la disĉiploj de Jesuo pro la fido eltenis persekutadon, malliberejojn kaj turmentadon kaj eĉ iris en la morton, sed ne malagnoskis sian Sinjoron. La eterna vivo estos en sia plena amplekso registrebla erst post la releviĝo: „*Kaj multaj el tiuj, kiuj dormas en la tero, vekigos, unuj por vivo eterna, aliaj por eterna malhonoro kaj honto*“ (Dan 12,2). Kaj en tiu ĉi vivo ni ne havas nur la konfirmon pri la eterna vivo, sed jam nun ankaŭ la partoprenon en la vivpleno de Dio kaj Kristo, en iliaj ekzisto kaj gloro. Kiam la fido atingos la vidadon, ni rigardos la vizaĝon de Jesuo kaj lia Patro.

DM3: Kiam la eterna vivo komenciĝas?

RM3: Laŭ la biblia atesto troviĝas nur du specoj de la eterna ekzisto: la eterna vivo aŭ la eterna pereco. Tial laŭ la vortoj de *Heinrich Kemner* la plej granda perdnegoco estas, vivi sen

² Ĉe Z. „mondo“.

³ Unue prusuja, poste tutgermana kanceliero, kiu en la jaro 1871 unuigis ĉiujn germanajn landojn kaj tiel fontis la II-an germanan regnon.

Jesuo kaj poste morti. En Johano 3,15 estas emfazite: „*por ke ĉiu, fidanta al li, havu eternan vivon.*“ La atribuo de la eterna vivo tiel ne okazas erst post la morto, sed validas ek de la momento de la konvertiĝo: „*Kiu fidas al la Filo, tiu havas eternan vivon*“ (Joh 3,36). Tiu ĉi fido portas la sigelon de la releviĝo de Jesuo el la mortintoj kaj staras tiel sur la absoluta kaj neŝanĝebla bazo. Dio valorigas tion, ke en ni troviĝu firma certeco: „*Ĉi tion mi skribis al vi, por ke vi sciu, ke vi havas vivon eternan; al vi, kiuj kredas al la nomo de la Filo de Dio*“ (1 Joh 5,13).

DM4: Kiamaniere oni povas imagi la ĉielon?

RM3: La tuta homa imagopovo ne sufiĉas por vizii la gloron de la ĉielo. Paŭlo povis troviĝi dum momento ĝis la tria ĉielo (2 Kor 12,2). En alia kunteksto li skribas pri la kaŝita saĝo de Dio, kiun al ni jam la Spirito de Dio ĉi tie sur la tero peras, kaj li rimarkas apude: „*Tion, kion okulo ne vidis kaj orelo ne aŭdis, kaj kio en la koron de la homo ne eniris, Dio preparis por tiuj, kiuj Lin amas*“ (1 Kor 2,9). Kiom oble pli validas tiu ĉi priskribo por la por ni ankoraŭ nevidebla brilo de Dio kaj por la ĉielo! La Biblio peras al ni nenian kompletan bildon pri la ĉielo, tamen ĝi desegnas ĝin en multaj facetoj, pri kiuj ni ĉi tie volas kelkajn el ili observi. La fido rajtas en antaŭgustumo percepti, sed la rekta vidado estos nepriskribebla.

1. La ĉielo kiel la regno: Ĉiuj regnoj de tiu ĉi mondo iam ĉesas ekzisti, ilia surtera povo estas limigita. La germana regno el la jaro 1871 atingis eĉ ne 50 jarojn. La tria regno (de Hitlero – rim. de trad.) estis propagandita kiel la miljara regno, tamen ĝi finiĝis post 12 jaroj en ruinoj kaj cindro. Sed la regno de la ĉielo estas eterna regno (2 Pet 1,11), kiu neniam finiĝos. Estas „*regno neskeuebla*“ (Heb 12,28). Estas la aspirata ĉiela patrujo (Heb 11,16), en kiu la regopovo de Dio kun perfekta registaro senescepte estos rekonita. La al Kristo apartenantaj regos kun li de eterno al eterno (Apo 22,5; Luk 19,17+19).

2. La ĉielo kiel la Patra domo: Kontraŭe al ĉiuj surteraj domoj kaj loĝejoj la ĉielo estas la senfiniĝanta loko: „*Ĉar ĉi tie ni ne havas restantan urbon, sed estontan ni serĉas*“ (Heb 13,14). Tiun ĉi urbon preparis Dio mem (Heb 11,16b) kaj la Sinjoro Jesuo estas la aranĝinto de la eterna domicilio: „*Ĉe la domo de mia Patro estas multe da loĝejoj; se ne tiel estus, mi dirus al vi; mi iras, por pretigi por vi lokon*“ (Joh 14,2). Ĉiuj, apartenantaj al Kristo, havas tiesian civitanan rajton; ili estas la kunloĝantoj de Dio (Efe 2,19). En la preĝo Patronia tekstas: „*Patro nia en la ĉielo*“ (Mat 6,9) kaj laŭ la evangelio de Johano Jesuo preĝas: „*Patro, pri tiuj, kiujn Vi donis al mi, mi volas, ke ili ankaŭ estu kun mi tie, kie mi estas; por ke ili vidu mian gloron, kiun Vi donis al mi; ĉar Vi amis min antaŭ la fonda de la mondo*“ (Joh 17,24). La ĉielo estas nia loĝdomo, ĉar Dio tie loĝas (1 Mos 24,7; Psa 115,3; Mat 6,9). Ĝi estas samtempe la loĝloko de Jesuo. De tie li venis al ni en la mondon (Joh 3,13; Joh 6,38) kaj tien li estis denove akceptita post sia ĉieleniro (Luk 24,51; Ago 1,11). Okaze de sia dua alveno en povo kaj brilego li venos de tie kaj alprenos siajn tien.

3. La ĉielo, nia patrujo: Dum la dua mondmilito milionoj da orientprusoj, pomeranoj kaj ŝlezianoj perdis sian malnovan patrujon. De generacio al generacio loĝis tiuj homoj en tiuj provincoj ĝis la tago de la fuĝo resp. forpelo. La aŭtoro de tiu ĉi libro mem estis la atestanto de tiuj teruraj okazintaĵoj. Ni homoj estas ligitaj al la patrujo. *Nietzsche* plendis pro sia persona senhejmeco per la vortoj: „*Ve al tiu, kiu neniun patrujon havas!*“ En tiu ĉi mondo troviĝas nur unu patrujo por certa tempo, pro tio Paŭlo skribas al filipanoj (3,20): „*Ĉar nia burĝrajto estas en la ĉielo, de kie ankaŭ ni atendas Savonton, la Sinjoron Jesuo Kristo*“ (Flp 3,20).

4. *La ĉielo, la loko de la ĝojo*: Nupta festo estas ankaŭ laŭ la enmondaj mezuroj la sprono de aparta ĝojo. La ĉielo estas en la Biblio priskribita per la bildo de la nupta festo kiel la eterna festo de la ĝojo: „Ni ĝoju kaj triumfu, kaj donu al Li la gloron; ĉar venis la edziĝo de la Ŝafido, kaj lia edzino sin pretigis“ (Apo 19,7). Jesuo Kristo, la ŝafido de Dio, kiu pacience portis la pekon de la mondo kaj ĝin nuligis sur la kruco, nun estas la fianĉo, kaj lia komunumo estas la fianĉino. Tiun ĉi savitan gregon el ĉiuj nacioj, gentoj kaj etnoj priskribas Jesuo en la evangelio laŭ Luko: „Kaj oni venos el oriento kaj el okcidento, kaj el nordo kaj el sudo, kaj sidiĝos en la regno de Dio“ (Luk 13,29).

5. *La ĉielo, la loko sen la peko*: Nia mondo estas penetrita per la sekvoj de la peko: sufero, plago, doloro, kriado, malsano, milito kaj morto. En la ĉielo tamen „ne plu ekzistos malbeno“ (Apo 22,3). Dio estos ĉio en ĉio kaj li mem faros ĉion nova: „Li [Dio] forviŝos ĉiun larmon el iliaj okuloj; kaj la morto jam ne ekzistos; ne plu ekzistos funebro, nek plorado, nek doloro; la unuaj aferoj forpasis“ (Apo 21,4). Kaze de tia vido Paŭlo povas ankaŭ la portempan plagon elteni: „Ĉar mi kalkulas, ke la suferoj de la nuna tempo ne indas komparon kun la gloro, kiu estas malkaŝota al ni“ (Rom 8,18).

6. *La ĉielo, la orto de la kronumado*: Ĉio, kion ni dum tiu ĉi vivo faras en nome de nia Sinjoro Jesuo Kristo, havas poreternan dimension. Tio havas la karakteron de daŭreco. Tiel Paŭlo povas antaŭ la fino de sia surtera vojo diri: „Mi batalis la bonan batalon, mi finis la kuradon, mi gardis la fidon; de nun estas konservita por mi la krono de justeco, kiun la Sinjoro, la justa juĝisto, donos al mi en tiu tago; kaj ne nur al mi, sed ankaŭ al ĉiuj, kiuj amis lian aperon“ (2 Tim 4,7-8). Pri tiaspeca kronumado parolas ankaŭ la apoteozita Sinjoro en Apokalipso 2,10: „Ne timu tion, kion vi suferos; jen la diablo ĵetos iujn el vi en malliberejon, por ke vi estu elprovataj; kaj vi havos aflikton dek tagojn. Estu fidela ĝis morto, kaj mi donos al vi la kronon de vivo.“

7. *La ĉielo, nia celo*: La plej alta celo, starigita al ni homoj, estas: pere de la fido en Jesuon atingi la ĉielon. Apostolo Petro aludas al tiu celo: „Kiun [Jesuon], ne vidinte, vi amas; kiun kvankam nun vi ne vidas, tamen, al li kredante, vi ĝojegas per ĝojo nedirebla kaj gloroplena; ricevante la celon de via fido, savon de animoj“ (1 Pet 1,8-9).

ALDONO

Rimarkoj pri la Biblio

La sekvaj tekstopartoj pritraktas la plej gravajn bazajn principojn pri la manipulado per la Biblio. La detala dismembriĝo laŭ la temokampoj kaj la sinsekva numerado espereble plifaciligos la trovon de la serĉataj eksplikoj.

I. Bazaj principoj pri la Biblio

En la sciencteorio estas kutimo formuli la neprajn komencajn kondiĉojn por akiri scion de certa fako en la formo de firmaj bazaj principoj. Konstruante super tio tiel estiĝas la tuta scienca konstruaĵo. Se tiu metodo pro la diferenca karaktero de la Biblio ne estas plene aplikebla koncerne la parolon de Dio, ni tamen volas sub observado de tiu ĉi limiĝo kompili la esencajn bazajn principojn. Tiuj ĉi principoj estas la fundamento por la ĝusta manipulado per la Biblio kaj ili devus plifaciligi la enpaŝon en la „libron de la libroj“ aparte por tiuj, kiuj ne

havas sufiĉan antaŭscion. La sekvaj bazaj principoj konsistas precipe el mallonga aserto, kiu poste ricevas argumentadon kaj riĉan konfirmcitadon el la Biblio. Por la Biblio resp. ĝiaj partoj troviĝas tuta aro da sinonimaj nocioj, kiujn ni ankaŭ uzas en la tuta gamo: La parolo de Kristo (Rom 10,17), La parolo de la Sinjoro (1 Sam 15,23), La libro de la Sinjoro (Jes 34,16), La libro (Jer 30,2), La parolo de la Skribo (Luk 4,21), La Skribo (Mat 21,42), La Sankta Skribo (2 Tim 3,15), La Malnova Testamento kaj La Nova Testamento (2 Kor 3,14; Luk 22,20).

I.1. Pri la origino de la Biblio

B10: *La Biblio estas la unuela de Dio revelaciita kaj aŭtorizita skribinformo:* „Tiele diras la Eternulo, Dio de Izrael: Enskribu al vi en libron ĉiujn vortojn, kiujn Mi diris al vi“ (Jer 30,2). Kiel la apoteozita Sinjoro Jesuo ordonis: „Skribu, ĉar tiuj vortoj estas fidelaj kaj veraj“ (Apo 21,5). Al la parolo de la Biblio oni rajtas nek ion aldoni nek ion ellasi (Apo 22,18-19), tial ĉiuj aliaj por la revelacioj nomitaj libroj (ekz. Libro Mormono, Korano) estas homaj elpenaĵoj. En Galatoj 1,8 estas ekspoziciita la unikeco de la biblia revelacio kaj ankaŭ la konsekvenco de ĉia ŝanĝo de la mesaĝo fare de la homoj: „Tamen se eĉ ni, aŭ anĝelo el la ĉielo, al vi instruus ian evangelion krom tiu, kiun ni jam al vi instruis, tiu estu anatemita“ (Gal 1,8).

B11: *La origino de la Biblio home ne estas komprenebla*, eĉ se foje tio tiel sonas (Luk 1,1-4). Ĝi restas por ni neesplorebla mistero, kiamaniere la informtransporto de Dio al la skribistoj de la Biblio okazis. La esprimmanieroj „Mi“ (= Dio) *enmetis Miajn vortojn en vian buŝon*“ (Jer 1,9); „*Kaj aperis al mi vorto de la Eternulo*“ (Jeh 7,1) aŭ: „*Ĉar mi ne ricevis ĝin de homo, kaj ĝi ne estas instruita al mi krom per malkaŝo de Jesuo Kristo*“ (Gal 1,12) – ĉio-ĉi peras al ni certan impreson, ke ni trovas en la Bibliion la fonton de Dio; sed kiamaniere la skribistoj la enhavon de la mesaĝo ricevis, restas nerisponde.

B12: *La Dia aspekto de la Biblio:* La vera aŭtorrajto de la Biblio estas ĉe Dio. Laŭ 2 Tim 3,16 la tuta Skribo estas donita de Dio (greke: *theopneustos* = die spiritumita), de Dio-Patro kaj la Sankta Spirito donita, de Dio inspirita. La informfonto estas Dio Patro, Filo de Dio kaj la Sankta Spirito:

a) Dio Patro: „*Dio, kiu multfoje kaj multmaniere parolis en la tempo antikva al niaj patroj en la profetoj, en tiuj lastaj tagoj parolis al ni en Filo*“ (Heb 1,1-2).

b) Jesuo Kristo: „*Gardu vin, ke vi ne forrifuzu la parolanton [Jesuon]. Ĉar se ne forsaviĝis tiuj, kiuj forrifuzis la admonanton sur la tero, des malpli ni, deturnante nin de la parolanto [Jesuo] el la ĉielo*“ (Heb 12,25).

c) La Sankta Spirito: „*Ĉar neniam profetaĵo estas alportita per homa volo; sed homoj, movataj de la Sankta Spirito, parolis laŭ Dio*“ (2 Pet 1,21).

B13: *La homa aspekto de la Biblio:* La parolo de Dio troviĝas por ni en „argilaj ujoj“. Tio signifas, ke la pensoj de Dio pri la neebleco esplori la vojojn de Dio, percepti Lian amon kaj mizerikordon, ĉio-ĉi estas donita en la limigita esprimkapablo de la homa lingvo; tamen tiuj ĉi vortoj estas plenigitaj de „spirito kaj vivo“ (Joh 6,63).

I.2. Pri la vereco de la Biblio

B20: *La vorto de la Biblio estas la nereduktebla vero.* Rigardu: „*Via vorto estas vero*“ (Joh 17,17). Ankaŭ la Malnova testamento konfirmas ties esencan karakteron: „*Dio ne estas homo, ke Li mensogus, kaj ne homido, ke Li pentus. Ĉu Li diras kaj ne farus, parolus kaj ne plenumus?*“ (4 Mos 23,19). En Johano 14,6 Jesuo ne atestas nur ke li diras la veron, sed ke li estas la Vero en persono. La verkisto Manfred Hausmann rimarkis pri la esenco de la vero: „*La vero estas senfine pli granda kaj profunda ol la praveco.*“

B21: *Inter Jesuo kaj la parolo de Dio troviĝas unueco:* Jesuo Kristo kaj la parolo de Dio konsistigas la nedivideblan unuon (Joh 1,1-4; Apo 19,13). Dum sia surtera tempo Jesuo estis la vera homo kaj la vera Dio samtempe. Li estis la Filo de Dio kaj samtiel la Filo de la homo. „*Li sin malplenigis, alprenante la formon de sklavo, fariĝante laŭ la bildo de homoj; kaj troviĝinte laŭfigure kiel homo*“ (Flp 2,7). **Sed** tute alie ol aliaj homoj li estis senpeka. La samo validas por la parolo de Dio: ĝi estas deekstere egala al aliaj libroj kun multaj literaturaj stiloj kaj specoj, **sed** alie ol ĉiuj aliaj libroj la parolo de Dio estas senerara, absolute vera (Psa 119,160) kaj plene senmakula (Sen 30,5). B21 kunigas la frazojn en B12 kaj B13.

B22: *Ne troviĝas diversnivela kvalito en la eldiro de la vero rilate la bibliajn librojn aŭ la skribistoj, prenita en la servon.* Tiel oni ne povas kontraŭludi la Malnovan testamenton kontraŭ la Nova (aŭ inverse); la evangeliojn ne kontraŭ la epistoloj de Paŭlo, ja ĉiuj skriboj situas en la revelacio (Gal 1,11). Tamen la signifprofundo de la eldiraĵoj ne estas ĉie egala. Tiel ekzemple la savhistoria pensprofundo en Johano 3,16 nekomparebla kun la vojaĝdetalo en la Agoj 27,13, kaj la kreoraporto laŭ 1 Mos 1 havas alian valorskalan punkton ol la katalogo de la revenintaj judoj laŭ Ezrao (komp. B50).

I.3. Pri la enketado de la biblia vero

B30: *La vereco de la Biblio estas ekzamenebla.* Dio atendas de ni nenian blindan kredon, sed Li regalas nin per konvinkopovaj kriterioj, kiuj helpas nin veni al la vero:

1. La ekzameno per la vivo: Jesuo instruas la ekzameneblon de la parolo de Dio tiel, ke ni apliku ĝin en nia vivo: „*Mia instruado estas ne mia, sed Ties, kiu min sendis. Se iu volas plenumi Lian volon, tiu scios pri la instruado, ĉu ĝi estas de Dio, aŭ ĉu mi parolas nur el mi mem*“ (Joh 7,16-17).

2. La ekzameno per propra libero: Jesuo instruas, ke apliko de erara sistemo sklavigas (ideologioj kaj sektaj grupoj sklavigas homojn), sed kontraŭe, la apliko de liaj pensoj liberigas: „*Se vi restos en mia vorto, vi estas vere miaj disĉiploj; kaj vi scios la veron, kaj la vero vin liberigos*“ (Joh 8,31-32).

3. La ekzameno per alpreno: Kiel la aromo de oranĝo fariĝas konata nur per alpreno, tiel ankaŭ la vero de la Biblio revelaciĝas per legado kaj alpreno. Diskutoj kaj disputadoj la intenzivan biblian studon ne povas anstataŭigi. La bereanoj procedis modele: „*Kaj ĉi tiuj estis pli noblaj ol la Tesalonikanoj, ĉar ili akceptis la vorton kun plena fervoro, kaj ĉiutage esploris la Skribojn, por konstati, ĉu tiuj aferoj estas veraj*“ (Ago 17,11).

4. Ekzameno per rezulto: Tiu, kiu konstante orientiĝas laŭ la parolo de Dio kaj la instrukciojn obeas, ties vivo klare distinge sukcesos (vidu demandon FB2): „*Ĉi tiu libro de la instruado ne foriĝu de via buŝo, sed meditu pri ĝi tage kaj nokte, por ke vi zorge plenumu ĉion, kio estas skribita en ĝi; ĉar tiam vi havos feliĉon sur viaj vojoj, kaj tiam vi havos sukceson*“ (Jos 1,8).

5. Ekzameno per aŭskultado de predikoj: Dio promesis ion specialan por tiuj, kiuj aŭskultas la bibliajn predikojn. Tiu, kiu per malfermita koro aŭskultas la parolon de Dio, venos al la kredo: „*La fido venas do per aŭdado, kaj aŭdado per la vorto de Kristo*“ (Rom 10,17).

6. Ekzameno surfone de propra pekema karaktero: Nenie en la Biblio ni trovas nin en nia ekzisto tiel ĝuste prezentitaj kiel, se temas pri nia pekema karaktero. Tiu, kiu restas ĉipunkte honesta pri si, tiu ekkonas la veron de la Biblio en la diagnozo, dirita pri ni: „*Ĉar ne ekzistas diferencigo; ĉar ĉiuj pekis kaj maltrafis la gloron de Dio*“ (Rom 3,22-23). Oni ne povas renkonti homon, kiu povus refuti la vortojn el 1 Joh 1,8 ĉar ne trafantaj lin: „*Se ni diras, ke pekon ni ne havas, ni nin trompas, kaj la vero ne estas en ni.*“

Rimarko: Oni vidas, ke la vero de la Biblio malfermiĝas nur al tiuj, kiuj procedas obee al ĝi. Se iu traktas la Biblion nur intelekte kaj sen rilato al si mem, tiu ne trovas la aliron (1 Kor 1,19). Tiel la matematike konvinkigaj kalkuloj (vidu demandon FB1) povas esti helpo, sed la paŝo al la kredo restas individua decido. La konfirmo de Dio povas esti akirita nur en fido; en malfido oni ricevas refuton.

I.4. Pri la bibliaj temoj

B40: *La Biblio parolas pri Jesuo.* Tio ne validas nur por la NT, ja ankaŭ koncerne la MT Jesuo instruas: „*Vi esploras la Skribojn, ĉar vi opinias, ke en ili vi havas eternan vivon; kaj ili estas tio, kio atestas pri mi*“ (Joh 5,39). Nur per la NT oni akiras la ĝustan aliron al la MT, ĉar la skribaĵoj de tiu rilatas al Kristo. Tiun ĉi principon Jesuo konfidis al siaj du disĉiploj survoje al Emaŭso (Luk 24,13-35). Tiel estis preparolita ankaŭ la ĉefa senco de la Biblio, kiu estas emfazita en Joh 20,31: „*Sed ĉi tiuj [signoj] estas skribitaj, por ke vi kredu, ke Jesuo estas la Kristo, la Filo de Dio, kaj ke kredante, vi havu vivon en lia nomo*“ (Joh 20,31).

B41: *La Biblio parolas pri la surteraj kaj pri la ĉielaj aferoj* (Joh 3,12). Al la surteraj aferoj apartenas ekzemple la historiaj okazintaĵoj, vojaĝraportoj, personaj renkontiĝoj, leĝaj preskriboj, karakterizaĵoj de la etoso, familiaj kronikoj, generaciaj arboj, misiaj raportoj, ĉiutagaj demandoj kaj natursciencaj asertoj. Apud tiuj ĉi ankaŭ de Dio por signifaj prenitaj eldiroj la Biblio orientigas nian rigardon pli kaj pli al la ĉielaj aferoj (Mat 6,33; Kol 3,2): al Dio, Jesuo Kristo kaj la Sankta Spirito, al la regno de Dio, al la resurekto kaj juĝo, al la ĉielo kaj eterno.

B42: *La Biblio proponas la plej realan priskribon de la homo.* La viroj kaj la virinoj de la Biblio ne estas glorigitaj kiel herooj, sed montritaj per ilia tuta malforto kaj eraremo, en ilia malsukceso, sed same ankaŭ en ilia modela agado en fido al la vero. Eĉ koncerne Davidon, kiun la Skribo karakterizas „*Eternulo elserĉis al Si viron laŭ Sia koro*“ (1 Sam 13,14), liaj misagoj ne estas prisilentitaj (2 Sam 11).

B 43: *La biblia revelacio estas la ŝlosilo al la kompreno de tiu ĉi mondo.* Ĝi estas la fundamenta kaj per nenio anstataŭebla informfonto. Samtiel restas la nuna tempo sen la tri atestitaj okazintaĵoj en la pasinto: kreo, peka falo kaj diluvo neklarigeblaj. El tio sekvas kvin deduktitaj subbazaj frazoj (pli en [G6]):

1. La pasinto estas la ŝlosilo por la nuntempo. Tiu ĉi frazo estas la inversigo de tiu baza frazo de la evolucia doktrino, laŭ kio oni povas el la nuntempa observado konkludi laŭplaĉe profunde en la pasinta tempo.

2. *La faktoroj de la kreado revelaciigas nur surbaze de la fido* (Heb 11,3). Diversaj kreofaktoroj estas atestitaj en diversaj bibliaj lokoj:

- per la vorto de Dio: Psa 33,6; Joh 1,1-4; Heb 11,3
- per la forto de Dio: Jer 10,12
- per la saĝeco de Dio: Psa 104,24; Sen 3,19; Kol 2,3
- per la Filo de Dio: Joh 1,1-4; Joh 1,10; Kol 1,15-17; Heb 1,2b
- per la karaktermarkoj de Jesuo: Mat 11,29; Joh 10,11; Joh 14,27
- sen iu elira materialo: Heb 11,3
- sen uzo de la tempo: Psa 33,6

3. *La morto estas la konsekvenco de la peko de la unua homparo* (1 Mos 2,17; 1 Mos 3,17-19; Rom 5,12; Rom 5,14; Rom 6,23; 1 Kor 15,21).

4. *De la efikoj de la peka kazo ĉe la homo ankaŭ la tuta videbla kreitaro estas trafita kune* (Rom 8,20+22). La detruaj strukturoj en la biologio (ekz. bakterioj kiel malsanportantoj, parazitismo, mortigaj mekanismoj ĉe la serpentoj, araneoj kaj rabbestoj, la viandkonsumaj herboj, la peno, bezonata pro „dornoj kaj disteloj“) ne estas klarigeblaj sen konsidero de la peka kazo. Samtiel la ĉie observebla efemereco havas sian kialon en ĝi.

5. *La niatempa geologio de la tero ne povas esti klarigebla sen konsideri la diluvon.*

I.5. Pri la eldiroj en la Biblio

B50: *La pezo (signifo, pensprofundo) de la bibliaj eldiroj ne estas ĉie la sama*, tamen ne troviĝas sengrava informo. Tiu ĉi aspekto fariĝas tuj klara, se oni komparas ekzemple Johanon 3,16 kun Agoj de apostoloj 18,1 (komp. B22).

B51: *La Biblio enhavas ĉiujn por ni gravajn bazajn eldirojn.* Ĝi estas en tiu senco kompleta, ke ĝi enhavas ĉion nepran por majstri la surteran vivon kaj samtempe por atingi la eternan celon: „*Serĉu en la libro de la Eternulo, kaj legu: eĉ unu el ili ne mankos, unu ne sentos foreston de alia; ĉar Lia buŝo tion ordonis kaj Lia spirito tion kolektas*“ (Jes 34,16).

B52: *La Biblio nenie kontraŭdiras sin mem.* Pliparte solviĝas la ŝajnaj kontraŭdiroj per intensa observado. La plej oftaj kialoj por ekhavi impreson de kontraŭdiro troviĝas en malobservo de kelkaj bibliolegaj principoj:

1. La Biblio raportas ofte tre kompakte: Tiel la konvertiĝa rakonto pri Levio (= Mateo) estas menciita en nur unu versiklo (Mat 9,9). Samtiel la ofte starigita demando pri la edzinoj kaj filoj de Adamo ricevas sian respondon en kondensaj, ne kompletaj raportoj en la Biblio. La solvo de la problemo estas tamen ofte ebla per konkludado: Laŭ 1 Moseo 5,4 Adamo koncipis filojn kaj filinojn. En la komenca situacio do geedziĝis gefratoj inter si; en la sekva generacio gekuzoj inter si. Tiel proksime al la kreo la incesto ne estis problemo (vidu demando FS11).

2. Pri kelkaj okazintaĵoj troviĝas en la Biblio paralelaj raportoj kun diversaj aspektoj.

Ekzemplo 1: La generaciaj arboj de Jesuo laŭ Mateo 1,1-17 kaj Luko 3,23-38 montras apud kongruaĵoj ankaŭ kelkajn diferencojn. Ĉe Mateo oni trovas tipe descendan registron, kiu komenciĝas per Abrahamo kaj iras ĝis Jozefo, la edzo de Maria. Ĉe Luko tamen la registro ascendas, komencante per Jozefo kaj irante ĝis Adamo, eĉ ĝis Dio mem. La generacia registro

ĉe Mateo enhavas 3 x 14 = 42 nomojn, kaj tiu ĉe Luko 77 nomojn, kio evidente havas simbolan signifon. Ambaŭ listoj ellasas el motivoj de superrigardo kaj simboleco kelkajn personojn, tamen ili ambaŭ harmonias klare en sekvaj punktoj:

- Jesuo ne estas filo de Jozefo.
- Jozefo estas „la stelo el Jakobo“ (4 Mos 24,17).
- Jesuo devenas el la linio de Judo (Apokalipso 5,5).
- Jesuo havas reĝan devedon per Davido (1 Kro 28,4-7; Jes 43,6; Apo 5,5).

Ekzemplo 2: Diversaj raportoj pri la releviĝo de Jesuo diferencas en neesencaj detaloj. Tiuj diferencoj montras, ke ĉiu skribis kiel atestanto kaj ke oni ne kopiis unu de la alia. (Kiam pluraj atestantoj senlige inter si raportas pri iu trafikakcidento, la raportoj montros diferencojn, kvankam ĉiuj el ili atestas veron).

3. Kelkaj spiritaj eldiroj esprimas sian veran sencon nur per ilia komplementa tuto. La fizikon pri la lumo oni povas priskribi nur laŭ la komplementa (lat.: *complementum* = kompletigo) maniero: Unuflanke la lumo kondukas laŭ la onda, aliflanke laŭ la korpuskula maniero (fotonoj). Erst kiam oni ambaŭ priskribojn kunigas, kvankam ili unuarigarde kontradikcias inter si, la vero estas vere akirita. Tiajn komplementajn eldirojn havas ankaŭ la Biblio. Tiel koncerne la savan kredon ni havas du komplementajn, tio signifas ŝajne kontraŭdirajn, sed en vero sin kompletigantajn eldirojn (vidu demandon FH1):

- a) „Ni do konkludas, ke homo praviĝas per fido, ekster la faroj de la leĝo“ (Rom 3,28).
b) „Vi vidas, ke homo praviĝas per faroj, kaj ne sole per fido“ (Jak 2,24).

4. Kelkaj problemoj estiĝas per uzo de diversaj tradukoj. Ekzemplo: Laŭ la traduko de Lutero Jakobo enterigas idolojn sub la kverkarbo (1 Mos 35,4). La teksto, pli fidela al la originalo, en la traduko Elberfelder ni legas, ke temas pri terebinto. *Rimarko: Oni ne malakceptas la Biblion, ĉar ĝi kontraŭdiras sin mem, sed ĉar ĝi kontraŭdiras la homon!*

5. En unuopaj kazoj la solvo de la ŝajne kontraŭdiraj tekstoj estas malfacila, sed principe ebla. Jen ekzemploj: La morto de Judaso (Mat 27,5b : Agoj 1,18); la enhavo de la kesto de interligo (1 Reĝ 8,9 : Heb 9,4; la morto de Saŭlo (1 Sam 31 : 2 Sam 1). Ekzempla klarigo: Laŭ Mateo 27,5 Judaso sin pendumis, dum aliloke tekstas: „*Falinte kap-antaŭe, li diskrevis meze, kaj ĉiuj liaj internaĵoj elŝutiĝis*“ (Ago 1,18). Tiuj ĉi eldiroj pri la morto de Judaso ŝajne kontraŭdiras unu la alian. Tamen ili venas en akordon, se oni la duan eldiron komprenas en simbola senco, kvazaŭ oni volus diri: „Li estis funde detruita viro“ (vidu B59).

B53: *La Biblio estas la sola libro kun veraj profetaj informoj*, kiuj loke kaj tempe pruveble plenumiĝis (vidu FB1).

La difino de la profetaĵo: Profetaĵo estas la certeca antaŭdiro pri iu konkreta libera okazantaĵo de la estonto, kiu ne okazos helpe de normalaj rimedoj de la homa rekono. La profetaĵo do estas la *anticipe* anonco de pli postaj okazantaĵoj – kontraste al la historia verkado, kie temas pri la *postokaza* anonco de la antaŭaj okazantaĵoj. Jesuo atentigas en Johano 13,19 pri la fidfortiga intenco de la profetaĵo pri la okazantaĵo de estonto: „*De nun mi parolas al vi pri tio, antaŭ ol ĝi okazos, por ke, kiam ĝi okazos, vi kredu, ke mi estas.*“

B54: *Dio ofte komencas sian revelacion per detala eldiro*, kiu poste laŭŝtipe evoluas. La plej markiga ekzemplo por tia procedo estas la promesoj koncerne la alvenon de Jesuo en tiun ĉi mondon [G1, 110-111].

B55: *En kazo de supraĵa legado de la tekstoj troviĝas danĝero prijuĝi la detaledirojn kiel sensignifaj marĝenaĵoj.* En la kompleta kunteksto ili tamen havas pli ofte tre profundan signifon.

Ekzemplo n-ro 1: La roma metodo, rompi al la krucumito gambojn, estis aplikita ĉe ambaŭ rabistoj, sed ne ĉe Jesuo (Joh 19,32-36). La profeta indiko el 2 Mos 12,46: „...*kaj oston en ĝi ne rompu!*“ estas ĉe Johano 19,36b: „*Osto en li ne estos rompita,*“ malfacile identigebla, ĉar ĉe la malnovtestamenta citaĵo temas pri la paska ŝafido.

Ekzemplo n-ro 2: Jesuo devis laŭ la malnovtestamenta indiko, esti krucumita *ekster* la urbomuro de Jerusalemo, ĉar en la malnovtestamenta erao la oferbestoj estis bruligitaj *ekster* la tendara kampo (3 Mos 16,27; Heb 13,11-12).

B56: *La bibliaj eldiroj posedas eldirprofundon, kies fundon la homa saĝo ne povas diveni* (1 Kor 13,12). Georgo Huntemann konstatas: „Kion la Biblio al ni verdire volas diri, komenciĝas transe de tio, kion la racio povas esplori.“

B57: *La radiuso de la bibliaj eldiroj transcendas la tutan pensatingon de la homo.* La tempa kadro etendiĝas en la tensio inter „*antaŭ la fondo de la mondo*“ (Efe 1,4) ĝis la eterno de Dio (Apo 22,5). La Biblio respondas al ni ĉiujn demandojn, kiujn neniu naturscienco povas respondi:

- Kio estas la esenco de la morto? Kial ĝi okazas kaj ĝis kiam ĝi estos?
- Kio estas la homo? De kie ni venis? Pro kio ni vivas? Kien ni iras?
- Kio troviĝos en la eterno?

B58: *La Biblio estas ekstraordinara literatura verko.* Apartenas al la lingva riĉeco de la Biblio, esprimi sian mesaĝon en tioma pleno da literaturaj ĝenroj kaj stilrimedoj, kiel oni tion trovas en neniu cetera libro.

Poemo (Psa 119), **himno** (Kol 1,15-17), **ampoemo** (Alta kanto de Salomono), **scienca raporto** en ordinara lingvaĵo (1 Mos 1), **historia raporto** (Esr), **komparo** (kutimaj situacioj el la ĉiutaga vivo kiel metaforaj elementoj: Mat 13,3-23), **parabolo** (greke: *parabole* = starigite unu apud alia; speciala kaj unika situacio kiel instrua rakonto kun metafora signifo: Luk 18,1-8), **bildriĉa parolado** (Joh 15,1), **profeta bilddiro** (Apo 6), **profeta diro** (Mat 24), **paradokso** (Fil 2,12-13), **prediko** (Ago 17,22-31), **admono** (Kol 3,16-17), **laŭdo** (Efe 1,3), **benformulo** (Fil 4,7), **instruo** (Rom 5,12-21), **familia kroniko** (1 Kro 3), **preĝo** (Psa 35), **persona atesto** (1 Joh 1,1-2), **rakontita sonĝo** (1 Mos 37,6-7), **rekta Dia parolo** (Mat 16,16), **pastora interparolo** (Joh 4,7-38), **disputraporto** (Ago 15,7-21), **tribunala proceso** (Joh 18,28-38), **sentenco** (Sen 13,7), **promeso** (Mar 16,16), **juĝa parolo** (Mat 11,21-24), **enigma** (Juĝ 14,12-14), **jurisprudenco** (civila, punleĝa, moralleĝa, rituala, sanprizorga), **lirika poezio** (Alta kanto de Salomono), **biografio** (Nehemio), **persona korespondado** (Paŭlo al Filemono), **taglibro** (Ago 16), **monologo** (Ijo 32-37), **dialogo** (Ijo 3-31), **apokaliptiko** (Dan, Ago), **tempa enigmo** (Dan 12,9), **prologo** (greke: *prólogos* = antaŭparolo; Luk 1,1-4), **epilogo** (greke: *epílogos* = postparolo; Joh 21,25), **elipso** (greke: *élleipsis* = ellaso; stilrimedo ellasi la malgravaĵon; Mat 9,9), **metaforo** (greke: *metaphorá* = transigo; bildhava, en transiga senco uzita esprimo; Oba 4), **surskribo** (Joh 19,19), **ĉifro** (Apo 13,18).

Kontraŭe la Biblio ne konas ĝenrojn: sagao, legendo, mito, fabelo, gloso, satiro, komedio, ŝerco, utopio, scienca fikcio. La stilfiguroj hiperbolo (greke: *hyperbállein* = ĵeti transe de la celo; troigado: Mat 11,18) kaj ironio (greke: *eironéia* = transformigo; 2 Kor 12,11) foje aperas kiel klare rekoneblaj stilformoj.

Neniu libro de la mondhistorio enhavas tiel larĝan paletron de esprimrimedoj, kaj neniu libro estas en ĉiuj siaj eldiroj samtempe tiel ekskluzive la vero.

B59: *La Biblio utiligas la riĉon de ĉiuj lingvaj rimedoj.* Apud la plej ofte trovataj rektaj esprimformoj aperas en la Biblio multaj specifaj dirmanieroj:

1. *La fenomenologia lingvaĵo:* Anstataŭ la foje neimagebla kaŭza faktografio iu fenomeno estas priskribita el la perspektivo de la observanto. La moderna astronomio kaj samtiel la Biblio parolas pri la sunleviĝo, kvankam tiu ĉi apero ne estas kaŭzita per la „iro de la suno“, sed per la rotacio de la tero.

2. *La idiomaj dirturnoj:* Mallongaj dirturnoj estas en certaj situacioj pli trafaj ol longaj klarigoj (Juĝ 14,18: „*Se vi ne plugus per mia bovidino, vi ne trovus la solvon de mia enigmo*“).

3. *La poezia lingva beleco:* La Alta kanto 8,3: „*Lia maldekstra mano estu sub mia kapo, kaj lia dekstra ĉirkaŭprenu min!*“

4. *La priskriboj kaj imagoj por la niatempaj faknocioj en scienco kaj tekniko:* La Biblio priskribas la teknikajn ecojn, kiuj en la tempo de sia estiĝo ankoraŭ tute ne ekzistis, aŭ la situaciojn, kiujn la scienco niatempempe ekipis per fakterminoj: anstataŭ satelitoj, „spacelabs“ kaj orbitstacioj la Biblio diras bildimage, kiel: „Sed se vi eĉ leviĝus tiel alte, kiel aglo, aŭ se vi aranĝus vian neston inter la steloj, eĉ de tie Mi ĵetos vin malsupren, diras la Eternulo“ (Oba 4). Anstataŭ esprimiĝi en la ginekologia faklingvaĵo pri ontogenezo (evoluo de embrioj) en utero, ĉirkaŭdiras la Biblio la formiĝon de la bebo en la utero tiele: „*Ne estis kaŝitaj antaŭ Vi miaj ostoj, kiam mi estis kreata en kaŝiteco, kiam mi estis formata en la profundo de la tero*“ (Psa 139,15).

5. *La naturscienco faka formulado:* La raporto pri la kreado estas por tio ĉi la trafa ekzemplo, kie ekz. en la fizike ekzakta maniero estas nomita la metodo mezuri tempon kaj samtempe la tempounuo (1 Mos 1,14+19).

6. *La bildoj el la ĉiutaga vivo por tiel klarigi la spiritajn interligojn:* Tiel en la parabolo laŭ Mateo 13,3-23 la semanto estas la anoncanto de la biblia mesaĝo; la semo la vorto de Dio; la dornoj la malhelpo; kaj la bona tero la apertaj koroj de la homoj.

B591: *Sublupe de la ĉiama literatura ĝenro* (rig.: B58) *kaj parolformo* (B59) *ĉiu biblia teksto devas esti observata tre precize.* La eldiroj estas do komprenendaj aŭ laŭvorte precize aŭ laŭsence kaj precize.

a) *precize laŭvorte:* Ĉe Luko 24,44 Jesuo instruas tian procedon el la Skribaĵo: „*Jen estas miaj vortoj, kiujn mi parolis al vi, kiam mi ankoraŭ estis ĉe vi, ke devas plenumiĝi ĉio, kio estas skribita pri mi en la leĝo de Moseo kaj en la profetoj kaj en la psalmoj.*“ Ankaŭ ĉe aliaj tekstlokoj tiu ĉi maniero estas emfazita: „*por ke plenumiĝu tio, kion la Eternulo parolis per la profeto*“ (Mat 2,15) aŭ: „*Hodiaŭ tiu skribo plenumiĝas en viaj oreloj.*“ Aŭ: „*Ĉu vi neniam legis en la Skriboj?*“ (Mat 21,42).

b) *precize laŭsence:* Kiam Jesuo diras: „*Mi estas la vinberarbo; vi estas la branĉoj*“ (Joh 15,5), oni ĉi tie ne povas kompreni la eldiron laŭvorte, sed laŭsence. La intencita senco estas en pli oftaj okazoj facile rekonebla, ja ĝuste la metafora dirmaniero servas al tio, plifortigi la

klarecon kaj imageblecon kaj plifaciligi la envidon. En tiu ĉi kazo la kerna eldiro ankoraŭ aldone diras: „*Ĉar sen mi vi nenion povas fari.*“

I.6. Pri la valoro de la bibliaj eldiroj

B60: *La mesaĝo de la Biblio estas la plej multvalora informo, kiu ekzistas.* La konata evangeliisto Wilhelm Pahls tute prave emfazas: „La evangelio estas la plej bona mesaĝo, kiu iam estis dirita al la homoj. Neniam al ni homoj estis anoncita eĉ nur kompare io simila.“ En la 19-a psalmo estas laŭdata la ĉion superanta valoro de la vorto de Dio: „*Pli bona estas por mi la instruo de Via buŝo, ol miloj da oreroj kaj arĝenteroj*“ (Psa 119,72). Kaj: „*Mi ĝojas pri Via vorto, kiel ricevinto de granda akiro*“ (Psa 119,162).

B61: *Tiu, kiu rezignas pri la vorto de Dio, por li ĝi signifos la juĝon.* Tiel, kiel la prediko pri la vorto de Dio kondukas al la kredo (Rom 10,17) kaj tiel al la savo, tiel la refuto kaj forĵeto kondukas al la pereco:

1 Samuelo 15,23: „*Pro tio, ke vi malŝatis la diron de la Eternulo, Li malŝatis vin, ke vi ne estu plu reĝo.*“

Johano 8,47: „*Kiu estas de Dio, tiu aŭskultas la vortojn de Dio; vi ne aŭskultas, ĉar vi ne estas el Dio.*“

Agoj 13,46: „*Estis necese paroli al vi unue la vorton de Dio. Sed ĉar vi forpuŝis ĝin kaj ne juĝas vin indaj je la eterna vivo, jen ni turnas nin al la nacioj.*“

B62: *La Biblio konsistas el la Malnova kaj la Nova testamentoj.* Ambaŭ partoj estas samgrade la parolo de Dio kaj oni ne povas ilin aranĝi unu kontraŭ la alia. En la NT estas ofte cititaj la eldiroj el la MT. Tio, kurioze, ne okazas pli ofte laŭvorte, sed Dio ligas kun tio progreson en sia revelacio. En NT plenumiĝas la centralaj malnovtestamentaj promesoj: „*Kaj ĉiuj tiuj (homoj de la MT), ricevinte bonan ateston per sia fido, ne ricevis la promeson, ĉar Dio antaŭvidis por ni ion pli bonan, por ke ili sen ni ne estu perfektigataj*“ (Heb 11,39-40). Jam en la MT oni trovas la Sinjoron Jesuon: „*Vi esploras la Skribojn, ĉar vi opinias, ke en ili vi havas eternan vivon; kaj ili estas tio, kio atestas pri mi*“ (Joh 5,39).

B63: *La (malnovtestamentaj) apokrifoj (greke: apókryphos = kaŝita, sekreta, neaŭtenta) ne estas prenindaj por la vorto de Dio.* Ili estiĝis en la tempo inter la MT kaj NT. La plej fortaj objektoj koncerne la malsaman validecon rilate al la Biblio estas:

1. Ili enhavas kelkajn al la Biblio kontraŭdirajn instruojn (kontraŭ la baza principo por ekspliki la Biblion A3, vidu aldonon parto II), kiel: pardono de pekoj per almozdonaco (Tob 12,9), aprobo de magiaj praktikoj (Tob 6,9), pardono de pekoj per preĝo por la mortintoj per la vivantoj (2 Mak 12,46).

2. Ili neniam estis la konsista parto de la juda kanono, ja temas pri postaj aldoniĝoj. La apokrifoj tiel ĉiam estis la konflikta temo. La dogmo de la katolika eklezio el la koncilio en Tridento rangigis en la jaro 1546 la apokrifojn samnivele kun la MT kaj NT kaj aperis kiel reago al la reformacio.

3. Ili estis cititaj de neniu skribisto de la NT, kvankam en NT krom 4 tre malgrandaj skribaĵoj estis uzitaj ĉiuj libroj de la MT.

4. La apokrifoj komprenas sin mem ne kiel la senerara vorto. En la antaŭparolo (prologo) al la Libro Siraho tekstas: „Vi do estas invitata legi bonvoleme kaj atente, kaj bonvolu pardoni, se foje malgraŭ la zorgo kiun mi donis al la traduko, mi ne bone sukcesis pri ĉiuj esprimoj.“

Valorigo de la apokrifoj: Ĉu ni do tute forĵetu la apokrifojn? Lutero proponis trefan formuladon, per kiu li provizis tiujn tekstojn: „Tio estas la libroj, kiujn oni ne prenu por egalvaloraj al la Sankta skribo, sed tamen por utilaj kaj bonaj por legi.“ Tiun sintenon alprenas ankaŭ la aŭtoro de tiu ĉi libro. Se ni ne legas la apokrifojn sub sama valorigo kiel la Biblion, sed en la senco de poezia verkado kaj de historie interesaj libroj (kiel ekzemple Makabeoj), ni tamen povas eltiri el ili utilojn. Speciale aprezinda estas la Libro Siraho, ja en ĝi troviĝas komentoj rilate ĉiujn vivsituaĵojn – kaj tio en forta apogo je la saĝaj libroj de la Biblio, sen ke ili levus pretendon esti la parolo de Dio.

I.7. Pri la komprenebleco kaj kompreno de la Biblio

B70: a) La Biblio estas verkita por esti facile komprenebla: „*Ĉar ni skribas al vi nenion alian krom tio, kion vi legas kaj prikonsentas, kaj mi esperas, ke vi prikonsentos ĝis la fino*“ (2 Kor 1,13).

b) La Biblio tamen enhavas ankaŭ tiel grandajn pensojn, kiujn ni ne povas diveni: „*Ĉar Miaj pensoj ne estas viaj pensoj, kaj viaj vojoj ne estas Miaj vojoj, diras la Eternulo. Kiom la ĉielo estas pli alte ol la tero, tiom Miaj vojoj estas pli alte ol viaj vojoj, kaj Miaj pensoj ol viaj pensoj*“ (Jes 55,8-9).

Pri la tiel-kiel-ankaŭ de tiuj ĉi ambaŭ aspektoj atentigis jam Spurgeon (G1, 94): „En la Biblio oni povas trovi grandajn verojn, kiuj superas niajn komprenkapablojn kaj montras al ni, kiel plata estas nia limigita racio. Tamen en siaj ĉefaj kaj fundamentaj eldiroj la Biblio ne estas malfacile komprenebla.“ La pensoj de la Biblio estas alireblaj por ĉiu (Ago 17,11), tamen ĝiaj pleno kaj riĉo estas neelĉerpeblaj (Rom 11,33).

B71: La Biblio estis skribita sub la instrukcio de la Sankta Spirito de pli ol 45 skribistoj, vokitaj al la servo. Samtiel ĝia enhavo sen helpo de la Sankta Spirito ne povas esti komprenata en ĝusta senco: „*Sed la natura homo ne akceptas la aferojn de la Spirito de Dio; ĉar ili estas por li malsaĝeco; kaj li ne povas ilin scii, pro tio, ke ili estas juĝataj spirite. Sed la spirita homo juĝas ĉion, kaj li mem estas juĝata de neniuj*“ (1 Kor 2,14-15).

I.8. Pri la precizeco de la bibliaj eldiroj

B80: *La Biblio estas la nesupozeble preciza libro.* Tiu ĉi trajto de ĝi montras sin dum pli proksima pritrakto de ĝiaj lingva, semantika, spirita, historia aŭ naturscienca aspektoj.

En la kazo de la *persekuto de kristanoj* oni povas emfazi la precizecaspekton de la Biblio. Ja en la komenca tempo de la komunumo estas dirite ankoraŭ: „*homoj, kiuj riskis siajn vivojn pro la nomo de nia Sinjoro Jesuo Kristo*“ (Ago 15,26), tiel tekstas por la fina tempo: „*mortigitaj pro la vorto de Dio kaj pro la atesto, kiun ili havadis*“ (Apo 6,9). En nia epoko provis ĉiuj eblaj pensfluoĵoj integri Jesuon en sian sistemon. De islamo Jesuo estis akceptita kiel profeto, de la pacifista movado kiel la pacifisto, de aliaj denove kiel la bona homo kaj sociala reformisto. Por *Albert Schweitzer* la historia Jesuo estis interesa. *Carl Friedrich v. Weizsäcker* organizis packoncilion kaj sugestis al la homoj, ke la paco en la mondo estas farebla de ni homoj. Multaj parolas pri Jesuo, sed nur tiom, ĝis kie li konvenas por iliaj konceptoj. La

islamo negas Jesuon esti la Filo de Dio. Sed nur se ni kredas en Jesuon, „*nia paco estas li*“ (Efe 2,14), cetere li estas nia juĝisto (Ago 10,42). La pacmovado distingas tion ĉi same malmulte kiel ĝi ignoras *tiun* Jesuon, kiu laŭ la Apokalipso 6 kiel la ŝafido de Dio malfermas la sigelon kaj sendas sur la teron la kvar apokalipsajn rajdantojn kiel la juĝon kun milito kaj morto. *Franz Alt* skribas libron pri la Prediko sur la monto, sed li ignoras la centran ordonon de Jesuo, forlasi la larĝan vojon de malbeniteco kaj iri tra la malvasta pordo. Jesuo cetere ofte aperas, sed tio ne sufiĉas. En sia Prediko sur la monto la Sinjoro admonas:

„Ne ĉiu, kiu diras al mi: Sinjoro, Sinjoro, eniros en la regnon de la ĉielo; sed tiu, kiu plenumas la volon de mia Patro, kiu estas en la ĉielo. Multaj diros al mi en tiu tago: Sinjoro, Sinjoro, ĉu ni ne profetis en via nomo, kaj en via nomo elpelis demonojn, kaj en via nomo faris multajn potenciaĵojn? Kaj tiam mi konfesos al ili: Mi neniam konis vin; foriĝu de mi, vi farantoj de maljusteco“ (Mat 7,21-23).

Tiu, kiu emfazas nur la homecan Jesuon, tiu trafas nenion. Sed ni devas anonci *tiun* Jesuon, kian atestas la Skribo (Joh 7,38). La vera skandaliĝo okazas koncerne la vorton de Dio. En la tempo de la kreskanta disfalo de ĉiuj mezuroj estas persekutataj tiuj, kiuj ankoraŭ donas validon al la Biblio en ĉiuj siaj eldiroj kaj tiel insistas je: „*Estas skribite!*“ – ĉu kiam temas pri la kreadraporto aŭ se temas pri Jesuo, pri kiu la Skribo atestas. Nia persona atesta insistado por la tuto de la Dia vorto havas promeson de la supervenko (Apo 12,11). Aldonaj ekzemploj por tio: [G1, 102-110].

I.9. Pri la tempa kadro de la bibliaj eldiroj

B90: *La vorto de Dio estas sentempa.* Jesajo kontraŭpozicias la maldaŭrecon de herboj kaj la daŭrecon de la vorto de Dio: „*Sekiĝas herbo, velkas floreto; sed la vorto de nia Dio restas eterne*“ (Jes 40,8), kaj Jesuo kontraŭpozicias la maldaŭrajn stelarojn en rilato al siaj vortoj: „*La ĉielo kaj la tero forpasos, sed miaj vortoj ne forpasos*“ (Mat 24,35). Ĉe *Lutero* oni povas trovi la diraĵon: „La Biblio nek estas antikveca nek moderna, ĝi estas eterna.“ La Biblio estas supertempa, ja ĝiaj konceptoj kaj aperspektivoj montras trans la iu ajn aktuala tempa apero. Kvankam en la Biblio ne estas menciitaj aborto, gentekniko kaj drogaĉkonsumado, oni povas dedukti el la Biblio senduban rilaton al tio. Neniu alia libro posedas tian enpenetran povon. Tiel povas ekzemple la homa jurisdikcio efektiviĝi nenian kondamnon, se pri la nove aperintaj temkampoj ne troviĝas rilataj paragrafoj.

I.10. Pri la alpaŝo al la Biblio: konvertiĝo al Jesuo Kristo

Post ĉiuj-ĉi eldiroj stariĝas la demando pri la alpaŝo al la Biblio. Kiamaniere trovi iu ne jam „spertita“ homo la adekvatan eniron? Post iu evangeliza prelego venis en ĉambron por individuaj interparoloj juna intelekto pretendita viro, kiu tamen sincere serĉis la alpaŝon al la Biblio. Post kiam mi dum nia interparolo povis forigi kelkajn barojn, li konkludis por si: Nun mi kontinuos mian laboron super la Biblio helpe de la al mi konata filozofia pensmaniero. Mi avertis lin antaŭ tio: „Vi povas tion fari, sed tiamaniere vi finfine ne trovos la vivantan Dion, revelaciitan en Kristo, sed la senpersonan panteisman dion de filozofoj. La filozofoj legis la Biblion el la vidpunkto de siaj penskategorioj, tamen ili ne trovis Dion, kiu fariĝis por ni la savo ekskluzive en Jesuo.“ La juna viro restis kaj permesis sin instrui: „La alpaŝon al la Biblio kaj al la vivanta Dio vi povas havi hodiaŭ vespere, se vi komencas ekzistale kun via vivo. Ĉu vi tion volas?“

En sekvaj teksteroj mi skizas mian parton de la interparolo, por montri al la leganto per tiu ĉi okazo, kiamaniere okazas la alpaŝo al la Biblio.

B100: *Ekkoni sin mem:* Ni kune legas en la epistolo al Romanoj 3,22-23: „*Nome, la justeco de Dio, per fido al Jesuo Kristo, por ĉiuj kredantoj, ĉar ne ekzistas diferencigo; ĉar ĉiuj pekis kaj maltrafis la gloron de Dio.*“ Tiu ĉi vorto montras al ni nian perditcon antaŭ la vivanta Dio; per nia peko, kiu nin de Li dividas, ni ne havas alpaŝon al Li kaj same nenion alian, kio al ni povus ŝajni agrabla. Mallonge dirite: Ni havas antaŭ Dio neniun bonan nomon. Ek de la origina peko troviĝas inter la sankta Dio kaj ni, pekantaj homoj, profunda abismo. Ĉu vi povas konsenti kun tiu ĉi Dia diagnozo?

B101: *La nura eliro:* El tiu ĉi dilemo kondukas *unu nura*, de Dio mem donacita eliro. Sur la kruco la Filo de Dio estis ekzekutita pro niaj pekoj. Jesuo venis en la mondon por fari pekantojn savfeliĉaj (Mat 18,11). Ĉu vi povas tion kredi?

B102: *Konfesi siajn pekojn:* Ni povas legi ĉe 1. Johano 1,8-9: „*Se ni diras, ke pekon ni ne havas, ni nin trompas, kaj la vero ne estas en ni. Se ni konfesas niajn pekojn, Li estas fidela kaj justa por pardoni al ni niajn pekojn kaj nin purigi de ĉia maljusteco.*“ Jesuo surbaze de sia sava ago sur Golgoto havas plenpovon por pardoni la pekojn. Se ni referencas je lia promeso kaj se ni konfesas niajn pekojn kaj petas pardonon, do li estas fidela, tio signifas, ni povas fidi, ke li fakte nin liberigas de la pekokulpo. Sed ni tion ne devas nur pripensi, sed ankaŭ *fari!* Ĉu vi volas tion fari? Tiel ni nun volas al la Sinjoro Jesuo diri perpreĝe (eventuala enhavo de la libere formulita preĝo):

„Sinjoro Jesuo, mi hodiaŭ aŭdis de vi, kaj mi tion komprenas, pro kio vi venis en tiun ĉi mondon. En via senfina amo vi inkluzivis ankaŭ min. Vi vidas mian *tutan* kulpon – tion, pri kio mi momente konscias, kaj ankaŭ, kio momente estas por mi kaŝita. Sed vi scias ĉion, pri ĉiu kulpeca konduto, pri ĉiu falsa ekscitiĝo de mia koro, ĉio estas ĉe vi registrita. Mi staras antaŭ vi kiel malfermita libro. Kun mia vivo mi ne povas resti starante antaŭ vi. Tiel mi vin nun petas: Pardonu mian tutan kulpon kaj purigu min ĝisfunde! Amen.“

Nun ni diris al la Sinjoro tion, kio dekomence kaŭzas plagon (1 Joh 1,8-9). Sur tio ĉi Dio konstruas per sia promeso. Kion vi opinias, kiom da via kulpo nun estas al vi pardonita? Ĉu 80 %? Ĉu 50 %? Ĉu eble nur 10 %? Sed ni povas legi: „*nin purigi de ĉia maljusteco*“ (1 Joh 1,9). Al vi estas *ĉio* pardonita! Jes, ĉio: 100 %! Tion vi rajtas scii – do ne nur supozi, preni por ebla aŭ pri tio havi esperon. La Biblio valorigas, ke ni havu certecon pri tio. Pri tio ĉi ni legu du tekstopartojn: 1. Petro 1,18-19 kaj 1. Johano 5,13.

B103: *La transdono de propra vivo:* La Sinjoro Jesuo pardonis al vi la tutan kulpon. Nun vi povas transdoni al li vian vivon. Ĉe Johano 1,12 ni povas legi: „*Sed al ĉiuj, kiuj lin akceptis, li donis la rajton fariĝi filoj de Dio, al la kredantoj al lia nomo.*“ Ĉiuj, kiuj la Sinjoron Jesuon invitas transpreni la stiradon de ilia vivo, ricevas la plenrajton sin nomi la infanoj de Dio. Oni do ne fariĝas infano de Dio, ĉar oni sporade faras ion bonan aŭ ĉar oni estas pia aŭ ĉar oni apartenas al tiu aŭ alia eklezio, sed nur, ĉar ni nian vivon konfidis al la Filo de Dio kaj ni estas pretaj lin obee postsekvi. Tion ni volas fiksi per preĝo:

„Sinjoro Jesuo, vi pardonis mian kompletan kulpon. Mi eĉ ne povas tute kompreni, sed mi fidas vian konfirmon. Kaj nun mi vin petas, venu en mian vivon. Konduku min kaj gvidu min sur la vojon, kiun vi al mi montras. Mi scias ke vi havas koncerne min bonan intencon, pro tio mi volas konfidi al vi ĉiujn kampojn de mia esto. Igu, ke mi formetu

tion, kio ne estas en ordo antaŭ vi. Donacu al mi novajn kutimojn kun vi, troviĝantaj sub via beno. Kaj donu al mi obeeman koron, por ke mi faru, kion via vorto al mi diras. Igu min ne observi diversajn influojn kaj diversajn homajn opiniojn, sed malfermu al mi la Bibliion por ke mi ĝuste komprenu vian vorton kaj ke mi vivu akorde kun ĝi. Vi estu mia Sinjoro kaj mi volas vin postsekvi. Amen.“

B104: Akceptita: La Sinjoro vin akceptis! Li deaĉetis vin multekoste, li vin savis. Nun vi fariĝis la infano de Dio. Estante la infano oni estas ankaŭ la heredanto: la heredanto de Dio, la heredanto de la ĉiela mondo. Ĉu vi povas imagi, kio momente okazas en la ĉielo? „...Eventuale ĝojo?“ Jes, certe! Ĉe Luko 15,10 estas skribite: „*Tiel same, mi diras al vi, estas ĝojo antaŭ la anĝeloj de Dio pro unu pekulo, kiu pentas.*“ Pro via konvertiĝo nun troviĝas ĝojego en la ĉielo. La tuta ĉielo partoprenas je tiu ĉi evento: *Unu* prenas la mesaĝon de la evangelio por serioza afero kaj faras ĝin por si valida. La Biblio nomas tiun procedon de nia propra orientiĝo al Jesuo *la konvertiĝo*; ĉi-okaze ni fordonas la kulpon kaj li ĝin forprenas de ni. Samtempe okazas, fare de Dio, la novnaskiĝo: Li donas la novan vivon de infaneco kaj ni ĝin akceptas. La konvertiĝo kaj la novnaskiĝo ambaŭ apartenas al ilia komuneco. Ili faras du flankojn de la sama medalo.

B105: Danko: La savo estas la donaco de Dio al ni. Nur pere de lia amo la vojo al la savo estis por ni farita ebla. Ni povas kontribui al la sava laboro nenion. Tiu, kiu ricevas ion donace, diras: „Dankon!“ Tion ni nun ankaŭ volas fari. Bonvolu per propraj vortoj formuli la preĝon de via danko. Diru nun al la Sinjoro Jesuo: ...

B106: Kiamaniere antaŭen? La Biblio komparas vian momentan staton kun tiu de la nove naskita infano. Samtiel, kiel la nove naskita infano nun tute sendube apartenas al la familio, tiel ankaŭ vi apartenas nun al la familio de Dio. La nove naskitaj vivas en kritika vivofazo, kie troviĝas fenomeno de la mortado de la suĉbeboj. Ankaŭ sur la kampo de la kredo tio estas ebla. La naskiĝo (konvertiĝo) bone pasis. Vera, nova vivo troviĝas ĉi tie. Sed nun nepras la nutraĵo (lakto) kaj bona flegado. Nature Dio ankaŭ ĉirilate antaŭzorgis farinte ĉion, por ke vi povas ricevi bonan evoluon. La mortado de suĉuloj estas evitata, se oni sekvas la konsilojn de Dio. Troviĝas kvin gravaj punktoj, kiuj ne estas nur tre gravaj por la vivo en la postsekvo de Jesuo; ili estas neeviteblaj *antaŭkondiĉoj*, por ke ni povas praktike vivi kun Kristo. Se ni observas tiujn kvin punktojn, ni havas garantiproklamon de Dio, ke ni la celon ankaŭ vere atingos:

1. La vorto de Dio

Surbaze de la vorto de la Biblio vi faris vian decidon. La Biblio estas la unika, de Dio aŭtorizita libro. Neniu alia estas al tiu ĉi egala koncerne aŭtoritaton, veron, informplenton kaj originon. Por la nova vivo la legado de tiu ĉi libro estas la nepra nutraĵo. Ĉe 1 Petro 2,2 tiu ĉi aspekto plene manifestiĝas: „*Kiel ĵusnaskitaj suĉinfanoj, sopiru al la spirita lakto pura, por ke vi per tio kresku en savon!*“ La vorto de la Biblio estas tiu lakto. Komencu ĉiutage legi la Bibliion por informi vin pri la volo de Dio. Plej bone, komencu legi unu el la evangelioj (ekz. la evangelion laŭ Johano). Faru el tio por si ŝatatan kaj rutinan kutimon, legi en la Biblio. Vi neniutage forgesas purigi viajn dentojn kaj matenmanĝi. Estu ankaŭ ĉi tie same konsekvenca kaj kompletigu vian tagritmon per unu grava punkto!

2. La preĝo

Parolu kun via Sinjoro ĉiutage! Per sia vorto Li parolas *al ni*, sed Li volas, ke ankaŭ ni *kun Li* parolu. Tion ni faras dumpreĝe. Estas granda privilegio, ke ni povas al Li diri ĉion. La preĝo, laŭ la Biblio, konas nur du adresojn: Dio, estante nun via Patro, kaj la Sinjoro Jesuo, estante via Savanto, via Bona Paŝtisto, via Amiko, jes ĉio por vi. Aliajn preĝadresojn la Biblio ne

konas. Helpe de la preĝo vi akiros multe da forto kaj vi estos pozitive transformita. Vi povas el ĉiuj aferoj de via ĉiutagaĵo fari preĝon: el viaj zorgoj kaj ĝojoj, planoj kaj intencoj. Danku al via Sinjoro pro ĉio, kio vin movigas. Eniru ankaŭ la porpetojn koncerne plagojn de aliaj homoj kaj petu, ke ankaŭ aliaj homoj el via ĉirkaŭo venu al la viva kredo. Helpe de la bibliolegado kaj preĝoj estiĝas „spirita cirkvito“, tre grava por la sana kredovivo.

3. La obeado

Dum vi legas la Bibliion, vi trovos multajn helpajn instrukciojn por ĉiuj kampoj de via vivo kaj ankaŭ rilate vian komunikadon kun Dio. Efektivigu ĉion, kion vi komprenis, en agoj, kaj vi ĝisvivigos grandan benon. Al Dio plaĉas, se ni manifestiĝas obeemaj infanoj, vivantaj akorde kun Lia vorto kaj Liaj ordonoj. La amon al nia Sinjoro ni ne povas atesti pli bone, ol se ni estas al Li obeemaj: „*Ĉar jen estas la amo al Dio: ke ni observas Liajn ordonojn; kaj Liaj ordonoj ne estas pezaj.*“ Se en kelkaj kazoj troviĝas diversaj eblecoj por agi, tiam ni trovos en la Biblio la ligan mezuron, sur kiu kuŝas la beno de Dio: „*Oni devas obei Dion prefere ol homojn.*“

4. La komuneco

Ni homoj estas fare de nia Kreinto orientitaj je komuneco. Serĉu kaj flegu kontakton kun aliaj konsciaj kristanoj, kiuj konscias ankaŭ pri sia konvertiĝo. Nur kun tiaj vi povas kune preĝi kaj interŝanĝi vortojn pri la fido. Se oni elprenas ardantan karbopecon el la fajrejo, ĝi baldaŭ estingiĝas. Ankaŭ nia amo al Jesuo malvarmiĝos, se ĝi ne estas pere de la komuneco kun aliaj kredantoj tenata en ardbrulo. Tiel aliĝu al iu biblifidela komunumo kaj kunlaboru kun ili! Bona, viva komunumo, en kiu oni kredas en la tuton de la Biblio, estas neevitebla antaŭkondiĉo por nia kredovojo. Observu tiun ĉi kvaran leĝon aparte!

5. La kredo

Post tio, kiam ni pere de nia konvertiĝo kaj novnaskiĝo komencis vivi en la kredo, temas pri tio, ke ni en tiu ĉi kredo kresku kaj de ĝi ne plu defalu. Paŭlo skribas al Timoteo: „*Sed restu vi en tio, kion vi lernis kaj pri kio vi certiĝis, sciante, de kiu vi ĝin lernis*“ (2 Tim 3,14). Fine de sia vivo Paŭlo povis konstati: „*Mi batalis la bonan batalon, mi finis la kuradon, mi gardis la fidon*“ (2 Tim 4,7). Tiel ni volas sekvi tiun ĉi modelon kaj samtiel resti en fidelo.

Tiel la konvertiĝo ne estas la fina punkto, sed la starto de la nova vivo. Nun vi rajtas esti ankaŭ la kunlaborantoj de Dio (1 Kor 3,9). Helpu do nun, ke ankaŭ aliaj homoj akiru savon pere de Jesuo. La konvertiĝo havas duoblan efikon: tiu ĉi surtera vivo ricevas novan, sencoplenan ekvilibron, kaj samtempe oni akiras la donacon de la di-infaneco, kio nin faras heredantoj de la eterna vivo.

Do, ni precizigu: La aliron al la Biblio ni ne akiras deekstere kiel neŭtralaj observantoj, sed nur kiel „insider“ (internuloj). Tiu, kiu sin pere de aŭtenta konvertiĝo adresas per sia persona ekzisto en Jesuo Kristo al Dio kaj ĝisvivas la savon, tiu ŝanĝis la trajnon. La individua animprizorga interparola protokolo povas esti de kazo al kazo diversa. Sed la supra interparolo reflektas la esencon de ĉiu konvertiĝo: la rekonon de siaj pekoj – la konfeson de siaj pekoj – la disponigo de sia vivo al Jesuo Kristo. De tiu ĉi punkto komencas la procezo de la kresko en la kredo.

I.11. La fina rimarko

Ni faris provon, la esencon pri la Biblio resumi en la formo de bazaj asertoj. Tiu ĉi homa entrepreno sur la libro de Dio neniam povas esti kompleta kaj vere ne perfekta, por adekvate priskribi la riĉecon en la Biblio.

II. La bazaj principoj por ekspliki la Bibliion

A1: La plej bona ekspliko de la Biblio estas la Biblio mem. Alimaniere dirite: Troviĝas neniu pli bona komentario pri la Biblio ol la Biblio mem. Tiun ĉi la plej gravan regulon de la eksegezo konstante praktikis Jesuo (ekz. Mat 19,3-6), la apostoloj (ekz. Gal 3,16) kaj la bibliaj profetoj.

A2: Jesuo estas la ŝlosilo de la ekspliko. Tiel la MT sen la indiko pri Kristo nekomprenebla (ekz. Psa 110,1; Jes 53; Mal 3,20+23-24).

A3: La eksplikoj ne rajtas troviĝi en kontraŭdiro kun la aliaj tekstopartoj (komp. la regulon B52).

A4: Instruo ne estu eltirita el unu sola versiklo. La centraj eldiroj estas ripetataj en diversaj kuntekstoj aŭ reformulitaj per aliaj vortoj.

Ekzemploj:

- La senpekeco de Jesuo (1 Joh 3,5; 1 Pet 2,22; 2 Kor 5,21)
- La ĝenerala pekemo de ĉiuj homoj (1 Mos 8,21; Psa 14,3; Jes 1,5-6; Mat 15,19; Rom 3,23)
- La volo de Dio savi (Hes 34,12; Mat 18,11; 1 Tes 5,9; 1 Tim 2,4)

Atentu: Ke Jesuo amas sian Patron (Joh 14,31) kaj ke la Patro amas nin (Joh 16,27) troviĝas eksplicite en la Biblio unu nuran fojon. Sed en amaso de aliaj eldiroj tiu ĉi konstato tamen estas implicite enhavita aŭ supozita. En similaj kazoj estas tamen permesite, tion ĉi formuli en la senco de la kreda vero.

A5: Ĉiam oni atentu la kontekston kaj transe de tio ankaŭ la tutinterkonsenton de la Biblio. La ignoro de tiu ĉi regulo kondukis jam al multaj kontraŭbibliaj apartaj instruoj kaj dekadentaj sektoj. Tre gravaj estas la indikoj de unu tekstero al la tute aliloka samsignifa tekstero.

A6: Kelkaj bibliaj instruoj estas dedukteblaj el la tuto de la samsignifaj unuopaj okazĵoj. La Biblio ne estas sensuka leĝinstrua lernolibro, sed per miloj da donitaĵoj estas al ni perekzemple mesaĝita tiel la ĝusta, kiel ankaŭ la malĝusta rilato kun Dio kaj kun aliaj homoj. Se oni argumentas la komunan esencon el la teme komunaj unuopaj rakontoj, tiel povas kaj devas esti el tio deduktita la biblia instruo. Trafa ekzemplo por tio estas la detala prezento de la longtempa historio de Izraelo per benoj kaj juĝoj (1 Kor 10,11). Respondante la demandon DV6 mi uzis tiun ĉi bazan regulon.

A7: La MT estas la neevitebla kondukilo al la NT, te. ke sen MT multaj tekstopartoj en la NT restas nekompreneblaj (ekz. la kreado, la unua peko, la inundo).

A8: La NT havas pli grandan revelacian larĝon ol la MT. Jam observo de la epistolo al Hebreoj konfirmas tiun ĉi aserton. Ekzemple de la „venĝo“ mi volas mallonge pritrakti la regulon A8. La homa naturo volas en la kazo de damaĝo venĝi kontraŭ la alia je kelkopa

prezo: „*Se sepoble estos venĝite por Kain, por Lemeh estos sepdek-sepoble*“ (1 Mos 4,24). Kaj per la leĝoj de Sinajo Dio enkondukas drastan limigon de la rekompenco al la regulo unu kontraŭ unu: unu okulo – unu okulo; unu dento – unu dento; unu vundo – unu vundo; unu ŝvelaĵo – unu ŝvelaĵo (2 Mos 21,24,25). Sed en sia prediko sur la monto Jesuo pliprofundigas la malnovtestamentan leĝon, kio manifestiĝas per la sesfoja esprimo „Sed mi diras al vi...“ Citante 5 Mos 32,35 kaj 2 Mos 21,24-25 li malpermesas iu-ajn venĝon: „*Sed mi diras al vi: Ne rezistu al malbono; sed al tiu, kiu frapas vian dekstran vangon, turnu ankaŭ la alian*“ (Mat 5,39).

A9: Nenie en la Biblio peko estas prezentita bona, eĉ se en speciala loko ne estas aparte kondamnita. Por ekspliki la temon de la „maljusta domprizorganto“ en Luko 16,1-8 tiu ĉi regulo estas tre grava (vidu [G10]).

A10: Ne estu dirite pli ol estas skribite: „*por ke vi en ni lernu ne preterpasi la skribitaĵojn*“ (1 Kor 4,6).

A11: La biblia vero ĉiam havas antaŭrangon antaŭ ĉia alia rekono, kiam la Biblio pri la koncerna demando havas sian eldiron: „*Gardu vin, ke neniu prirabu vin per filozofio kaj vanta trompo, laŭ la tradicio de homoj, laŭ la elementoj de la mondo, kaj ne laŭ Kristo*“ (Kol 2,8).

A12: Temas pri tio, ĉiujn tekstajn fajnaĵojn (gramatikajn kaj semantikajn detalojn) elĉerpi. Ĉe Galatoj 3,16 Paŭlo demonstras surbaze de 1 Mos 22,18 tian precizan pritrakton de la skribaĵo.

A13: Troviĝas precizaj kaj malpli precizaj bibliaj tradukoj. En la kazo de dubo estas konsilinde uzi la originan tekston (hebrea por la MT kaj la antikvan grekan por la NT). La baza signifo de kelka speciala vorto doniĝas ofte el la kunteksto, en kiuj tiu vorto aperas en facile komprenebla uzo. Multaj tradukoj eliras el diversaj celdirektoj. Tiel la klasika traduko de Lutero estas karakterizita per kerna kaj trafa lingvaĵo. Aparte oni devas atenti, kiam la tradukisto en sian tradukon enkonstruis sian propran komenton. Komplete neuzablaj estas tiaj „Biblio“j, kiuj per konscia devojiĝo de la biblia origina teksto provas konfirmi la apartan instruon de iu sekto (ekz. „New World Translation“ de la Atenstantoj de Jehovo).

A14: Kelkaj ŝajne kontraŭdiraj eldiroj de la Biblio estas klarigitaj per ilia komplementeco (komp. la regulon B52, punkto 3).

III. Kial legi la Biblion?

Legado de la Biblio apartenas, laŭ la volo de Dio – samtiel kiel manĝi kaj trinki – al la tage nepraj faroj, pro tio oni legas ĉe Jeremio 15,16a: „*Kiam mi trovis Viajn vortojn, mi ilin englutis.*“ La Biblio mem diras al ni multajn motivojn, kial oni ne povas rezigni pri ĝia legado. La plej gravaj inter ili estas tiuj ĉi:

1. por ekkoni la esencon de Dio: La esenco de Dio – Lia grandeco (Psa 19), Lia amo (1 Joh 4,16), Lia mizerikordo (4 Mos 14,18), Lia fidelo (Psa 25,10), Lia vero (4 Mos 23,19) – sin montras al ni per la revelaciita vorto.

2. pro la fido: „*La fido venas do per aŭdado, kaj aŭdado per la vorto de Kristo*“ (Rom 10,17).

3. pro la kresko de la fido: „Kiel ĵusnaskitaj suĉinfanoj, sopiru al la spirita lakto pura, por ke vi per tio kresku en savon“ (1 Pet 2,2).

4. pro la savcerteco: „Ĉi tion mi skribis al vi, por ke vi sciu, ke vi havas vivon eternan; al vi, kiuj kredas al la nomo de la Filo de Dio“ (1 Joh 5,13).

5. pro la ĝusta instruo: „Tenanta la fidelan vorton, kiu estas laŭ la instruado, por ke li povu admoni pri la sana doktrino kaj ankaŭ refuti la kontraŭdirantojn“ (Tit 1,9). La Biblio regas nin per bezonata korektado koncerne nian pensadon kaj vivon. Kontraŭe al tio la sekteca persono uzas la Biblion kiel batalinstrumenton, en kiu li nur serĉas konfirmon por tio, kio estis al li instruita alifonte.

6. pro la sekura kondukiteco tra la vivo: „Via vorto estas lumilo por miaj piedoj, kaj lumo por mia vojo“ (Psa 119,105).

7. por starigi prioritatojn en la vivo: „Sed celu unue Lian regnon kaj Lian justecon, kaj ĉio tio estos aldonita al vi“ (Mat 6,33).

8. por eduki infanojn: „Metu do ĉi tiujn miajn vortojn en vian koron kaj en vian animon, kaj alligu ilin kiel signon al via mano, kaj ili estu kiel memorigaĵo inter viaj okuloj. Kaj instru ilin al viaj filoj“ (5 Mos 11,18-19).

9. pro ĝusta rilato al proksimuloj: „Amu vian proksimulon kiel vin mem“ (Mat 19,19); „Nenion farante malpace aŭ arogante, sed kun humileco rigardante unu la alian kiel pli indan, ol li mem“ (Flp 2,3); „Amu viajn malamikojn, kaj preĝu por viaj persekutantoj“ (Mat 5,44).

10. pro ĝojo kaj refreŝiĝo: „Neniam mi forgesos Viajn ordonojn, ĉar per ili Vi min vivigas“ (Psa 119,93); „Kaj Via vorto fariĝis mia ĝojo kaj gajeco de mia koro“ (Jer 15,16).

11. pro konsolo en malfacilaj situacioj: „Mia animo alĝuiĝis al la polvo; vivigu min laŭ Via vorto“ (Psa 119,25).

12. pro helpo en plagoj: „Voku Min en la tago de mizero; mi vin liberigos“ (Psa 50,15).

13. pro protekto kontraŭ la falsaj vojoj: „De Viaj ordonoj mi prudentiĝas; tial mi malamas ĉiun vojon de malvero“ (Psa 119,104). Jesuo argumentas la falsajn vojojn de la homoj per la nekono de la Biblio: „Vi eraras, ne sciante la Skribojn, nek la potencon de Dio“ (Mat 22,29).

14. pro protekto kontraŭ pekoj: „En mia koro mi konservas Vian diron, por ke mi ne peku antaŭ Vi“ (Psa 119,11).

15. pro ekkono de sia kulpo: „Ĉiu skribaĵo inspirita de Dio estas ankaŭ utila por instruo, por admono, por korekto, por disciplino en justeco“ (2 Tim 3,16).

16. pro klarigo de la tempaj okazintaĵoj: „Apokalipso de Jesuo Kristo, kiun Dio donis al li, por montri al siaj servistoj tion, kio devas baldaŭ okazi“ (Apo 1,1).

17. kiel bazo por la scienca laboro: La Biblio regas nin per multaj sciencoj la fundamentajn kognitionojn. Tiuj bazaj kognitionoj estas aparte nemalhaveblaj en ĉiu scienca kampo, kie temas pri la

origino de la aferoj (ekz.: kosmologio, geologio, biologio) aŭ kie la imago de la homo ludas gravan rolon (ekz. psikologio, medicino).

18. por ekkoni la volon de Dio: „*Por ke vi provu, kio estas la bona kaj aprobinda kaj perfekta volo de Dio*“ (Rom 12,2). Nome, la volo de Dio troviĝas ne nur ene de 10 ordonoj (2 Mos 20,1-17) sed ĝi estas revelaciita ĉe multaj bibliaj tekstoj (ekz. 1 Tes 4,3; 1 Tes 5,18; 1 Pet 2,15; Heb 10,36; Heb 13,21).

19. pro purigo de la mensa sfero: „*Jam vi estas puraj pro la vorto, kiun mi parolis al vi*“ (Joh 15,3).

20. pro la saĝa praktiko: „*Komenco de saĝeco estas timo antaŭ la Eternulo; Bonan prudenton havas ĉiuj plenumantoj*“ (Psa 111,10).

IV. Kiamaniere legi la Bibliion?

L1: Ni devus legi la Bibliion per la *preĝanta* sinteno. De Lutero venas bona konsilo: „Ne metu vian manon sur la skribaĵon, sed sekvu adore ĝiajn piedspurojn!“

1. *kun peto por povi kompreni:* „*Malfermu miajn okulojn, ke mi vidu miraklojn de Via instruo*“ (Psa 119,18).

2. *kun dankema kaj Dion adoranta sinteno:* „*Miaj lipoj eldiru gloradon, ĉar Vi instruas al mi Viajn leĝojn*“ (Psa 119,171).

3. *kiel la donacito:* „*Mi ĝojas pri Via vorto, kiel ricevinto de granda akiro*“ (Psa 119,162).

L2: Ni devus legi la Bibliion en la *atendanta* sinteno: „*Mi malfermas mian buŝon kaj enspiras, ĉar mi deziregas Viajn ordonojn*“ (Psa 119,131).

L3: Ni devus legi la Bibliion per *spirita* mentalo: „*...por ke ni servu en noveco de spirito, kaj ne en malnoveco de litero*“ (Rom 7,6). Apud la tuta bibliie postulita precizo en traktado de la tekstoj (komp. la frazon B80) la Biblio tamen avertas antaŭ la falsa laŭlitereco de certa frostiĝinta kaj senviva kredo (Mat 23,23+33) kaj indikas al la spirita senco: „*Dio, kiu ankaŭ taŭgigis nin kiel administrantojn de nova interligo, ne laŭ litero, sed laŭ spirito; ĉar la litero mortigas, sed la spirito vivigas*“ (2 Kor 3,6).

L4: Ni devus legi la Bibliion per *humila* sinteno. La pensoj de Dio transiras nian racion, pro tio ni ne devus dubi, eĉ se ni ĉion ne komprenas. La humileco estas konsilinda: „*Ĉar Miaj pensoj ne estas viaj pensoj, kaj viaj vojoj ne estas Miaj vojoj, diras la Eternulo*“ (Jes 55,8).

L5: Ni devus legi la Bibliion per *amema* sinteno: „*Kiel mi amas Vian instruon! La tutan tagon mi meditas pri ĝi*“ (Psa 119,97).

L6: Ni devus legi la Bibliion per *fidanta* sinteno: „*...tamen laŭ via diro mi mallevos la retojn*“ (Luk 5,5).

L7: Ni devus legi la Bibliion kiel la *personan leteron* de Dio al ni, kiel la *amleteron* [G1, 186-188]. De la ŝvaba teologo *Johann Albrecht Bengel* venas la sekva citaĵo: „*La Skribo estas letero, kiun mia Dio lasis al mi skribi, laŭ kio mi min orientigu kaj kien mia Dio min orientigos.*“

L8: Ni devus legi la Bibliion riĉe: „*La vorto de Kristo loĝu en vi riĉe, en ĉia saĝeco; kaj instruu kaj admonu unu la alian per psalmoj kaj himnoj kaj spiritaj kantoj, kantante kun graco en viaj koroj al Dio*“ (Kol 3,16).

V. Dek promesoj por la bibliaj legantoj (legantoj kaj farantoj de la Vorto)

P1: Aparteni al Dio: „*Kiu estas de Dio, tiu aŭskultas la vortojn de Dio*“ (Joh 8,47).

P2: La paco: „*Grandan pacon havas la amantoj de Via instruo; kaj ili ne falpuŝiĝas*“ (Psa 119,165).

P3: La ĝojo: „*Tion mi parolis al vi, por ke mia ĝojo en vi restadu, kaj via ĝojo estu plena*“ (Joh 15,11).

P4: La feliĉo: „*Feliĉa estas tiu, kiu observas la vortojn de la profetaĵo de ĉi tiu libro*“ (Apo 22,7).

P5: La bonstato: „*Kaj li estos kiel arbo, plantita apud akvaj torentoj, donanta sian frukton en sia tempo, kaj kies folio ne velkas; kaj en ĉio, kion li faras, li sukcesos*“ (Psa 1,3).

P6: La sukceso: „*Ĉi tiu libro de la instruo ne foriĝu de via buŝo, sed meditu pri ĝi tage kaj nokte, por ke vi zorge plenumu ĉion, kio estas skribita en ĝi; ĉar tiam vi havos feliĉon sur viaj vojoj, kaj tiam vi havos sukceson*“ (Jos 1,8).

P7: La preĝelaŭdo: „*Se vi restadas en mi, kaj miaj vortoj restadas en vi, petu kion ajn vi volos, kaj tio estos farita por vi*“ (Joh 15,7).

P8: La purigo de la menso: „*Jam vi estas puraj pro la vorto, kiun mi parolis al vi*“ (Joh 15,3).

P9: La indikilo al eterna feliĉo: „*Kaj ke jam de frua infaneco vi konas la sanktajn skribojn, kiuj povas fari vin saĝa por savo per la fido, kiu estas en Kristo Jesuo*“ (2 Tim 3,15).

P10: La donaco de la eterna vivo: „*Vere, vere, mi diras al vi: Kiu aŭskultas mian vorton, kaj kredas al Tiu, kiu min sendis, tiu havas eternan vivon kaj ne venas en juĝon, sed jam pasis de morto en vivon*“ (Joh 5,24).

Nereduktita letero de leganto

Julio 1987, vendredo vespere, ĉirkaŭ 19.30. Mi promenas en la vendeja zono – diseldorfano en Munkeno – kontraŭ la placo Marienplatz. Antaŭ la modmagazeno iu puŝas en mian manon paperfolion. Temas pri invito. „Pro kio la steloj?“ tekstas la temo, pri kiu parolos iu ajn profesoro en la modmagazena aŭlo Mühlhäuser post nur kelkaj minutoj. Mi pensas ĉe mi: „Interesa temo – sed, pri tio li scias precize tiom malmulte kiel mi. Tamen mi povas tion lasi veni en miajn orelojn.“

Tre estimata s-ro Gitt,

hodiaŭ mi scias, jen tio estis! Mi rememoras, ke Via prelego tiam antaŭ kelkaj homoj, kiuj same kiel mi, venis „de la strato“, eniris la temon profunde. Malgraŭ de tio, mi ankoraŭ tre precize scias, kiel mi en tiu vespero devis pensi: „Kion do ili volas, ĉu ili ne vidas, ke la viro diras la veron; kiamaniere oni povas nur esti tiel blinda, li pravus entute!“

Ĝis tiu momento mi volis havi nenion komunan kun kredo, eklezio kaj simile. Jesuo por mi estis homo kiel ĉiu alia. Senrigarde ke tiel estis, Via parolado kondukis min al la plej grava decido en mia vivo. Ĝi estis je la sekva prelegvespero la iniciato por mia konvertiĝo al la Sinjoro Jesuo. Vi, kara sinjoro *Gitt*, estis, kiu kiel laboristo por la regno de Dio donis por tio la spronmomenton. Pro tio mi volas al Vi hodiaŭ, dek jarojn poste, esprimi mian dankemon! Mia aĝo tiam estis dudeknaŭ jaroj. Trikvaronon de la jaro pli poste mi lasis min bapti en iu diseldorfa baptista komunumo. Tamen ĉe mi en la sekva tempo restis multaj problemmomentoj. Mi ne estis la infano de Dio, preparinta al Li multan ĝojon. Ĝuste kontraŭe, mi frekventis malbonajn vojojn, mi estis kaptito de la mondo kaj mi vivis kontraŭ la vorto de Dio.

Hodiaŭ mi scias, ke Sinjoro Jesuo Kristo min tenis el sia graco kaj min venigis sur la ĝustan vojon. Mi tre volonte raportas ekzemplon, kiel tio, denove kun via helpo, okazis: Sen ia konkreta celo mia edzino kaj mi prenis mallongan ferion en Nederlando. Ni alvenis la ĉebordan urbon Noordwijk. Estis antaŭsezono kaj disponiĝis granda elekteblo por tranokti. Ni elektis hazardan lokon inter la unu apud la alia troviĝantaj pensionoj kaj eniris nian ĉambron. Tie kuŝis iom da legaĵoj por gastoj: unu libro kaj la revuo „Ethos“. Mi malfermis la libron kaj legis la unuajn frazojn de la antaŭparolo:

„La ideo por tiu ĉi libro naskiĝis en la tempo de iu evangeliza serio da prelegoj, kiujn la aŭtoro havis en la origina medio de la munkena modmagazeno *Mühlhäuser*. La moddesegnisto *Harro Mühlhäuser* disponigis...“

Paf! – „Ĉu vi aŭdis, kiel tio enfrapis?“ Pli bone demandite: „Ĉu vi povus imagi, kio en mi okazis?“ – „Ne, tion vi ne povas!“ – Kaj jen denove parolis la viro, kiu min kondukis al la kredo en la Sinjoron Jesuon Kriston! – Kaj kiel li parolis! La respondoj en tiu ĉi demandolibro korespondas precize kun mia tiama kreditsituacio.

Tio okazis februare 1993. Nun, dek jarojn post Viaj prelegvesperoj en Munkeno, mia aĝo estas trideknaŭ jaroj, mi havas edzinon, kiu estas kristano, kaj tri infanojn en aĝo de kvar, du kaj apenaŭ unu jaro. Tiam mankis al mi ajna vivosenco. Mi ne havis racian vivperspektivon. Nuntempe mi tian perspektivon havas; kaj eĉ kian! Mi trovis la sencon de mia vivo, nome pere de la kredo en nian komunan Sinjoron Jesuon Kriston, ke mi tiel estas infano de la vivanta Dio. Mi fidus la vorton de Dio, mi staras firme en mia kredo kaj mi trovis mian lokon en la komunumo. Resume: mi havas la vojon, la veron kaj la vivon.

Kara sinjoro *Gitt*, multan dankon!

Dietmar Schmidt

Grevenbroich, 24-an de julio 1997

Persone el la vivo de la aŭtoro

Per la sekva teksto mi volas dokumenti, kiamaniere Dio per Jesuo Kristo min trovis kaj je kelkaj elektitaj vivstacioj indikis, kian historion Dio jam havis kun mi kaj kiamaniere li efikis en mia vivo, kiel Li min vokis, kondukis kaj benis.

1. Mia infaneco kaj juneco: Mi estis naskita 22-an de februaro 1937 en Raineck/Kr. Ebenrode, Orienta Prusio (Nuntempe apartenanta al la ruslanda nord-orienta Prusio) enkadre de la kamparana domo de siaj gepatroj. Ĝis la fuĝo mi travivis belan kaj senĝenan infanaĝon

en la provinca kamparana medio. Kiam mi atingis sep jarojn de mia aĝo kaj komencis frekventi ĝuste la duan klason de la vilaĝa lernejo, ni oktobre 1944 fuĝis per ĉevaloj kaj veturiloj el Reineck al Peterswalde (sudorienta Prusio). En januaro 1945 atingis nin tie multe tro malfrue la anonco, ke la Ruĝa armeo jam enmarŝis. De domo al domo disvastigis la „ofica heroldo“ la mallongan kaj panikan sloganon: „Savu vin, kiu povas!“ Ĉar mi malsanis kun alta febro, mia lito estis simple portita el nia loĝĉambro sur la ĉevalan veturilon por fuĝi. Rapide estis kombinita la grupo da ĉevalveturiloj kaj ekigita en movon, kiun tamen baldaŭ haltigis Rusoj. Mia 15-jaraĝa frato *Fritz* estis rekte el la veturilo forprenita. Li neniam plu aperis. Mia patrino (*Emma Gitt*, nask. *Girod*) estis baldaŭ post tio prenita en Ukrainion kaj tie post mallonga tempo mortis en brakoj de iu kunkaptita virino. Tiu ĉi atestantino post kelkaj jaroj revenis al Schwerin kaj raportis pri la lastaj vortoj de mia patrino: „Kio do estiĝos el mia eta *Werner*?“ (Nun ŝi tion scias!).

Kun du onkloj, mia kuzino *Rena* kaj mia avo mi en novembro 1945 travivis elpelon tra Pollando. Mia avo mortis post iu tranoktado sub nuda ĉielo ankoraŭ antaŭ komencis la 10-taga transporto de la orienta flanko de Odro en brutvagonoj. Post interrompa restado ni atingis Sanitz ĉe Rostock sur la nordmara insulo Wyk sur Föhr.

Mia patro troviĝis en la franca militkaptiteco kaj sciis nenion pri la sorto de sia familio. La pomonate permesitajn leterfoliojn li alie ol la ceteraj militkaptitoj ne povis utiligi, ĉar preskaŭ ĉiuj niaj parencoj originis el Orienta Prusio. La novajn loĝlokojn de malproksime loĝantaj parencoj li ne konis. Iun nokton li havis en la tendaro sonĝon, en kiu li renkontis parencon el iu fora loko, kiu jam antaŭ la milito loĝis en Rejnlando. Kiam ili post ilia interparolo post tiom da jaroj adiaŭis, tiu parenco diris: „*Hermann*, vizitu min foje!“ Mia patro en la sonĝo akceptis la inviton: „Sed kie vi loĝas? Mi vian adreson ne konas.“ La parenco klarigis al li precize: „Bochum, Dorstenerstr. 134a“. Poste mia patro vekiĝis, bruligis meze de la nokto kandelon kaj notis la ĵus en la sonĝo ricevitan adreson. Li rakontis al la vekiĝintaj kamaradoj en la dormosalo la strangan dumsonĝan okazintaĵon. Ili mokridis pri li, ĉar li tion prenis por serioza eĉ asertante, ke li skribos leteron al tiu adreso jam sekvatage. La respondletero konfirmis, ke la adreso estis ekzakte ĝusta, kaj pere de tiu malproksima onklo venis kontakto kun mia onklo (*Lina Riek*, nask. *Girod*) al Wyk sur Föhr. La raporto pri la vivo de mia patro faris min nekredible feliĉa. Mi dekomence tute ne povis kompreni, ke mi ne plu estas kompleta orfo, sed ke mi denove havis patron. Kiam mia patro poste en la jaro 1947 revenis el la franca militkaptiteco, li trovis min tie kiel reston de la dispelita familio. Serĉante laboron li kun mi venis al iu kamparana domo en Saaße, iu sorbslava vilaĝo proksime al Lüchow. Interese por tiu tempo estis, ke junuloj el tiu vilaĝo min invitis al iu infana horo. Mi ne havis imagon pri tia infanhoro kaj mi pensis, ke tie estos rakontitaj fabeloj. Tiel mi iris kun ili kaj travivis tiel mian unuan horon, kiu okazis en la sola ĉambro de la tie aganta komunuma fratino. La fratino *Erna* kun granda radiadpovo rakontis je ĉiu dimanĉa mateno unu el la bibliaj rakontoj. Ŝi preĝis kaj kantis kun ni multajn piajn kredkantojn. Mi jam dum la unua horo rimarkis, ke tie okazis io, kio kun la fabeloj ne havas ion komunan. De la mesaĝo mi estis persone tuŝita. Ĉio-ĉi alparolis min tre enpenetre kaj tiel mi de tiu tempo partoprenis tiujn infanhorojn.

Sekvajare mia patro denove geedziĝis kaj mi baldaŭ translokiĝis al lia edzino en la najbara vilaĝo Jeetzel, dum mia patro laboris en kamparana entrepreno kelkajn vilaĝojn for de tie. Mia duonpatrino (*Adelheid Gitt*, nask. *Lipowski*) estis tre bonintenca rilate min, kvankam ŝi devis por la kamparanaj mastroj tre peze labori kiel tajlorino en iliaj hejmoj por povi iel vivi kun sia tagsalajro de 3 GM kaj aldona nutraĵo. Ŝi estis tre kredema katoliko, tamen ŝi neniam provis min akiri por la katolika eklezio en mia influfacila aĝo, pro kio mi ankoraŭ nuntempe sentas dankemon al ŝi. Mi daŭre frekventis – senkonsidere la veteron – la infanhorojn. Pere de la fidela servo de la fratino *Erna* estis en mia koro plantita semo de la vorto de Dio, kiu iun tagon komencos ĝermi. Kiam mia patro en Vestfaliao trovis laboron en industrio, ni translokiĝis en la jaro 1950 al Hohenlimburg. Sed ĉiuokaze en la nova loĝloko ne proponiĝis

ia komunumo por subteni la kredon, sed ĝuste la kontraŭo de tio. La religia instruo efikis sur min per sia biblikritika karaktero tiamaniere, ke mi en memoro je antaŭaj infanhoraj ĉiam denove pensis: „Domaĝe, ke la bibliaj rakontoj ne estas veraj, kiel mi lernis ĉe la fratino *Erna*.“ Tamen la ardanta meĉo, la sopiro je vero, ne estis estingita. Ankaŭ sporada preĝeja vizito ne puŝis min ĉe mia serĉado de Dio antaŭen, ja la predikoj estis pliparte senligaj kaj tiel ili ne povis efektiviĝi decidan ŝanĝon en mi.

2. Mia vojo al Dio: Post mia diplomiĝo super miaj studoj en Hanovro kun la aldona promocio tempo en Ahenon, mi en oktobro 1971 komencis labori en la fizik-teknika tutŝtata instituto en Braunschweig kiel estro de la branĉo datenprilaboro (nun: informteknologio). Mia tiama situacio povas esti karakterizita tiel: profesie mi havis bonajn rezultojn. Mian diplomekzamenon en du fakdirektoroj mi sukcesis fari kun „tre bone“ kaj mia doktora laboraĵo estis prijuĝita kun „bonege“ kun samtempa livero de plaketo *Borcher* fare de la teknologia altlernejo en Ahenon (Aachen). Senpere sekvis mia postenigo kiel gvida sciencisto. En la jaro 1969 mi geedziĝis, kun niaj du infanoj ni estis feliĉa familio. Ni fartis ĝenerale bone, ni havis nek familiajn nek sanajn nek financajn problemojn. Tiel kelkaj povus pensi, ke oni en tia situacio Dion ne bezonas. Mi substrekas tion pro tio, ke mi ĉiam denove aŭdas atestaĵojn de la homoj, kiuj nur post persona profunda plago sin malfermis por la evangelio. Ĉe mi tiel ne estis, ja la Diaj vojoj kun unuopaj personoj estas tute diversaj, kiel diversaj do estas la homoj sur la tero.

En aŭtuno 1972 okazis en Braunschweig du diversaj evangelizadoj, kiujn mi kun mia edzino regule frekventis. Eta kristana grupo evangelizis en realerlejo (sidonierlernejo) apud nia loĝejo. Estis fantaziplena metodo kolporti al ĉiu vizitanto unu Biblion kaj unu ruĝan kajeron. La centraj eldiroj de la Biblio estis akompane de aktiva kunlaboro de la aŭskultantoj prilaborita kaj ĉiuj pritrakitaj bibliaj citaĵoj tuj ruĝkrajone markitaj. Post la fino de tiu ĉi nekutima, tamen efektiva anoncsemajno ni rajtis niajn Bibliojn reteni. Tiel mia edzino kaj mi havis ĉiu por si egalan Biblion, kaj okaze de la posta legado ni trafis ofte la lokojn, kiuj jam estis markitaj kaj ili tiel peris certan konatecon kaj fidindecon.

La alia evangelizado okazis nur mallongtempe post la unua. Potage venis ĉirkaŭ 2000 personoj en la urban salonegon de Braunschweig. Tie en la centro estis postenigitaj la teme skize resumitaj, sed sendube al la decido orientitaj mesaĝoj. La voko al la fido, la decido por Jesuo Kristo okazis ĉiuvespere kiel klare formulita invito. Dum la prediko de *Leo Janz* surbaze de la evangelio laŭ Luko 17,33-36 venis la elekto inter la savo kaj perdiĝo tiel klare sublumen, ke mi, post kiam mi supervenkis mian „timon kaj tremadon“ sekvis la ĝeneralan alvokon veni antaŭ la publikon. Ankaŭ mia edzino venis kun mi. La individua persona interparolo kaj komuna preĝo kun iu animprizorga asistanto multe helpis al mi por atingi la certecon de mia savo. Estis strange, ke niaj ambaŭ interparolaj partneroj apartenis al la sama domkomunuma rondo, kiun ni poste baldaŭ apartenis. Sekvis daŭraj anonctagoj en Braunschweig. Dum kelkaj vesperoj parolis la pastoro *Heinrich Kemner* en la ŝtopplena preĝejo Martinikirche. Por mi estas ĝis hodiaŭ neforgesebla lia prediko pri la templa puto laŭ Hesekielo 47. Pere de lia plenvalora mesaĝo mi estis tiel movita, ke mi samtempe decidis esplori, de kie tiu originala viro venis. Lin volis mi denove aŭskulti. Tiel la vojo kondukis min baldaŭ al Krelingen, idilia paŝtista vilaĝo proksime de Walsrode. La sekvaj junularaj tagoj en Ahlden sub la kverkoj de Krelingen, sed ankaŭ la vekigaj tagoj decide kundifinis mian fidkreskon. Ankaŭ la libroj de la pastoro *Kemner* donis al mi gravajn spronpuŝojn kaj efikis sur min orientige per forta mezuro.

Post ĉiuj-ĉi okazintaĵoj, kiuj min kondukis al profunda propra biblistudado, mi venis ĝis la por mi decida sperto: la Biblio estas en sia tuteco la vorto de Dio kaj portas la absolutan sigelon

de la vero. Tio estis la tiel stabila fundamento, ke ĝi en ĉiuj situacioj de mia vivo kaj pensado montriĝis ekstreme portopova. Mia simpla fido je la vorto de Dio, kiun mi havis ek de miaj infanaj bibliaj horoj, mi ne nur reakiris, sed tio firmiĝis tiel forte, ke mi estis preta ankaŭ atestante peri al aliaj homoj. Tio okazis per personaj atestadoj unue jen kaj jen dum la bibliaj horoj, kiujn mi gvidis en nia komunumo. La apartenon al iu biblifidela komunumo kaj la personan engaĝiĝon en la komunuma vivo mi ekkonis senkondiĉe nepre, se oni volas konsekvence aparteni al Kristo.

Mi povis ekkoni Jesuon kiel Kriston, la Filon de Dio, la Savanton el mia perditeco. Li, estinta el la eterno, venis de Dio, la Patro, fariĝis homo kaj nin savis laŭ la plano, kiun neniu intelekto povis elpensi. La Nova Testamento rivelacias al ni, ke Dio tra tiu Jesuo kreis la tutan universon kiel ankaŭ tiun ĉi teron kaj la tutan vivestafaron sur ĝi. Estas nenio esceptita, ĉar „ĉio estiĝis per li (= la vorto, Logos = Jesuo); kaj aparte de li estiĝis nenio, kio estiĝis“ (Joh 1,3). Ne nur ĉio estiĝis per li, sed ankaŭ por li kiel la celpunkto (Kol 1,16).

Por mi apartenas al la plej majestaj pensoj: La Kreinto kaj la viro sur la kruco estas la sama persono! Kio movis tiun Sinjoron de ĉiuj sinjoroj kaj tiun Reĝon de ĉiuj reĝoj iri por mi sur la krucon? Mia racio tion ne povas diveni, sed Johano 3,16 donas al mi la respondon: Estas lia senlima amo, kiu faris por mi ĉion, por ke mi ne pereu.

3. La Biblio kaj la scienco: unu temkomplekso de la Biblio fascinis min ĉiam denove. Estis la kundependeco de la bibliaj diraĵoj kun la natursciencaj demandoj, speciale la demando pri la kreo. Mi rimarkis ke tiu ĉi kruciĝo inter la pensado kaj fido por multaj intelektule formitaj samtempuloj prezentas la decidan ekzamenkriterion por ilia fido ĝenerale. Se la evoluciisma teorio estus vera, tiam la raporto pri la kreo ne povas samtempe esti vera. Sed se la kreoraporto estas vera, tiam la evoluciisma teorio estas unu el la bazaj kaj la plej katastrofaj misdoktrinoj de la mondhistorio. Por la prijuĝo de la evoluciisma ideo mi el la vidpunkto de la firmaj aksiomoj de mia faka kampo – la informadiko – konkludis la sekvon: Tiu ĉi modelo ne estas malĝusta nur en kelkaj detaloj, sed jam en sia baza eldiro. Unu el la kernaj punktoj de la vivo estas la en la ĉeloj troviĝanta informo. La informo tamen ne estas materia fenomeno, sed per la volo kaj inteligento estiĝinta spirita unuo. Nova informo povas estiĝi do nur pere de krea pensproceso, ne per mutacio aŭ selekto. Precize tion priskribas ankaŭ la Biblio per multfacetaj esprimmanieroj, kiel ekz. en Sentencoj 3,19: „La Eternulo per saĝo fondis la teron; per prudento Li aranĝis la ĉielon.“

4. En la servo al Jesuo: Kiam ni en la jaro 1976 kun iu amika familio trapasis komunajn feriojn sur la nordmara insulo Langeoog, ni dum iu ĉeborda konversacio kun iu amiko ĉiam denove preparolis la demandojn pri la kreado. Li proponis, ke mi miajn pensojn en lia komunumo prezentu. Tiel en la jaro 1977 okazis la unua publika prelego. Mi estis surprizita, ke tiun vesperaranĝon, por kiu okazis, krom la „buŝpropagando“ neniu aparta reklamo, tamen frekventis tiomaj elstaraj gastoj. La temaro evidente por multaj sentiĝis brulpunkto meze de la koro. Kaj tiu prelego provokis novajn prelegpostulojn. Dum sekvaj jaroj do okazis tia plilarĝiĝo de tiu prelegservo en la lando, ke mi baldaŭ nur plu certan parton de la venintaj prelegpostuloj povis pozitive respondi.

Kiam mi iun tagon legis artikolon en iu kristana revuo, en kiu la aŭtoro miksis la evoluciisman ideon kun la biblia kreadatesto, tio min defiis reeĥe al tiu artikolo prepari mian propran, orientitan biblien. Sed mia artikolo estis malakceptita, ĉar la redakcio reprezentis alian „teologian starpunkton“. Poste la artikolo tamen aperis kune kun la kontribuo de iu kunaŭtoro maje 1977 en Braunschweig. La broŝuro havis eldonkvanton de 3000 ekzempleroj. Baldaŭ poste iu eldonejo venis kun peto al ni du, pritrakti la temaron pli amplekse por ĉion eldoni en

formo de poŝlibro. Tia libro aperis en la jaro 1978 sub la titolo „Schöpfung oder Evolution“ (La kreado aŭ la evolucio). Tiu skribaĵo unuafoje konfrontis min kun sciencistoj, kiuj pensis simile. Nur mallonge post tio estis fondita la studkomunumo „Wort + Wissen“ (Vorto + Scio). Ek de la jaro 1981 mi apartenas al la gvidrondo de tiu ĉi tiam fondita societo, kiu sin taskigis prezenti la vorton de Dio en nia tempo kaj sur tiu soklo praktiki biblie orientitan sciencan. La instruoj de la evoluciismo forte kaj damaĝe influis la pensmanieron en diversaj kampoj de la natursciencoj kaj spiritsciencoj. Aparte por la intelektuloj la alpaŝo al la Biblio estis tiom malfaciligita, ke fariĝis nepraĵo, al ili prezenti helpon. Sub pli preciza observo oni ĉiam denove konstatas, ke la de la kreoatesto de la Biblio elirantaj klarigoj de la sciencaj faktoj multe pli bone kongruas kun la realo ol tio okazas ĉe la provoj klarigi enkadre de la evoluciisma instruo. Post pluraj jaroj mi science okupiĝis pri la nocio informo. Kiel rezulton mi povis formuli diversajn naturleĝojn. Tiun ĉi „naturleĝan informteorion“ mi prelegis en multaj universitatoj enlande kaj eksterlande, kiel ankaŭ dum sciencaj kongresoj.

En la jaro 1980 aperis mia dua poŝlibro „Logos oder Chaos“ (Logoso aŭ Kaoso), kiu – kiel mi povis surbaze de multaj reagoj el la legorondo ekscii – multajn serĉantojn helpis pense transpaŝi de evolucio al la kreadpensmaniero. La postulo je skribitaj tekstoj akompane al la prelegoj ne ĉesis aperi, kaj tiel mi apud mia prelegagado komencis verki ankaŭ miajn librojn. Se oni dum mia juna aĝo estus al mi dirinta ke mi iam verkos librojn, mi tion tute ne povus imagi. Dum mia lerneja tempo mi sentis profundan malplaĉon prepari eseojn. Se mi en tiu tempo povus elekti, tiam mi pli plaĉe preparus dek matematikajn laboraĵojn ol unu eseon.

Dum tempopaso mi pritraktis diversajn demandkompleksojn, kiujn mi dum miaj prelegoj ĉiam denove renkontis kaj ili ŝajnis al mi gravaj. En la kadro de la poŝlibra formato mi tiujn demandojn ĉiam denove pritraktis. Ke oni povas al la Biblio en ĉiuj ĝiaj eldiroj vere fidi, estas elĉerpe pritraktita en mia verko „So steht's geschrieben“ (Tiel estas skribite) el la jaro 1985. En la libro „Das biblische Zeugnis der Schöpfung“ (La biblia atestado pri la kreado) el la jaro 1983 temas aparte pri tio, ke ĉiuj eldiroj pri la kreado ankaŭ en la vidpunkto de la modernaj sciencaj faktoj estas fidindaj. Per amuza kaj facile komprenebla, tamen science fondita maniero estis farita mia poŝlibro „Wenn Tiere reden könnten“ (Se bestoj povus paroli) el la jaro 1990, kiu samtiel pritraktas la demandon pri la kreado. Ĉi-kaze estas atentigite al multaj konstruciaj detaloj en la regno de la bestoj, kiuj ne kondukas nur al mirado, sed defias ankaŭ al la fido. La ofte starigita demando, ĉu multaj religioj prezentas aliajn vojojn de la savo apud la evangelio, estas bibli-analize pritraktita en la libro „Und die anderen Religionen?“ (Kaj la aliaj religioj?) el la jaro 1991. La por tio postulita pli proksima pritrakto de la evangelio faris ĝuste tiun ĉi libron iĝi la evangeliza libro. Kiel oni al mi ĉiam denove diras, estas la libroj, kiuj ligas la sciencajn faktojn kun la biblia mesaĝo, tre postulataj fare de la legantoj. Tio fariĝis laŭ mia prijuĝo ankaŭ la centra punkto de mia literatura laboro. La poŝlibroj „Signale aus dem All – Wozu gibt es Sterne?“ (Signaloj el la universo – Pro kio la steloj?) el la jaro 1993, „Am Anfang war die Information“ (Ĉe la komenco troviĝis la informo) el la jaro 1994 kaj la ilustrita volumo „Faszination Mensch“ (La fascino homo) el la jaro 1996 troviĝas samtiel sur tiu ĉi gvidlinio. Ĉiuj-ĉi traktaĵoj estas koncipitaj tiel, ke ili surbaze de la plena fido al la Biblio pritraktas la sciencan materialon kaj helpe de sendubaj evangeliaj tekstopartoj propagandas la fidon je Jesuo Kristo.

Tute alitipa agadkampo malfermiĝis por mi en la jaro 1990, kiam min atingis voko de iu ĝis tiam al mi plene nekonata viro. Li klarigis al mi, ke li estis naskita en Sovetunio kaj ke li tie ankaŭ studis. Li estas germano kaj regas la rusan lingvon parole kaj skribe. Lia propono: „Mi legis kelkajn el viaj libroj. Ĉu vi povus imagi, ke vi estus vojaĝinta kun mi en la iaman Sovetunion por tie proponi tiajn prelegojn? Mi estus preta aranĝi tradukadon en la rusan lingvon.“ Mi petis riprenstempon. Okaze de pli posta alvoko mi akceptis. Tiel pasis mia unua

vojaĝo al Moskvo, kie ni en majo 1991 dum dek tagoj predikis la evangelion en diversaj lokoj (Ekz: en la Pedagogia altlernejo, en diversaj faklernejoj, hospitaloj, en iu fabriko kaj ankaŭ en iu kazerno). Dio donacis al ni malfermitajn korojn por la diritaj vortoj, kaj surprize multaj estis pretaj sin turni al Jesuo Kristo per persona decido. Kiu estas tiu viro, kun kiu min Dio tiamaniere kunigis? Estas *d-ro Harry Tröster*, kiu en sia ĉiutago laboras por la firmao Mercedes Benz en la evolulaborejo. Dumtempe ni entreprenis jam preskaŭ pojure unu misian vojaĝon al Oriento. Niaj vojoj kondukis nin ankoraŭfoje al Moskvo, sed ankaŭ al Kazahanio kaj Kirgizio kaj al la (nuntempe rusa) norda Orientprusio. Tiujn vojaĝojn al Oriento ni ne entreprenas solaj, sed kune kun intertempe jam elprovita akompanaro. Dum ĉiuj aranĝoj estis kolportitaj grandaj kvantoj da evangeliza literaturo, kiu antaŭe estas transportita surloken per kamionoj. Kompreneble al tio apartenas ankaŭ libroj de Nova Testamento kaj Biblio por infanoj okaze de ĉiu vojaĝo.

Ek de la jaro 1978 ĝis la mezo de la naŭdekaj jaroj de la dudeka jarcento mi pojure aranĝis misian tendeg-programon. Nienhagen, vilaĝo en proksimo de Celle, estis mia unua tendeg-programa loko. Kelkaj aliaj lokoj estis inter alie: Detmold, Köln, Schorndorf, Frankfurt/Oder, Greifswald, Zerbst kaj Zwickau. En la somero 1978 mi aranĝis mian unuan tendeg-servon kiel evangeliisto en Nienhagen. Interese tiu jaro koincidas kun mia nomumo por direktoro kaj profesoro. Ĉu hazardo? Ĉe Mateo 6,33 diras Jesuo: „Sed celu unue Lian regnon kaj Lian justecon, kaj ĉio tio estos aldonita al vi.“

La jaro 1991 restos neforgeseble en mia memoro, ĉar mi dum naŭ tagoj anoncis la evangelion en la granda salono de Stadthalle Braunschweig. Tie, kie mi en la jaro 1972 mem trovis decidon por Kristo, nun mi povis aliajn homojn voki, ke ili postsekvu Jesuon. La invitoj al plurtagaj evangelizaj partoprenoj en urbsalonegoj, publikaj konstruaĵoj aŭ komunumaj centroj mi enkadre de la al mi disponigita tempo ĉiam akceptis.

Retrorigarde mi miras, kiamaniere oni kiel sciencisto fariĝas aŭtoro de la kristanaj libroj kaj anoncisto, sen tion iam ajn plani aŭ antaŭsenti. Kiam mi provas klarigi la gvidmomentojn fare de Dio en mia vivo, tiam iu frazo, kiun eldiris la konata paroĥestro kaj evangeliisto Heinrich Kemner, ekricevas por mi apartan signifon: „Ni ne puŝas, ni estas puŝataj!“ Tiel faras Dio; Li puŝas nin en apartajn situaciojn. Kiam Li malfermas pordojn, tiam oni devas ilin trapasi, ĉar nur tio, kion Li antaŭpreparis, troviĝas sub Lia beno.

La listo de propra uzita literaturo

Pri la literaturo de la aŭtoro estas en la teksto indikite per mallongiga grandlitero G kun laŭorda numero kaj indiko de la koncerna paĝo en angulaj krampoj:

- [G1] So steht's geschrieben
Neuhausen-Stuttgart, 4. Auflage 1997, 200 S.
- [G2] Das biblische Zeugnis der Schöpfung
Neuhausen-Stuttgart, 6. Auflage 1995, 188 S.
- [G3] Und die anderen Religionen?
CLV Bielefeld, 6. Auflage 1997, 159 S.

- [G4] In 6 Tagen vom Chaos zum Menschen
Logos oder Chaos – Naturwissenschaftliche und biblische Grundfragen
zur Schöpfung – Aussagen der Einwände zur Evolutinslehre
Neuhausen-Stuttgart, 5. Auflage 1998, 288 S.
- [G5] Am Anfang war die Information
Neuhausen-Stuttgart, 2. Auflage 1994, 288 S.
- [G6] Schuf Gott durch Evolution?
CLV Bielefeld, 5. Auflage 1997, 159 S.
- [G7] Signale aus dem All – Wozu gibt es Sterne?
CLV Bielefeld, 2. Auflage 1995, 222 S.
- [G8] Wenn Tiere reden könnten
CLV Bielefeld, 10. Auflage, 122 S.
- [G9] Faszination Mensch
CLV Bielefeld, 1. Auflage 1996, 141 S.
- [G10] Nur die Klugen kommen ins Himmelsreich
(Zum Gleichnis über den ungerechten Haushalter nach Lukas 16,1-8),
Zeitschrift ‚Bibel und Gemeinde‘ (1985), H. 2, S. 191-200.

Indikoj pri la skribaĵoj de aliaj aŭtoroj aperas ĝenerale nur po unu fojon; tiaj fontindikoj estas en la libro cititaj rekte en la teksto.

La aŭtoro uzis en rekta citado la germanan tradukon de la Biblio de Lutero (MT: 1912; NT: 1956). Aliaj bibliaj diraĵoj estas cititaj laŭ unuopaj fontoj tuj post la citaĵo. La tradukinto uzis la esperantan Bibliion (MT de Zamenhof; NT de la komisiono en Skotlando).

Ekspliko de la uzitaj mallongigoj por citi el la Biblio (en Esperanto)

La libroj de la Malnova Testamento (MT)

1 Mos	1-a libro de Moseo (Genezo)
2 Mos	2-a libro de Moseo (Eliro)
3 Mos	3-a libro de Moseo (Levidoj)
4 Mos	4-a libro de Moseo (Numeroj)
5 Mos	5-a libro de Moseo (Readmono / Deŭteronomo)
Jos	Josuo
Juĝ	Juĝistoj
Rut	Rutao ⁴

⁴ Zamenhof restis la finaĵ-problemon de propraj kaj geografiaj nomoj nesolvita. Problemo estiĝas, kiam la nomo en origina lingvo finiĝas je *-a*, kiu en Esperanto havas specialan gramatikan signifon, nome la adjektivan. Por povi tian nomon tamen deklinacii, mi sisteme aldonas la substantivan finaĵon *-o*. Tiel esperantaj nomoj povas esti deklinacitaj; la finaĵon *-o* oni povas, krom en akuzativo, ellasi kaj anstataŭi per apostrofo: Rut’; Estera’ ks.

1 Sam	1-a libro de Samuĉelo
2 Sam	2-a libro de Samuĉelo
1 Reĝ	1-a libro Reĝoj
2 Reĝ	2-a libro Reĝoj
1 Kro	1-a libro Kroniko
2 Kro	2-a Libro Kroniko
Ezr	Ezrao
Neh	Nehemjao
Est	Esterao
Ijo	Ijobo
Psa	Psalmaro
Sen	Sentencoj
Prd	Predikanto
Knt	Alta kanto
Jes	Jesajo
Jer	Jeremio
Lam	Plorkanto (Lamentado)
Jeh	Jehezekelo
Dan	Danielo
Hoŝ	Hoŝeao
Joe	Joelo
Amo	Amoso
Oba	Obadjao
Jon	Jonao
Mih	Mihao
Naĥ	Naĥumo
Hab	Habakuko
Cef	Cefanjao
Hag	Hagajo
Zeh	Zeharjo
Mal	Malahio

La libroj de la Nova Testamento (NT)

Mat	Mateo
Mar	Marko
Luk	Luko
Joh	Johano
Ago	Agoj (de la apostoloj)
Rom	Epistolo al Romanoj
1 Kor	1-a epistolo al Korintanoj
2 Kor	2-a epistolo al Korintanoj
Gal	Epistolo al Galatoj
Efe	Epistolo al Efesanoj
Flp	Epistolo al Filipanoj
Kol	Epistolo al Kolosanoj
1 Tes	1-a epistolo al Tesalonikanoj
2 Tes	2-a epistolo al Tesalonikanoj
1 Tim	1-a epistolo al Timoteo
2 Tim	2-a epistolo al Timoteo

Tit	Epistolo al Tito
Fil	Epistolo al Filemono
Heb	Epistolo al Hebreoj
Jak	Epistolo de Jakobo
1 Pet	1-a epistolo de Petro
2 Pet	2-a epistolo de Petro
1 Joh	1-a epistolo de Johano
2 Joh	2-a epistolo de Johano
3 Joh	3-a epistolo de Johano
Jud	Epistolo de Judaso
Apo	Apokalipso